



# La Signo de la Kvar

**(The Sign of Four)**

**De Arthur Conan Doyle**

**el la Angla tradukis**

**James Alan Smith**

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro I

#### La Scienco de Deduktado

Ŝerlok Holms prenis sian botelon de la angulo de la kamenbreto kaj sian subhaŭtan injektilon el ĝia eleganta maroka skatolo. Per siaj longaj, blankaj, nervozaj fingroj, li ĝustigis la delikatan nadlon, kaj supren volvis sian maldekstran manumon. Dum kelkaj momentoj liaj okuloj restis penseme sur sia tendoneca antaŭbrako kaj pojno markitaj per la cikatretoj de sennombraj injektopikoj. Fine li puŝis la akran pinton al ĝia celo, premis la etan piŝton, kaj kliniĝis en la velurtegitan fotelon kun longa suspiro de kontentiĝo.

Tri fojojn tage dum multaj monatoj mi observis tiun scenon, sed kutimeco ne inklinigis mian menson al ĝia akceptado. Male, tago post tago, pli iritis min vidi tion, kaj mia konscienco ĝenis min nokte, ĉar mi ne sufiĉe kuraĝis por protesti. Denove kaj denove mi faris al mi promeson, ke mi diros al li kion mi pensas pri tio. Sed estis io en la senpasia, indiferenta maniero de mia kompano, kio faris lin la lasta homo, kun kiu oni volus eĉ ŝajni trudemeta. Lia granda talento, lia mastreca maniero, kaj la sperto, kiun mi havis de liaj multaj, eksterordinaraj kvalitoj, ĉiuj faris min cedema kaj malhelpis min alfronti lin.

Tamen, tiun posttagmezon, ĉu pro la vino Beaune, kiun mi trinkis kun la lunĉo, ĉu pro la pli granda iritado kaŭzita de la ekstrema kalmeco de lia konduto, mi subite sentis, ke mi ne plu povas deteni min.

“Kiun hodiaŭ,” mi demandis,—“ĉu morfinon aŭ kokainon?”

Li levis siajn okulojn langvore de la malnova volumo de gotikaj literoj, kiun li ĵus malfermis. “Tio estas kokaino,” li diris,—“sep procenta solvaĵo. Ĉu vi ŝatus provi ĝin?”

“Certe ne,” mi respondis abrupte. “Mia organismo ankoraŭ ne resaniĝis de la afganistana kampanjo. Mi ne povas riski pli multe ŝarĝi ĝin.”

## La Signo de la Kvar

Li ridetis je mia fervoro. “Eble vi pravas, Vatson,” li diris. “Mi supozas, ke ĝia influo estas fizike malbona. Mi trovas ĝin, tamen, tiel transcende stimula kaj klariga al la menso, ke ĝia kromefiko malmulte gravas.”

“Sed konsideru tion!” mi diris sincere. “Kalkulu la koston! Via cerbo eble estas vigligita kaj ekscitita, kiel vi diras, sed la procezo estas patologia kaj morba. Ĉiun fojon ĝi pli ŝanĝas la histojn, kaj tio povas rezulti en ĉiamdaŭranta malforteco. Kaj vi scias kiel nigra estas via reago. Certe la gajno ne kompensas la perdon. Kial vi risku la perdon de tiuj grandaj talentoj, per kiuj vi estis dotita, nur por momenta plezuro. Memoru, ke mi parolas ne nur kiel kamarado al kamarado, sed kiel kuracisto al iu, pri kies fizika stato li certgrade respondecas.”

Li ne ŝajnis ofendita. Male, li kunmetis la fingropintojn kaj apogis la kubutojn sur la brakojn de la fotelo, kiel persono, kiu avidas konversacion.

“Mia menso,” li diris, “ribelas kontraŭ la stagnado. Donu al mi problemojn, donu al mi laboron, donu al mi malfacilegajn kriptogramojn aŭ la plej komplikajn analizojn, kaj mi estas en mia medio. Tiam mi povas forlasi artefartitajn stimulilojn. Sed mi abomenas la enuan rutinon de la ekzisto. Mi avidas mensan ekzaltiĝon. Tial mi elektis mian profesion,— aŭ prefere kreis ĝin, ĉar mi estas la sola en la mondo.”

“Ĉu la sola neoficiala detektivo?” mi diris, levante la brovojn.

“La sola neoficiala konsultanta detektivo,” li respondis. “Mi estas la fina kaj plej alta tribunalo de apelacio en detektado. Kiam Gregson aŭ Lestrade aŭ Athelney Jones malorientiĝas—kio estas, parenteze, ilia normala stato—oni transdonas la aferon al mi. Mi ekzamenas la datumojn kiel spertulo, kaj eldonas specialistan opinion. Mi tute ne pretendas esti la solvinto de tiaj kazoj. Mia nomo ne aperas en ĵurnalo. La laboro mem, la plezuro de trovado de kampo por miaj specialaj talentoj, estas mia plej alta kompenso. Sed vi mem havis oportunon observi miajn labormetodojn en la kazo de Jefferson Hope.”

## La Signo de la Kvar

“Jes ja,” diris mi tutkore. “Nenio min impresis tiel multe en mia tuta vivo. Mi eĉ rakontis ĝin en malgranda broŝuro kun la iom fantazia titolo ‘Studo en Skarlato.’ ”

Li kapneis malfeliĉe. “Mi fluglegis ĝin,” diris li. “Sincere, mi ne povas gratuli vin pro ĝi. Detektado estas, kaj devas esti, preciza scienco, kaj oni devas trakti ĝin en la sama senemocia maniero. Vi penis aldoni al ĝi romantikan nuancon, kio produktis efekton similan al la enkondukado de historio pri amo aŭ la forkuro de geamantoj en la kvinan propozicion de Eŭklido.”

“Sed la amafero estis tie,” mi protestis. “Mi ne povis ŝanĝi la faktojn.”

“Kelkaj faktoj devas esti subpremitaj, aŭ almenaŭ oni devas observi certan senton de ĝustaj proporcioj en ilia traktado. La sola menciinda punkto en la kazo estis la kurioza analiza rezonado de efikoj al kaŭzoj, per kiu mi sukcesis malimpliki ĝin.”

Ĝenis min tiu kritiko de verko specife konceptita por plaĉi al li. Mi ankaŭ konfesas, ke iritis min la egoismo, kiu ŝajnis postuli, ke ĉiu frazo de la broŝuro traktu liajn propajn agadojn. Pli ol unu fojon, dum la jaroj, kiam mi loĝis kun li en Strato Baker, mi observis, ke malgranda vanteco kuŝas sub la kvieta kaj didakta konduto de mia kompano. Mi ne komentis, tamen. Mi sidis zorgante pri mia vundita kruro. Indiĝena kuglo trapasis tra ĝi antaŭ longe, kaj, kvankam tio ne malhelpis mian piediradon, ĝi doloris al mi senĉese ĉiam, kiam ŝanĝiĝis la vetero.

“Mia agado etendiĝis al la kontinento lastatempe,” diris Holms, postio, plenigante sian malnovan erik-radikan pipon. “Konsultis min pasintsemajne François Le Villard, kiu, kiel vi probable scias, komencas elstari en la franca detektiva servo. Li havas la rapidan intuicion de la keltoj, sed mankas al li la amplekson de preciza scio, kio estas esenca al la pli alta evoluigado de lia arto. La kazo koncernis testamenton, kaj havis kelkajn interesajn punktojn. Mi povis direkti lin al du paralelaj kazoj, unu en Riga en 1857, kaj unu en Saint Louis en 1871, kiuj sugestis al li la ĝustan solvon. Jen la letero, kiun mi ricevis hodiaŭ matene dankanta pro mia helpo.” Dum li parolis, li pasigis al mi ĉifitan folion de fremda leterpapero. Mi ekrigardis ĝin, kaj vidis abundon da admiraj

## La Signo de la Kvar

rimarkoj, kiel “magnifiques,” “coup-de-maîtres,” kaj “tours-de-force,” ĉiuj elmontrantaj la ardan admiron de la franco.

“Li parolas kiel lernanto al sia profesoro,” diris mi.

“Li tro alte taksas mian helpon,” diris Ŝerlok Holms. “Li havas konsiderindajn talentojn. Li posedas du el la tri kvalitoj necesaj por ideala detektivo. Li havas la kapablon por observado kaj por deduktado. Nur mankas al li la scio; kaj tio eble venos kun la tempo. Li nun tradukas miajn etajn verkojn en la francan.”

“Viajn verkojn?”

“Ho, ĉu vi ne sciis?” li kriis ridante. “Jes, mi kulpas pri kelkaj monografioj. Ili traktas teknikajn temojn. Jen unu el ili, ekzemple, titolita “Pri la Distingado inter Cindroj de Diversaj Tabakoj.” En ĝi mi citas cent kvardek formojn de cigar-, cigared-, kaj pip-tabako, kun koloraj platoj ilustrantaj la diferencon de la cindro. Tio estas punkto, kiu konstante aperas en krimaj procesoj, kaj kiu estas foje treege grava indico. Se oni povas definitive diri, ekzemple, ke iu murdo estis farita de individuo fumanta hincan cigaron *lunkah*, tio evidente malgrandigas la kampon de serĉado. Al la okulo de spertulo, estas tiel multe da diferenco inter la nigra cindro de cigaro *trihonoplio* kaj la blanka lanugo de cigaro *bird-okulo*, kiel inter brasiko kaj terpomo.”

“Vi havas eksterordinaran talenton por detaletoj,” mi rimarkis.

“Mi rekonas ilian gravecon. Jen mia monografio pri la spurado de piedsignoj, kun kelkaj rimarkoj pri la uzado de pariza gipso por konservi la premsignojn. Jen ankaŭ kurioza eta verko pri la efiko de metioj sur la formo de la mano, kun litografajoj de la manoj de ardeztegmentistoj, maristoj, korktranĉistoj, kompostistoj, teksistoj, kaj diamantpoluristoj. Tio estas tre grava temo al scienca detektivo,—precipe en kazoj de neidentigitaj kadavroj, aŭ la malkovrado de la historio de krimuloj. Sed mi enuigas vin per mia ŝatokupo.”

“Tute ne,” mi respondis sincere. “Tio interesas min tre multe, precipe ĉar mi havis oportunon observi kiel vi aplikas ĝin en la praktiko. Sed vi

## La Signo de la Kvar

ĵus parolis pri observado kaj deduktado. Certe la unua iagrade implicas la alian.”

“Nu, ne vere,” li respondis, apogiĝante komforte en sia fotelo, kaj sendante supren dikajn, bluajn fumkronojn el sia pipo. “Ekzemple, observado montras al mi, ke vi vizitis la poŝtoŝtacion en Strato Wigmore hodiaŭ matene, sed deduktado sciigas al mi, ke, kiam vi estis tie, vi sendis telegramon.”

“Prave!” diris mi. “Prave pri ambaŭ punktoj! Sed mi devas konfesi, ke mi ne vidas kiel vi alvenis al tiu scio. Tio estis subita impulso miaparte, kaj mi ne menciis ĝin al iu ajn.”

“Tio estas la simpleco mem,” li rimarkis, ridklukante je mia surprizo,— “tiel absurde simpla, ke klarigo estas superflua. Tamen, ĝi eble servos por difini la limojn inter observado kaj deduktado. Observado diras al mi, ke vi havas iomete da ruĝeca ŝimo fiksita al via instepo. Antaŭ la oficejo de Strato Wigmore, oni delevis la pavimon kaj disĵetis teron, kiu kuŝas tiel, ke estas malfacile eviti tretadon sur ĝi, kiam oni eniras. Tiu tero havas tiun ruĝecan nuancon, kiu troviĝas, laŭ mia scio, nenie alie en la najbarejo. Tio estas observado. La resto estas deduktado.”

“Kiel do vi deduktis la telegramon?”

“Nu, kompreneble mi sciis, ke vi ne skribis leteron, ĉar mi sidis kontraŭ vi la tutan matenon. Ankaŭ mi vidas en via malfermita skribtablo tie, ke vi havas folion da poŝtmarkoj kaj dikan faskon da poŝtkartoj. Por kio alia vi povus iri al poŝtoŝtacio do, krom sendi telegramon? Eliminu ĉiujn aliajn eblecojn, kaj tio, kio restas, devas esti la vero.”

“En ĉi tiu kazo, certe estas tiel,” mi replikis post iomete da pensado. “Tio estas, kiel vi diras, treege simpla. Ĉu vi pensus, ke mi estas impertinenta, se mi metus viajn teoriojn al pli severa provo?”

“Male,” li respondis, “tio farus duan dozon de kokaino nenecesa. Mi estus tre kontena ekzameni ian ajn problemon, kiun vi prezentos al mi.”

“Mi aŭdis vin diri, ke estas malfacile por persono uzi objekton ĉiutage sen lasi sur ĝi la spuron de sia individueco, tiel ke spertula observanto

## La Signo de la Kvar

povas legi ĝin. Jen horloĝo kiun mi lastatempe ekposedis. Ĉu vi kompleksus doni al mi opinion pri la karaktero kaj kutimoj de la antaŭa posedanto?

Mi donis al li la horloĝon kun malgranda sento de amuzo en la koro, ĉar mi pensis, ke la provo estas neebla. Mi intencis, ke tio estu leciono kontraŭ la iom dogma tono, kiun li kutime uzis. Li pesis la horloĝon en la mano, rigardis atente la ciferplaton, malfermis la malantaŭon, kaj ekzamenis la mekanismon, unue per la nudaj okuloj kaj poste per potenca konvekso lenso. Mi apenaŭ povis eviti rideton je lia malkontenta vizaĝo, kiam li fine klakfermis la kovrilon kaj redonis ĝin al mi.

“Apenaŭ estas datumoj,” li rimarkis. “La horloĝo estis purigita lastatempe, kaj tio rabas de mi la plej sugestajn faktojn.”

“Vi pravas,” mi respondis. “Oni purigis ĝin antaŭ sendi ĝin al mi.” En mia koro, mi akuzis mian kompanon pri proponado de treege laman senkulpigilon por kaŝi sian malsukceson. Kiajn datumojn li povus atendi de nepurigita horloĝo?

“Kvankam nekontentiga, mia esploro ne estis tute senrezulta,” li diris, fikse rigardante la plafonon per revemaj, senesprimaj okuloj. “Por via eventuala korektado, mi dirus, ke la horloĝo apartenis al via pliaĝa frato, kiu heredis ĝin de sia patro.”

“Tion vi konstatas, sendube, de la H.W. sur la malantaŭo?”

“Ĝuste. La W. sugestas vian propran nomon. La aĝo de la horloĝo estas preskaŭ kvindekjara, kaj la inicialoj estas tiel malnovaj kiel la horloĝo: do ĝi estis farita por la pasinta generacio. Juvelojn kutime heredas la plej aĝa filo, kaj li plej probable havos la nomon de sia patro. Via patro, se mi bone memoras, mortis antaŭ multaj jaroj. Ĝi estis do, en la manoj de via plej aĝa frato.”

“Prave, ĝis nun,” diris mi. “Ĉu ion alian?”

“Li estis homo kun malordaj kutimoj,—malordema kaj senzorga. Li havis bonajn perspektivojn, sed li malŝparis siajn ŝancojn, vivis iom

## La Signo de la Kvar

longe en malriĉeco, foje kun mallongaj periodoj de prospero, kaj fine, komencinte drinki, li mortis. Jen ĉio, kion mi povis konstati.”

Mi saltis el mia seĝo kaj lamis senpacience ĉirkaŭ la ĉambro kun konsiderinda amareco en la koro.

“Tio estas malinda de vi, Holmes,” mi diris. “Mi neniam estus kredinta, ke vi falos tiel malsupren. Vi esploris la historion de mia malfeliĉa frato, kaj nun vi ŝajnigas, ke vi deduktis tiun scion en ia fantazia maniero. Vi ne povas atendi, ke mi kredos, ke vi legis tion de malnova horloĝo! Tio estas malĝentila, kaj, por paroli klare, tio estas pli taŭga al ĉarlatano.”

“Mia kara doktoro,” li diris bonkore, “bonvolu akcepti mian pardonpeton. Konsiderante la aferon kiel abstraktan problemon, mi forgesis, ke tio eble estas persona kaj doloriga al vi. Mi certigas vin, tamen, ke mi ne eĉ sciis, ke vi havas fraton, antaŭ ol vi donis al mi la horloĝon.”

“Kiel en la nomo de ĉio mirinda vi akiris tiujn faktojn do? Ĉar ili estas absolute ĝustaj en ĉiu detalo.”

“Ho, tio estas bona ŝanco. Mi limigis min al dirado de kio estas plej probabla. Mi tute ne atendis, ke ĉio estos tiel ĝusta.”

“Sed tio ne estas nura konjektado?”

“Ne, ne: mi neniam konjektas. Tio estas katastrofa kutimo,—ĝi detruas la kapablon por logiko. Tio, kio ŝajnas al vi stranga, estas tia nur ĉar vi ne sekvas mian pensadon, nek observas la malgrandajn faktojn, de kiuj dependas grandaj inferencoj. Ekzemple, mi komencis dirante, ke via frato estas senzorga. Kiam oni observas la malsupran parton de la horloĝkovrilo, oni rimarkas, ke ĝi estas ne nur kavetigita en du lokoj, sed ĝi estas ankaŭ tute gratita kaj markita pro la kutimo teni aliajn malmolajn objektojn, kiel monerojn aŭ ŝlosilojn, en la sama poŝo. Certe, ne estas granda bravaĵo supozi, ke viro, kiu traktas kvindek-ginean horloĝon tiel senĝene estas senzorgemulo. Nek estas fantazie inferenci, ke homo, kiu heredas unu artiklon tiel valoran, estas sufiĉe bone provizita en aliaj rilatoj.”



## La Signo de la Kvar

Mi kapjesis por montri, ke mi sekvas lian rezonadon.

“Estas tre ofta kutimo de lambardistoj en Anglujo, kiam ili akceptas horloĝon, gravuri la numeron de la etikedo per pinglopinto sur la internon de la kovrilo. Tio estas pli oportuna ol alligi etikedon, kaj ne estas risko, ke la numero estos perdita aŭ misalligita. Kaj estas ne malpli ol kvar tiaj numeroj videblaj per mia lenso sur la interno de ĉi tiu kovrilo. Inferenco: via frato ofte havis financajn malfacilaĵojn. Dua inferenco: li foje havis periodojn de subita prospero, alie li ne povus reaĉeti la garantiaĵon. Fine, mi petas, ke vi rigardu la internan platon, kie estas la ŝlosiltruo. Rigardu la milojn da grataĵoj ĉirkaŭ la truon,—markoj kie la ŝlosilo glitiĝis. Ĉu vi kredas, ke la ŝlosilo de malebria viro povus fari tiujn markojn? Sed ili neniam mankos en la horloĝo de ebrulo. Li streĉas la risorton nokte, kaj li postlasas tiujn markojn per sia malfirma mano. Kia mistero estas en tio?”

“Tio estas tiel klara, kiel la taglumo,” mi respondis. “Mi bedaŭras pri mia maljusteco al vi. Mi devis havi pli da fido pri viaj mirindaj kapabloj. Ĉu mi rajtas demandi ĉu vi nun havas iajn profesiajn esplorojn?”

“Neniajn. Tial la kokaino. Mi ne povas vivi sen laboro por mia cerbo. Kian alian motivon mi havas por vivi? Staru ĉi tie ĉe la fenestro. Ĉu la mondo iam estis pli malgaja, malfeliĉa, kaj neproduktiva? Vidu kiel la flava nebulo kirlas laŭ la strato kaj drivas trans la grizbrunaj domoj. Kio povus esti pli senespere ordinara kaj materia. Kiel servas talentoj, doktoro, se ne estas kampo, al kiu oni apliku ilin? La krimo estas odrinara, la ekzistado estas ordinara, kaj en la mondo ne estas loko por io, kio ne estas ordinara.”

Mi malfermis la buŝon por repliki al tiu plendego, sed en tiu momento estis vigla frapo ĉe la pordo kaj nia luantino envenis kun karteto sur latuna pleto.

“Junulino demandas pri vi, sinjoro,” ŝi diris, parolante al mia kompano.

“F-no Mary Morstan,” li ellegis. “Hm! Mi tute ne memoras la nomon. Diru al la junulino, ke ŝi envenu, S-no Hudson. Ne iru, doktoro. Mi preferus, ke vi restu.”

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro II

#### La Prezento de la Kazo

F-no Morstan envenis en la ĉambbron kun firma paŝo kaj ekstere trankvila mieno. Ŝi estis blonda junulino, malgranda, delikata, kun belaj gantoj, kaj vestita laŭ preskaŭ perfekta gusto. Estis, tamen, ordinareco kaj simpleco en ŝia vesto, kiu sugestis limigitajn rimedojn. La robo estis grizece bruna, sen garnaĵoj aŭ pasamento, kaj ŝi portis malgrandan turbanon de la sama malhela koloro, reliefigita nur per ereto de blanka plumo ĉe la flanko. Ŝiaj trajtoj ne estis regulaj, kaj la koloro de ŝia haŭto ne estis bela, sed ŝia esprimo estis dolĉa kaj amikeca, kaj ŝiaj grandaj, bluaj okuloj estis aparte spiritaj kaj afablaj. Kun sperto de virinoj, kiu etendiĝas trans multaj nacioj kaj tri kontinentoj, mi neniam rigardis vizaĝon, kiu pli klare promesis delikatan kaj senteman karakteron. Mi ne povis ne observi dum ŝi sidiĝis en la seĝon, kiun Ŝerlok Holms proksimigis al ŝi, ke ŝia lipo tremas, ŝia mano tremetas, kaj ŝi elmontras ĉiun signon de intensa interna malkvieteco.

“Mi venis al vi, S-ro Holms,” ŝi diris, “ĉar vi iam helpis mian dungintinon, S-no Cecil Forrester, malimpliki malgrandan hejman komplikajon. Ŝi estis tre impresita de via bonkoreco kaj talento.”

“S-no Cecil Forrester,” li ripetis pensante. “Mi kredas, ke mi faris al ŝi ian malgrandan servon. La kazo estis, tamen, laŭ mia memoro, tre simpla.”

“Al ŝi, ĝi ne ŝajnis simpla. Sed almenaŭ oni ne povas diri tion pri mia. Mi apenaŭ povus imagi ion pli strangan, pli absolute neklarigeblan, ol la situacio, en kiu mi troviĝas.”

Holms kunfrotis la manojn, kaj liaj okuloj brilis. Li kliniĝis antaŭen en sia fotelo kun esprimo de eksterordinara koncentriĝo sur la akraj, falksimilaj trajtoj. “Prezentu vian kazon,” diris li, kun abrupta, serioza tono.

Mi sentis, ke mia ĉeesto estas embarasa. “Vi certe pardonos min,” mi diris, leviĝante de mia seĝo.

## La Signo de la Kvar

Je mia surprizo, la junulino levis gantitan manon por reteni min. “Se via amiko bonvolos resti, li eble faros netakseblan servon al mi.”

Mi refalis en mian seĝon.

“En malmultaj vortoj,” ŝi daŭrigis, “la faktoj estas jenaj. Mia patro estis oficiro en hinduja regimento, kaj li resendis min al Anglujo, kiam mi estis malgranda knabino. Mia patrino estis morta, kaj mi ne havis parencojn en Anglujo. Oni metis min, tamen, en komfortan pensionlernejon en Edinburgh, kaj tie mi restis ĝis mi estis deksepjara. En la jaro 1878, mia patro, kiu estis la plej malnova kapitano de sia regimento, ricevis forirpermeson por dekdu monatoj kaj venis hejmen. Li telegrafis min de Londono, ke li alvenis sekura, kaj indikis, ke mi tuj venu, dirante, ke lia adreso estas Hotelo Langham. Lia mesaĝo, laŭ mia memoro, estis plena de bonkoreco kaj amo. Alveninte al Londono, mi veturis al Langham, kaj oni informis min, ke Kapitano Morstan gastas tie, sed li eliris la pasintan nokton kaj ne revenis. Mi atendis la tutan tagon sen novaĵoj pri li. Tiun nokton, laŭ la konsilo de la hotelestro, mi komunikis kun la polico, kaj la sekvantan matenon mi reklamis en ĉiuj ĵurnaloj. Niaj esploroj ne havis rezultojn; kaj de tiu tago al hodiaŭ mi aŭdis nenion pri mia malfeliĉa patro. Li venis hejmen kun la koro plena de espero, por trovi iom da paco, iom da komforto, kaj anstataŭ tio—” Ŝi metis la manon sur la gorĝon, kaj strangola plorĝemo finis la frazon.

“La dato?” demandis Holms, malfermante sian kajeron.

“Li malaperis la 3an de decembro, 1878,—antaŭ preskaŭ dek jaroj.”

“Lia bagaĝo?”

“Restis en la hotelo. Ni trovis nenion en ĝi, kio servus kiel indico,—kelkajn vestojn, kelkajn librojn, konsiderindan nombron de kuriozaĵoj de la Insuloj Andaman. Li estis la oficiro super la gardistoj de la prizono tie.”

“Ĉu li havis amikojn en la urbo?”

“Nur unu, pri kiu ni scias,—Majoro Sholto, de lia propra regimento, la 34a Infanterio de Bombajo. La majoro emeritiĝis iomete antaŭ tiu

## La Signo de la Kvar

tempo, kaj loĝis en Upper Norwood. Kompreneble ni komunikis kun li, sed li ne eĉ sciis, ke lia kunoficiro estas en Anglujo.”

“Stranga kazo,” rimarkis Holms.

“Mi ankoraŭ ne priskribis al vi la plej strangan parton. Antaŭ proksimume ses jaroj—por paroli precize—la 4an de majo, 1882—reklamo aperis en *Times* petanta la adreson de F-no Mary Morstan kaj diranta, ke estus avantaĝe al ŝi respondi. Oni ne inkludis nomon aŭ adreson. En tiu tempo mi ĵus komencis en la servo de la familio de S-no Cecil Forrester kiel gubernistino. Laŭ ŝia konsilo, mi publikigis mian adreson en la kolumno de personaj anoncoj. La saman tagon alvenis poŝte malgranda, kartona skatolo adresita al mi, en kio mi trovis tre grandan kaj brilan perlon. Ne enestis eĉ unu vorto skribita. De tiam, ĉiun jaron je la sama dato aperis simila skatolo entenanta unu similan perlon, sen iu ajn indico pri la sendinto. Spertulo diris, ke ili estas de rara vario kaj konsiderinde valoraj. Vi mem povas vidi, ke ili estas tre belaj.” Ŝi malfermis platan skatolon dum ŝi parolis, kaj montris al mi ses el la plej belaj perloj, kiujn mi iam vidis.

“Via historio estas tre interesa,” diris Ŝerlok Holms. “Ĉu io alia okazis al vi?”

“Jes, ĝuste hodiaŭ. Tial mi venis al vi. Hodiaŭ matene mi ricevis leteron, kiun vi eble mem legos.”

“Dankon,” diris Holms. “Ankaŭ la koverton, mi petas. Poŝtmarko: Londono, sudorienta poŝtozono. Dato: 7a de julio! Hm! Vira polekso-spuro sur la angulo,—probable de la poŝtisto. Papero de la plej alta kvalito. Koverto kostas ses pencoj por fasko. Homo elektema pri siaj papervaroj. Nenia adreso. ‘Estu ĉe la tria piliero de dekstre ekster Teatro Lyceum hodiaŭ nokte je la sepa. Se vi estas malfidema, venigu du amikojn. Vi estas mistraktita virino, kaj vi havos justecon. Ne venigu la policon. Se vi faros tion, ĉio estos vana. Via nekonata amiko.’ Nu, tio estas vere bela, eta mistero. Kion vi intencas fari, F-no Morstan?”

“Precize tion mi volis demandi de vi.”

## La Signo de la Kvar

“Do ni certe iros. Vi kaj mi kaj—jes, kompreneble, D-ro Watson estas ideala. Via korespondanto diris ‘du amikoj’. Li kaj mi jam kunlaboris antaŭe.”

“Sed ĉu li venos?” ŝi demandis, kun io alloga en sia voĉo kaj mieno.

“Mi estos fiera kaj feliĉa,” diris mi fervore, “se mi povos servi vin iel ajn.”

“Vi estas ambaŭ tre bonkoraj,” ŝi respondis. “Mi vivis izole kaj mi ne havas amikojn, de kiuj mi povus peti helpon. Sufiĉos se mi estos ĉi tie je la sesa, mi supozas?”

“Vi ne devas veni pli malfrue,” diris Holms. “Estas unu alia punkto, tamen. Ĉu ĉi tiu skribmaniero estas la sama, kiel tiu de la adresoj sur la perloskatoloj?”

“Jen mi havas ilin,” ŝi respondis prezentante ses-sep foliojn de papero.

“Vi certe estas ideala kliento. Vi havas la ĝustan intuicion. Ni vidu do.” Li dismetis la paperojn sur la tablo, kaj flugrigardis jen unu jen alian. “La skribmaniero estas maskita, krom en la letero,” li diris post nelonge, “sed ne povas esti dubo pri la aŭtoro. Vidu kiel la vigla ‘y’ elstaras, kaj la volvaĵeton sur la fina ‘s’. Ili estas sendube faritaj de la sama persono. Mi ne volus sugesti falsan esperon, F-no Morstan, sed ĉu estas ia simileco inter tiu skribmaniero kaj tiu de via patro?”

“Ili ne povus esti pli malsimilaj.”

“Mi atendis, ke vi diros tion. Ni estos pretaj por vi je la sesa do. Bonvolu permesi al mi teni la paperojn. Mi eble esploros la aferon antaŭ tiam. Estas nur la dua kaj duono. *Au revoir*, do.”

“*Au revoir*,” diris nia vizitantino, kaj direktante viglan kaj amikecan rigardon al ĉiu el ni, ŝi reprenis la skatolon de perloj kaj forhastis. Starante ĉe la fenestro, mi rigardis ŝin rapide irantan laŭ la strato, ĝis la griza turbano kaj blanka plumo estis nur makulo en la malgaja homamaso.

## La Signo de la Kvar

“Kiel loga virino!” mi elkriis turnante min al mia kompano.

Li jam rebruligis sian pipon, kaj malantaŭen kliniĝis kun duonfermitaj palpebroj. “Ĉu?” li diris langvore. “Mi ne observis tion.”

“Vi vere estas aŭtomato,—kalkulmaŝino!” mi kriis. “Foje estas io absolute nehoma en vi.”

Li ridetis afable. “Estas nepre plej grave,” diris li, “ne permesi, ke personaj kvalitoj influu la juĝadon. Kliento al mi estas nur unuo,—faktoro en problemo. La emociaj kvalitoj estas antagonismaj al klara rezonado. Mi certigas vin, ke la plej alloga virino, kiun mi konis, estis pendumita, ĉar ŝi venenis tri etajn infanojn por tiel ricevi monon de asekuro. Kaj la plej malalloga viro, kiun mi konas, estas filantropo, kiu elspezis preskaŭ kvaronon de miliono por la malriĉuloj de Londono.”

“Tamen, en ĉi tiu kazo—”

“Mi neniam faras esceptojn. Escepto malpruvas la regulon. Ĉu vi iam studis skribmanierojn rilate al karaktero? Kion vi pensas pri la skibaĉado de ĉi tiu ulo?”

“Ĝi estas legebla kaj regula,” mi respondis. “Homo de negocecaj kutimoj kaj iom forta karaktero.”

Holms kapneis. “Rigardu liajn longajn literojn,” li diris. “Ili apenaŭ elstaras super la grego de ordinaruloj. Tiu *d* povus esti *a*, kaj tiu *l* povus esti *e*. Homoj kun forta karaktero ĉiam diferencigas siajn longajn literojn, eĉ se ili skribas mallegeble. Estas hezitemo en liaj *k*-oj kaj malalta memestimo en liaj majuskuloj. Mi eliras nun. Mi devas fari kelkajn konsultojn. Permesu al mi rekomendi ĉi tiun libron,—unu el la plej rimarkindaj iam verkitaj. Ĝi estas ‘La Martiriĝo de la Homo’ de Winwood Reade. Mi revenos post unu horo.”

Mi sidis ĉe la fenestro kun la volumo en miaj manoj, sed miaj pensoj estis malproksime de la spekulativadoj de la aŭtoro. Mia menso flugis al tiu lastatempa vizitintino,—ŝiaj ridetoj, la profundaj, riĉaj tonoj de ŝia voĉo, la stranga mistero pendanta super ŝia vivo. Se ŝi estis deksepjara je la malapero de sia patro, ŝi devas esti nun dudeksepjara,—dolĉa aĝo,

## **La Signo de la Kvar**

kiam la juneco jam perdis sian sen-aplombecon, kaj fariĝis iom pli prudenta pro la spertado de la vivo. Tiel mi sidis kaj meditis, ĝis pensoj tiel danĝeraj envenis en mian kapon, ke mi forhastis al mia skribtablo kaj furioze plongis en la plej lastan traktaton pri patologio. Kiel mi, arnea kuracisto kun malforta kruro kaj eĉ pli malforta bankkonto, kuraĝus pensi pri tiaj aferoj? Se mia estonteco estas nigra, certe estis pli bone alfronti ĝin kiel viro, anstataŭ peni plibriligi ĝin per nura vaglumo de la imagado.

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro III

#### Serĉante Solvon

Jam estis la kvina kaj duono, kiam Holms revenis. Li estis kontenta, avida, kaj en bonega humoro,—animstato, kiu alternis en li kun periodoj de la plej nigra deprimiĝo.

“Ne estas granda mistero en tiu afero,” li diris, prenante la tason da teo, kiun mi elverŝis por li. “La faktoj ŝajnas enlasi nur unu klarigon.”

“Kion! Ĉu vi jam solvis ĝin?”

“Nu, tio estus diri tro multe. Mi malkovris sugestan fakton, nenion pli. Ĝi estas, tamen, *tre* sugesta. Nur mankas la aldono de la detaloj. Mi eltrovis per konsultado de la arkivoj de *Times*, ke Majoro Sholto, de Upper Norwood, antaŭe de la 34a Infanterio de Bombajo, mortis la 28an de aprilo, 1882.”

“Mi eble estas tre stulta, Holms, sed mi ne sukcesas vidi kion tio sugestas.”

“Ĉu ne? Vi surprizas min. Rigardu la aferon jene do. Kapitano Morstan malaperas. La sola persono en Londono, kiun li povus viziti, estas Majoro Sholto. Majoro Sholto neas, ke li aŭdis, ke Morstan estas en Londono. Post kvar jaroj, Sholto mortas. *Interne de semajno de lia morto*, la filino de Kapitano Morstan ricevas valoran donacon, kiu estas ripetita jaro post jaro, kaj nun kulminas en letero, kiu priskribas ŝin kiel mistraktitan virinon. Al kiu maljustaĵo povas aludi tio, se ne al la senigado je ŝia patro? Kaj kial la donacoj komenciĝus tuj post la morto de Sholto, se ne estas, ke la heredanto de Sholto scias ion pri la mistero kaj volas fari kompenson? Ĉu vi havas alian teorion, kiu kongruas kun la faktoj?”

“Sed kiel stranga kompenso! Kaj kiel strange farita! Ankaŭ, kial li skribus leteron nun, prefere ol antaŭ ses jaroj? Kaj la letero diras, ke ŝi havos justecon. Kian justecon ŝi povas havi? Estas tro multe supozi, ke ŝia patro ankoraŭ vivas. Ne estas alia maljusteco en ŝia kazo, pri kiu mi scias.”



## La Signo de la Kvar

“Estas malfacilaĵoj; certe estas malfacilaĵoj,” diris Ŝerlok Holms penseme. “Sed nia ekspedicio de hodiaŭ nokto solvos ilin ĉiujn. Ha, jen kaleŝo, kaj F-no Morstan estas interne. Ĉu vi pretas? Ni devas iri malsupren do, ĉar jam iom pasis la horo.”

Mi prenis mian ĉapelon kaj mian plej pezan bastonon, sed mi observis, ke Holms prenas sian revolveron el la tirkesto kaj metas ĝin en la poŝon. Estis klare, ke li pensas, ke la laboro de la nokto eble estos serioza.

F-no Morstan estis volvita en malhela mantelo, kaj ŝia esprimema vizaĝo estis serena, sed pala.

Ŝi ne estus virino, se ŝi ne sentus iom da maltrankvileco pri la stranga entrepreno, al kiu ni iras. Sed ŝia memregado estis perfekta, kaj ŝi facile respondis al la malmultaj novaj demandoj, kiujn Ŝerlok Holms faris al ŝi.

“Majoro Sholto estis tre bona amiko de paĉjo,” ŝi diris. “Liaj leteroj estas plenaj je aludoj al la majoro. Li kaj paĉjo komandis la soldatojn en la Insuloj Andaman, do ili estis ofte kune. Parenteze, kurioza papero troviĝis en la skribtablo, kiun neniuj povis kompreni. Mi ne supozas, ke ĝi estas eĉ iomete grava, sed mi pensis, ke eble vi volus vidi ĝin. Tial mi venigis ĝin kun mi. Jen.”

Holms malvolvis la paperon zorge kaj platigis ĝin sur la genuo. Tiam li tre metode ekzamenis ĝin per sia duobla lenso.

“La papero estis fabrikita en Hindujo,” li rimarkis. “Ĝi iam estis alpinglita al tabulo. La diagramo sur ĝi ŝajne estas plano aŭ parto de granda konstruaĵo kun multaj ĉambroj, koridoroj, kaj trairejoj. Ĉe unu punkto estas malgranda kruco en ruĝa inko, kaj super tio estas ‘3.37 de dekstre,’ en paliĝinta krajonskribo. En la dekstra angulo estas kurioza hieroglifo, kiel kvar krucoj en linio kun la brakoj tuŝantaj. Apud tio estas skribita, per tre krudaj kaj mallertaj literoj, ‘La signo de la kvar,— Jonathan Small, Mahomet Singh, Abdullah Khan, Dost Akbar.’ Ne, mi konfesas, ke mi ne vidas kiel ĉi tio rilatas al la afero. Tamen, ĝi estas evidente grava dokumento. Oni zorge tenis ĝin en poŝkajero; ĉar unu flanko estas tiel pura kiel la alia.”

## La Signo de la Kvar

“Ĝi estis en lia poŝkajero, kiam ni trovis ĝin.”

“Zorge konservu ĝin do, F-no Morstan, ĉar ĝi eble helpos nin. Mi komencas suspekti, ke ni eble trovos, ke ĉi tiu afero estas pli profunda kaj pli subtila, ol mi unue supozis. Mi devas rekonsideri miajn ideojn.” Li malantaŭen kliniĝis en la fiakro, kaj mi povis vidi per la sulkiĝo de lia frunto kaj lia vaka rigardo, ke li pensas intense. F-no Morstan kaj mi babilis mallaŭte pri nia ekspedicio kaj ĝia eventuala rezulto, sed nia kompano retenis sian nepenetreblan deteniĝemon ĝis la fino de nia vojaĝo.

Estis septembra vespero, kaj ne estis eĉ la sepa, sed estis malhele dum la tuta tago, kaj nun densa pluveca nebulo kuŝis malalte sur la granda urbo. Kotkoloraj nuboj ŝvebis malfeliĉe super la kotaj stratoj. Laŭ strato Strand, la lampoj estis nur nebulaj makuloj el difuza lumo, kiuj ĵetis malfortan lumrondon sur la ŝliman pavimon. La flava brilego de la montrofenestroj elfluegis en la vaporan aeron, kaj ĵetis malhelan, malklaran radiantecon trans la homoplenaj ĉefvojoj. Al mi, estis io mistera kaj fantomsimila en la senĉesa sinsekvo de vizaĝoj, kiuj flirtis trans tiuj mallarĝaj stangoj el lumo,—vizaĝoj malfeliĉaj kaj feliĉaj, lacegaj kaj gajaj. Kiel la tuta homaro, ili flirtis el la krepusko en la lumon, kaj returne en la krepuskon denove. Mi ne estas facile impresebla, sed la obtuza, peza vespero, kune kun la stranga afero, kiun ni sekvis, kombiniĝis por nervozigi kaj depremi min. Mi povis vidi per la mieno de F-no Morstan, ke ankaŭ ŝi suferas pro la sama sento. Nur Holms povis triumfi super malgravaj influoj. Li tenis sian malfermitan kajeron sur la genuo, kaj de tempo al tempo li skribis ciferojn kaj memorandojn en la lumo de sia poŝlanterno.

Ĉe Teatro Lyceum, la homamasoj estis dikaj ĉe la flankaj enirejoj. Antaŭe konstanta fluo de kabrioletoj kaj kaleŝoj alklakadis, malŝarĝante sin je sia kargo de viroj kun brustotuko kaj virinoj kun ŝalo kaj diamantoj. Ni ĵus atingis la trian pilieron, kie estis nia rendevuejo, kiam malgranda, malhela, vigla viro vestita kiel koĉero ekparolis al ni.

“Ĉu vi estas la personoj, kiuj venas kun F-no Morstan?” li demandis.

“Mi estas F-no Morstan, kaj tiuj du sinjoroj estas miaj amikoj,” diris ŝi.

## La Signo de la Kvar

Li turnis paron de mirinde penetrantaj kaj scivolemaj okuloj al ni. “Pardonu min, fraŭlino,” li diris kun certa obstina tono, “sed oni diris al mi, ke mi petu vin doni al mi vian parolon, ke neniu el viaj kunuloj estas polic-oficiro.”

“Mi donas al vi mian parolon pri tio,” ŝi respondis.

Li faris akran fajfon, je kio stratbubo alkondukis kaleŝon kaj malfermis la pordon. La viro, kiu parolis al ni, supreniris al la veturigejo, dum ni sidigis nin interne. Ni apenaŭ faris tion, kiam la veturigisto vipinstigis siajn ĉevalojn, kaj ni forpafiĝis furioze rapide laŭ la nebulaj stratoj.

La situacio estis kurioza. Ni veturis al nekonata loko, por nekonata tasko. Tamen, nia invito estis aŭ kompleta ruzo,—kio estis neimagebla hipotezo,—aŭ ni havis bonan motivon por pensi, ke gravaj demandoj dependas de nia vojaĝo. La sintenado de F-no Morstan estis tiel rezoluta kaj serena kiel ĉiam. Mi penis gajigi kaj amuzi ŝin per memoroj pri miaj aventuroj en Afganiŝtano; sed, se diri la veron, mi estis tiel ekscitita pri nia situacio kaj tiel scivolema pri nia ircelo, ke miaj rakontoj estis iomete komplikaj. Ĝis hodiaŭ ŝi insistas, ke mi rakontis al ŝi unu emocian anekdoton, en kiu musketo enrigardis en mian tendon en profunda nokto, kaj mi pafis al ĝi per duoblatuba tigrido. En la komenco, mi havis ideon pri la direkto, en kiu ni veturis; sed baldaŭ, pro la rapideco, la nebulo, kaj mia propra limigita scio pri Londono, mi malorientiĝis, kaj sciis nenion, krom ke ni ŝajne iras longan distancon. Ŝerlok Holms neniam konfuziĝis, tamen, kaj murmuris la nomojn dum la fiakro klakadis tra la placoj kaj laŭ diversaj serpentaj flankvojoj.

“Vojo Rochester,” diris li. “Nun Placo Vincent. Nun ni elvenas sur Vojo Ponto Vauxhall. Ni ŝajne iras al la flanko de Surrey. Jes, kiel mi diris. Nun ni estas sur la ponto. Oni povas ekvidetadi la riveron.”

Ni fakte maldaŭre vidis parton de Tamizo kun la lampoj brilantaj sur la larĝa, silenta akvo; sed nia fiakro plurapidis, kaj baldaŭ volviĝis en labirinto de stratoj sur la alia flanko.

## La Signo de la Kvar

“Vojo Wordsworth,” diris mia kompano. “Vojo Priory. Vojeto Lark Hall. Placo Stockwell. Strato Rober. Vojeto Cold Harbor. Ne ŝajnas, ke nia ekspedicio venigas nin al tre laŭmodaj zonoj.”

Efektive, ni alvenis al suspektinda kaj timiga kvartalo. Longaj vicoj de malhelaj, brikaj domoj estis reliefigitaj nur de la kruda, puca brilego de drinkejoj ĉe la anguloj. Poste venis vicoj de duetaĝaj vilaoj, ĉiu kun sia antaŭa miniatura ĝardeno, kaj poste senfinaj vicoj de novaj, brikaj konstruaĵoj,—la monstraj tentakloj, kiujn la giganta urbo etendas en la kamparon. Fine la fiakro haltis antaŭ la tria domo en nova dombloko. Neniu el la aliaj domoj estis enloĝataj, kaj tiu, ĉe kiu ni haltis, estis tiel malluma kiel ĝiaj najbaroj, krom ke estis unu lumeto en la fenestro de la kuirejo. Kiam ni frapis sur la pordo, tamen, la pordo estis tuj malfermegita de hindua servisto vestita en flava turbano, blanka, malstrikta vesto, kaj flava zonskarpo. Estis io strange malkongrua en tiu orienta figuro kadrita en la ĉiutaga pordo de triaklasa domo en la antaŭurbo.

“La sahibo atendas vin,” diris li, kaj eĉ dum li parolis, venis akuta, akra voĉo de iu interna ĉambro. “Venigu ilin al mi, *khitmutgar*,” ĝi kriis. “Venigu ilin rekte al mi.”

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro IV

#### La Rakonto de la Kalvulo

Ni sekvis la hindon laŭ malpura koridoro, malbone lumita kaj pli malbone meblita, ĝis li venis al pordo dekstre, kiun li malfermegis. Brilego de flava lumo fluis sur nin, kaj en la mezo de la brilego staris malgranda viro kun tre alta kapo, franĝo de rigidaj ruĝaj haroj ĉirkaŭ tio, kaj kalva, brila kranohaŭto, kiu elstaris super la hararo, kiel montofirsto super abiaro. Li kuntordis siajn manojn dum li staris, kaj liaj trajtoj konstante moviĝis, jen ridante, jen grimacante, sed neniam eĉ dum momento en ripozo. La naturo dotis lin per pendanta lipo, kaj tro videbla vico de flavaj kaj neregulaj dentoj, kiujn li strebis sensukcese kaŝi per konstanta pasigado de la mano trans la malsupra parto de sia vizaĝo. Malgraŭ lia tro evidenta kalveco, li donis impreson de juneco. Fakte li ĵus tridekjariĝis.

“Je via servo, F-no Morstan,” li daŭre ripetis per penetranta, akuta voĉo. “Je via servo, sinjoroj. Bonvolu paŝi en mian sanktejon. Malgranda loko, fraŭlino, sed meblita laŭ mia gusto. Oazo de arto en la ululanta dezerto de Suda Londono.”

Ni estis ĉiuj konsternitaj de la aspekto de la ĉambro, en kiun li invitis nin. En tiu mallaŭdinda domo, ĝi ŝajnis tiel maltaŭga, kiel diamanto de la plej alta kvalito en muntumo el latuno. La plej riĉaj kaj glaceaj kurtenoj kaj gobelinoj kovris la murojn, kuntiritaj tie kaj tie por videbliĝi ian riĉe enkadritan pentraĵon aŭ orientan vazon. La tapiŝo, sukcen- kaj nigra-kolora, estis tiel mola kaj dika, ke la piedo sinkis en ĝin agrable, kiel en bedon de musko. Du grandaj tigro-peltoj etenditaj sur ĝi pliigis la impreson de orienta lukseco, al kio kontribuis ankaŭ enorma nargileo, kiu staris sur mato en la angulo. Lampo kun formo de arĝenta kolombo pendis de preskaŭ nevidebla ora fadeno en la mezo de la ĉambro. Dum ĝi brulis, ĝi plenigis la aeron per subtila kaj aromaodoro.

“S-ro Thaddeus Sholto,” diris la malgranda viro, ankoraŭ moviĝante kaj ridetante. “Tio estas mia nomo. Vi estas F-no Morstan, kompreneble. Kaj ĉi tiuj sinjoroj—”

## La Signo de la Kvar

“Ĉi tiu estas S-ro Ŝerlok Holms, kaj tiu esta D-ro Watson.”

“Ĉu kuracisto?” kriis li tre ekscitite. “Ĉu vi havas vian stetoskopon? Ĉu mi rajtus peti—ĉu vi komplezus? Mi havas gravajn dubojn pri mia mitrala valvo, se vi komplezus. La aorta estas tute fidinda, sed mi ŝatus vian opinion pri la mitrala.”

Mi aŭskultumis lian koron, kiel li petis, sed mi trovis nenian misfunkcion, krom ke li estas en ekstazo de timo, ĉar li tremis de la kapo al la piedo. “Ĝi ŝajnas normala,” mi diris, “Vi ne havas motivon por maltrankvilo.”

“Vi pardonos mian maltrankvilon, F-no Morstan,” li rimarkis gaje. “Mi estas malbonsana, kaj delonge mi suspektis tiun valvon. Feliĉigas min aŭdi, ke miaj suspektoj estas senbazaj. Se via patro ne estus tro streĉinta sian koron, li eble vivus nun.”

Mi volis frapi lian vizaĝon, ĉar mi estis tiel kolerigita de lia kruela kaj nenecesa aludo al tiel delikata temo. F-no Morstan sidiĝis, kaj ŝia vizaĝo paliĝis ĝis la lipoj. “Mi sciis en mia koro, ke li estas morta,” diris ŝi.

“Mi povas doni al vi la ĉiujn informojn pri tio,” diris li, “kaj, krom tio, mi povas doni al vi justecon. Kaj mi faros tion, malgraŭ kio ajn diros frato Bartholomew. Mi estas tre kontenta, ke viaj amikoj estas ĉi tie, ne nur kiel via eskorto, sed ankaŭ kiel atestantoj pri tio, kion mi faros kaj diros. Ni tri povos kuraĝe alfronti fraton Bartholomew. Sed ne intervenu eksteruloj,—neniuj policianoj aŭ funkciuloj. Ni povas aranĝi ĉion inter ni, sen intervenoj. Nenio ĝenus fraton Batholomew pli ol publikigado.” Li sidiĝis sur malalta kanapo kaj palpebrumis al ni per siaj malfortaj, akvoplenaj, bluaj okuloj.

“Miaflanke,” diris Holms, “tio, kion vi elektos diri al ni restos inter ni.”

Mi kapjesis por montri mian konsenton.

“Tio estas bona! Tio estas bona!” diris li. “Ĉu vi ŝatus glason da vino *chianti*, F-no Morstan? Aŭ da *tokaja*? Mi ne tenas aliajn vinojn. Ĉu mi malfermu botelon? Ĉu ne? Nu, tiuokaze, mi fidas, ke vi ne kontraŭas tabakfumon, la mildan, balzaman odoron de orienta tabako. Mi estas

## La Signo de la Kvar

iomete nervoza, kaj mi trovas, ke mia nargileo estas valorega sedativo.” Li aplikis kandleton al la granda bovlo, kaj la fumo bobelis gaje tra la roz-akvo. Ni tri sidis en duonrondo, kun la kapoj antaŭenigitaj, kaj la mentonoj sur la manoj, dum la stranga, ekmoviĝema vireto, kun la alta, brila kapo, fumis maltrankvile en la mezo.

“Kiam mi unue decidis komuniki kun vi pri ĉi tio,” diris li, “mi povus esti doninta al vi mian adreson, sed mi timis, ke vi ignoros mian peton kaj venigos malagrablajn personojn kun vi. Mi prenis al mi do la liberecon fari rendevuon, tiel ke mia servisto Williams povos antaŭe vidi vin. Mi komplete fidas lian diskretecon, kaj mi ordonis, ke li ne antaŭeniru en la afero, se li ne estos kontentigita. Vi pardonos pri tiuj antaŭzorgoj, sed mi estas viro kun deteniĝemaj, kaj mi eble eĉ dirus rafinitaj, kutimoj, kaj estas nenio pli malestetika ol policano. Mi estas nature naŭzita de ĉiuj manifestiĝoj de kruda materialismo. Mi malofte venas en kontakton kun la vulgara homamaso. Mi vivas, kiel vi vidas, en mezo de iometa atmosfero de eleganteco. Mi povas nomi min patrono de la artoj. Tio estas mia malforteco. La pejzaĝo estas aŭtentika de Corot, kaj, kvankam spertulo eble dubus pri tiu de Salvator Rosa, ne povas esti ia dubo pri tiu de Bougereau. Mi inklinas al la moderna, franca skolo.”

“Pardonu min, S-ro Sholto,” diris F-no Morstan, “sed mi venis ĉi tien pro via peto por sciiĝi pri io, kion vi deziras diri al mi. Estas jam tre malfrue, kaj mi dezirus, ke la intervjuo estu kiel eble plej mallonga.”

“En la plej bona okazo necesos iom da tempo,” li respondis. “Ĉar ni certe devos iri al Norwood por vidi fraton Bartholonew. Ni ĉiuj iros kaj penos konvinki lin. Li estas tre kolera kontraŭ mi, ĉar mi agis, kiel ŝajnis al mi prave. Ni sufiĉe forte kverelis hieraŭ nokte. Vi ne povas imagi kia terurulo li estas, kiam li estas kolera.”

“Se ni iros al Norwood, eble estus bone, ke ni iru tuj,” mi riskis sugesti.

Li ridis ĝis liaj oreloj estis tre ruĝaj. “Tio tute ne servus,” li kriis. “Mi ne scias kion li dirus, se mi envenigus vin en tiel subita maniero. Ne, mi devas prepari vin per klarigado de niaj respektivaj rilatoj. Unue, mi

## La Signo de la Kvar

devas diri al vi, ke estas kelkaj punktoj en la rakonto pri kio mi mem ne scias. Mi povas nur meti la faktojn antaŭ vin, kiujn mi scias.

“Mia patro estis, kiel vi eble jam divenis, Majoro John Sholto, antaŭe en la hinda armeo. Li emeritiĝis antaŭ dek unu jaroj, kaj ekloĝis en Loĝejo Pondicherry en Upper Norwood. Li prosperis en Hindujo, kaj reportis hejmen konsiderindan sumon da mono, grandan kolekton de kuriozaĵoj, kaj hindan servistaron. Per tiuj rimedoj, li aĉetis domon, kaj vivis en granda lukseco. Mia ĝemela frato Bartholomew kaj mi estis liaj solaj filoj.

“Mi tre bone memoras la sensacion kaŭzitan de la malapero de Kapitano Morstan. Ni legis la detalojn en la ĵurnaloj, kaj, ĉar ni sciis, ke li estis amiko de nia patro, ni diskutis la kazon libere antaŭ li. Li foje partoprenis en niaj konjektadoj pri kio okazis. Neniam ni suspektis, eĉ dum momento, ke li tenas la tutan sekreton en sia propra brusto,—ke, el ĉiuj homoj, nur li sciis la sorton de Arthur Morstan.

“Ni sciis, tamen, ke ia mistero—ia konkreta danĝero—pendas super nia patro. Li timis eliri sola, kaj li ĉiam dungis du boksistojn por servi kiel pordistoj ĉe Loĝejo Pondicherry. Williams, kiu veturigis hodiaŭ nokte, estis unu el tiuj. Li antaŭe estis la malpeza ĉampiono de Anglujo. Nia patro neniam diris al ni kion li timas, sed li havis fortan antipation kontraŭ lignakruruloj. Unu fojon, li pafis per sia revolvero al lignakrurulo. Poste oni trovis, ke tio estis sendanĝera komercisto, kiu rondvizitis serĉante mendojn. Ni devis pagi grandan sumon da mono por subpremi la aferon. Mia frato kaj mi pensis, ke tio estas nur kaprico de mia patro, sed postaj okazaĵoj devigis nin ŝanĝi nian opinion.

“Frue en 1882, mia patro ricevis leteron de Hindujo, kiu estis granda ŝoko al li. Li preskaŭ svenis ĉe la matenmanĝa tablo, kiam li malfermis ĝin, kaj de tiu tago li malsaniĝis ĝis morto. Kio estis en la letero, ni neniam povis malkovri, sed mi povis vidi dum li tenis ĝin, ke ĝi estas mallonga kaj krude skribita. Li suferis dum jaroj pro pligrandiĝinta lieno, sed li nun rapide plimal saniĝis. Kaj ĉirkaŭ la fino de aprilo oni informis nin, ke ne plu estas espero por li, kaj ke li volis fari al ni finan komunikadon.



## La Signo de la Kvar

“Kiam ni eniris en lian ĉambron li sidis en la lito apogata per kapkusenoj kaj spiranta malfacile. Li petis, ke ni ŝlosu la pordon kaj lokiĝu kun unu je ĉiu flanko de la lito. Tiam, premante niajn manojn, li diris al ni rimarkindan historion, per voĉo rompita tiel multe de emocio, kiel de doloro. Mi penos doni ĝin al vi per liaj propraj vortoj.

“ ‘Estas nur unu afero,’ li diris, ‘kiu pezas en mia konscienco en ĉi tiu plej grava momento. Tio estas mia traktado de la kompatinda orfino de Morstan. La damninda avareco, kiu estis mia ĉefa peko dum la vivo, retenis de ŝi la trezoron, de kiu almenaŭ duono devas esti ŝia. Tamen, ankaŭ mi ne uzis ĝin,—tiel blinda kaj stulta estas la avareco. La simpla sento de posedado estis tiel agrabla al mi, ke mi ne povis toleri la ideon kundividi ĝin. Rigardu tiun diademon de perloj apud la botelo de kinino. Eĉ tion mi ne povis rezigni, kvankam mi elprenis ĝin kun la intenco sendi ĝin al ŝi. Vi, miaj filoj, donos al ŝi justan porcion de la trezoro de Agra. Sed sendu al ŝi nenion—ne eĉ la diademon—ĝis mi estos for. Malgraŭ ĉio, foje homoj tiel malsanaj kiel mi resaniĝas.

“ ‘Mi diros al vi kiel Morstan mortis,’ li daŭrigis. ‘Li suferis dum jaroj pro malforta koro, sed li kaŝis tion de ĉiuj. Nur mi sciis tion. En Hindujo, li kaj mi, pro rimarkinda sinsekvo de cirkonstancoj, ekposedis konsiderindan trezoron. Mi portis ĝin al Anglujo, kaj la nokton, kiam Morstan alvenis, li venis rekte ĉi tien por pretendi sian porcion. Li piediris de la stacio, estis akceptita de mia lojala servisto, Lal Chowder, kiu nun estas morta. Morstan kaj mi havis diferencon de opinioj pri la dividado de la trezoro, kaj ni kverelis. Morstan saltis de sia seĝo en atako de kolero, kiam li subite premis la manon al la flanko, lia vizaĝo ekhavis malhelan koloron, kaj li falis malantaŭen, tranĉante la kapon kontraŭ angulo de la trezorkesto. Kiam mi kliniĝis super li, mi vidis terurigiten, ke li estas morta.

“Dum longa tempo, mi sidis ŝokita, demandante min kion mi faru. Mia unua impulso, kompreneble, estis voki helpon; sed mi ne povis ne rekoni, ke oni eble akuzos min pri murdo. Lia morto en momento de kverelo, kaj la vundo sur lia kapo, estis tre gravaj indicoj kontraŭ mi. Ankaŭ, oni ne povus fari oficialan enketon sen malkovri kelkajn faktojn pri la trezoro, kiujn mi nepre volis teni sekretaj. Li diris al mi, ke neniu

## La Signo de la Kvar

en la mondo scias kien li iris. Ŝajnis al mi, ke ne estas necese, ke iu ajn iam sciu tion.

“Mi ankoraŭ meditis pri la afero, kiam, levante la rigardon, mi vidis mian serviston, Lal Chowdar, ĉe la pordo. Li ŝtelenvenis kaj riglis la pordon. “Ne timu, Sahibo,” li diris. “Neniu devas scii, ke vi mortigis lin. Ĉu ni forkaŝu lin, tiel ke neniu scios?” “Mi ne mortigis lin,” diris mi. Lal Chowdar kapneis kaj ridetis. “Mi aŭdis ĉion, Sahibo,” diris li. “Mi aŭdis vin kvereli, kaj mi aŭdis la baton. Sed miaj lipoj estas sigelitaj. Ĉiuj dormas en la domo. Ni forportu lin kune.” Tio sufiĉis por decidigi min. Se mia propra servisto ne povis kredi pri mia senkulpeco, kiel mi esperus konvinki dek du stultajn komercistojn en ĵurio? Lal Chowdar kaj mi forigis la kadavron tiun nokton, kaj post kelkaj tagoj la ĵurnaloj de Londono parolis pri la mistera malapero de Kapitano Morstan. Vi vidos per tio, kion mi diras, ke mi ne kulpas en la afero. Mia kulpo kuŝas en la fakto, ke ni kaŝis ne nur la kadavron, sed ankaŭ la trezoron, kaj ke mi kroĉis la porcion de Morstan, krom mia propra. Mi volas, ke vi faru redonadon. Metu vian orelon al mia buŝo. La trezoro estas kaŝita en—’

“En tiu momento lia vizaĝo terure ŝanĝiĝis; liaj okuloj estis frenezaj, lia makzelo falis, kaj li kriis, per voĉo, kiun mi neniam forgesos, ‘Ne lasu lin enveni! Pro la amo de Kristo, ne lasu lin enveni!’ Ni ambaŭ ekrigardis la fenestron malantaŭ ni, tiun, kiun li povis vidi. Vizaĝo enrigardis al ni el la mallumo. Ni povis vidi la blankiĝon de la nazo, kie ĝi estis premita kontraŭ la vitron. Ĝi estis barba, haroplana vizaĝo, kun kruelaj okuloj kaj esprimo de koncentrita malbonvolo. Mia frato kaj mi hastis al la fenestro, sed la viro estis for. Kiam ni revenis al mia patro, lia kapo jam falis kaj lia pulso jam ĉesis bati.

“Ni priserĉis la ĝardenon tiun nokton, sed ni ne trovis postsignon de la entrudiĝinto, krom ke ĝuste sub la fenestro estis unu sola piedimpreso en la florbedo. Se ne estus tiu spuro, ni eble pensus, ke tiu sovaĝa, kruela vizaĝo estis produkto de nia imago. Sed baldaŭ ni havis alian kaj pli imponan pruvon, ke ia sekreta forto agas ĉirkaŭ ni. Ni trovis la fenestron en la ĉambro de nia patro malfermita en la mateno; liaj ŝrankoj kaj skatoloj estis priserĉitaj, kaj sur lia brusto estis fiksita ŝirita peco de papero, kun la vortoj ‘La signo de la kvar’ skribaĉitaj sur ĝi. Kion

## La Signo de la Kvar

signifis la frazo, aŭ kiu eble estis nia sekreta vizitinto, ni neniam sciis. Kiom ni povis vidi, nenia posedaĵo de mia patro estis fakte ŝtelita, kvankam ĉio estis eligita. Mia frato kaj mi nature ligis tiun strangan okazon al la timo, kiu afliktis mian patron dum lia vivo. Sed ĝi estas ankoraŭ kompleta mistero al ni.”

La eta viro paŭzis por rebruligi sian nargileon kaj fumi penseme dum kelkaj momentoj. Ni sidis absorbitaj, dum ni aŭskultis lian eksterordinaran rakonton. Je la mallonga raporto pri la morto de ŝia patro, F-no Morstan fariĝis morte pala, kaj dum momento mi timis, ke ŝi svenos. Ŝi revigliĝis, tamen, post kiam ŝi trinkis glason da akvo, kiun mi verŝis por ŝi el venecia karafo sur la bufedo. Holms kliniĝis malantaŭen en sia seĝo kun esprimo de retiriĝo kaj kun la palpebroj malaltaj super la briletantaj okuloj. Kiam mi rigardis lin, mi ne povis ne pensi pri kiel en tiu tago mem li plendis amare pri la ordinareco de la vivo. Jen fine problemo, kiu ŝarĝos lian sagacon kiel eble plej ekstreme. S-ro Thaddeus Sholto rigardis jen unu jen alian el ni kun evidenta fiereco pri la efiko, kiun lia rakonto produktis, kaj poste daŭrigis la rakonton inter suĉoj de sia pipego.

“Mia frato kaj mi,” diris li, “estis, kiel vi imagos, tre ekscititaj pri la trezoro, pri kiu nia patro parolis. Dum semajnoj kaj monatoj ni fosis kaj sondis ĉiun parton de la ĝardeno, sen malkovri ion ajn. Estis frenezige pensi, ke la kaŝejo estis sur liaj lipoj mem je la momento de lia morto. Ni povis taksi la grandiozecon de la mankantaj riĉaĵoj per la diademo, kiun li elprenis. Pri tiu diademo, mia frato kaj mi ne malmulte diskutis. La perloj ŝajne estis tre valoraj, kaj li ne volis rezigni ilin, ĉar, por paroli inter amikoj, mia frato mem iom inklinis al la peko de mia patro. Li ankaŭ pensis, ke fordoni la diademon eble kaŭzos klaĉadon kaj fine venigos problemojn. Mi ne povis fari pli ol konvinki lin, ke li permesu al mi trovi la adreson de F-no Morstan kaj sendi al ŝi malfiksitan perlon je konstantaj intertempoj, por ke ŝi almenaŭ neniam sentu sin malriĉega.”

“Tio estis bonkora penso,” diris nia kompanino sincere. “Tio estis ekstreme bonkora viaparte.”

## La Signo de la Kvar

La eta viro svingis la manon en gesto de memmallaŭdo. “Ni estis viaj kuratoroj,” li diris. “Tio estis mia opinio, kvankam frato Bartholomew ne povis tute konsenti. Ni mem havis multe da mono. Mi ne deziris pli. Ankaŭ, estus malbonguste trakti junan virinon en tiel fia maniero. ‘*Le mauvais goût mène au crime.*’<sup>1</sup> La francoj havas tre belan manieron diri la aferojn. Niaj kontraŭaj opinioj pri la temo tiel grandiĝis, ke mi decidis, ke estos bone transloĝiĝi al propra domo: do mi forlasis Loĝejon Pondicherry venigante kun mi la maljunan *khitmutgar* kaj Williams. Sed hieraŭ mi sciiĝis, ke io ekstreme grava okazis. Oni malkovris la trezoron. Mi tuj kontaktis F-non Morstan, kaj nur restas veturi al Norwood kaj postuli niajn porciojn. Mi klarigis miajn opiniojn al frato Bartholomew hieraŭ nokte, do ni estos atendataj, se ne bonvenaj.”

S-ro Thaddeus Sholto ĉesis paroli, kaj sidis ek-spasmetante sur sia luksa kanapo. Ni restis silentaj, pensante pri tiu nova disvolviĝo en la mistera afero. Holms estis la unua, kiu ekstaris.

“Vi faris bone, sinjoro, de la komenco al la fino,” diris li. Estas eble, ke ni povos iagrade reciproki per lumigado de tio, kio estas ankoraŭ malluma al vi. Sed, kiel F-no Morstan ĵus rimarkis, estas malfrue, kaj estos plej bone, se ni antaŭenigos la aferon sen prokrasto.”

Nia nova konato tre intence volvis la tubon de sia nargileo, kaj elvenigis de malantaŭ kurteno tre longan redingoton kun ornamentaj fiksiloj el pasamento kaj kolumo kaj manumoj el astrakano. Tion li tute butonis malgraŭ la sufokanteco de la nokto, kaj li finis la vestadon per surmeto de kuniklopelta ĉapo kun pendantaj klapoj, kiuj kovris la orelojn, tiel ke nenia parto de li estis videbla krom la moviĝema kaj pala vizaĝo. “Mia sano estas iom fragila,” li rimarkis, dum li kondukis nin laŭ la koridoro. “Mi estas devigita esti zorgegemulo.”

Nia fiakro atendis ekstere, kaj nia vojaĝo ŝajne estis jam aranĝita, ĉar la veturigisto tuj ekiris rapide. Thaddeus Sholto parolis senĉese, per voĉo, kiu klare elstaris super la klakado de la radoj.

---

La malbona gusto kondukas al la krimo.<sup>1</sup>

## La Signo de la Kvar

“Bartolomew estas lerta ulo,” diris li. “Kiel vi pensas, ke li eksciis kie estas la trezoro? Li konkludis, ke ĝi estas ie en la domo: do li kalkulis la tutan kuban spacon de la domo, kaj li faris mezurojn ĉie, tiel ke ne eĉ unu colo estu neenkalkulita. Interalie, li trovis, ke la alteco de la konstruaĵo estas sepdek kvar futoj. Sed kiam li sumigis la altecojn de la apartaj ĉambroj, kaj konsideris la interspacojn, kiujn li determinis per boradoj, lia sumigado ne alvenis al pli ol sepdek futoj. Estis kvar futoj ne identigitaj. Tiuj povis esti nur je la supro de la konstruaĵo. Li trabatis la lato-gipsan plafonon de la plej alta ĉambro, kaj tie, ververe, li trovis alian malgrandan subtegmenton, kiu estis kaŝita kaj konata de neniuj. En la mezo staris la trezorkesto, apogita de du ĉevronoj. Li mallevis ĝin tra la truoj en la plafono, kaj tie ĝi kuŝas. Li kalkulas la valoron de la juveloj je ne malpli ol duonmiliono de pundoj.”

Je la mencio de tiu giganta sumo, ni ĉiuj rigardis unu la alian per grandaj okuloj. F-no Morstan, se ni povos plenumi ŝiajn rajtojn, ŝanĝiĝos de malriĉa gubernistino al la plej riĉa heredintino en Anglujo. Certe taŭgas al lojala amiko ĝoji pri tia novaĵo, sed mi hontas konfesi, ke la egoismo kaptis mian animon, kaj mia koro peziĝis kiel de plombo interne de mi. Mi elbalbutis kelkajn mallertajn vortojn de gratulado, kaj poste sidis malfeliĉa, vizaĝaltere, surda al la babilado de nia nova konato. Li klare estis rezoluta hipokondriulo, kaj mi reveme konsciis, ke li elverŝas senĉesajn sinsekvojn de simptomoj, petegante informojn pri la enhavo kaj agado de sennombraj ĉarlatanaj medikamentoj, el kiuj li portis kelkajn en leda tenilo en la poŝo. Mi fidis, ke li eble ne memoras la respondojn, kiujn mi donis al li tiun nokton. Holms deklaras, ke li subaŭdis min averti lin pri la granda danĝero de prenado de pli ol du gutoj de oleo de ricino, kaj rekomendi strikninon en larĝaj dozoj kiel sedativon. Kiel ajn tio estis, mi certe estis malŝarĝita, kiam la fiakro haltis kun skuo, kaj la veturigisto desaltis por malfermi la pordon.

“Jen, F-no Morstan, Loĝejo Pondicherry,” diris S-ro Thaddeus Sholto, dum li proponis al ŝi la manon por helpi ŝin eliri.

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro V

#### La Tragedio de Loĝejo Pondicherry

Estis preskaŭ la dekunua, kiam ni alvenis al la fina etapo de nia nokta aventuro. Ni jam lasis la malsekan nebulon de la granda urbo malantaŭ ni, kaj la nokto estis sufiĉe bela. Varmeta vento blovis de la okcidento, kaj densaj nuboj moviĝis malrapide trans la ĉielo, kaj duona luno foje elgvatis tra la fendoj. Estis sufiĉe klare por vidi je nemalgranda distanco, sed Thaddeus Sholto malsupren deprenis unu el la flankaj lampoj de la kaleŝo por doni al ni pli bonan lumon sur nia vojo.

Loĝejo Pondicherry staris sur sia propra tero, kaj estis ĉirkaŭita de tre alta ŝtona muro kun supraj vitreroj. Unu mallarĝa fere fortikigita pordo estis la sola enirejo. Nia gvidanto signalis ĉe la pordo per stranga frapfrapo, kiel de poŝtisto.

“Kiu estas?” kriis bruska voĉo de interne.

“Estas mi, McMurdo. Certe vi jam konas mian frapmanieron.”

Estis grumbla sono kaj la tintoj kaj knaroj de ŝlosiloj. La pordo malfacile svingiĝis malantaŭen, kaj malalta, larĝabrusta viro staris en la aperturo, kun la flava lumo de la lanterno brilanta sur lia elstarantaj trajtoj kaj briletantaj malfidemaj okuloj.

“Ĉu estas vi, S-ro Thaddeus? Sed kiuj estas la aliaj? Mi ne havis ordonojn pri ili de la mastro.”

“Ĉu ne, McMurdo? Tio surprizas min! Mi diris al mia frato hieraŭ nokte, ke mi venigos amikojn.”

“Li ne venis el sia ĉambro hodiaŭ, S-ro Thaddeus, kaj mi ne havas ordonojn. Vi tre bone scias, ke mi devas obei regulojn. Mi rajtas enlasi vin, sed viaj amikoj devas halti kie ili estas.”

Tio estis neatendita obstaklo. Thaddeus Sholto ĉirkaŭrigardis en perpleksa kaj senhelpa maniero. “Tio ne povas esti, McMurdo!” li diris.

## La Signo de la Kvar

“Se mi garantias por ili, tio estas sufiĉe por vi. Kaj kion vi diras pri la fraŭlino? Ĝi ne povas atendi en la publika vojo je ĉi tiu horo.”

“Mi tre bedaŭras, S-ro Thaddeus,” diris la pordisto nedeturnebla. “Tiuuj homoj povas estis amikoj de vi, sed ne amikoj de la mastro. Li pagas min bone por fari mian devon, kaj mian devon mi faros. Mi konas neniun el viaj amikoj.”

“Ho, male, McMurdo,” kriis Ŝerlok Holms afable. “Mi ne kredas, ke estas eble, ke vi forgesis min. Ĉu vi ne memoras la amatoron, kiu batalis dum tri raŭndoj kontraŭ vi en Haloj Alison la nokton de via benefico antaŭ kvar jaroj?”

“Estas vi, S-ro Ŝerlok Holms!” kriegis la boksisto. “Ho, mia Dio! Kiel mi ne rekonis vin? Anstataŭ stari silenta, se vi estus veninta antaŭen kaj batinta min per tiu via hokbato sub la makzelo, mi estus rekoninta vin sendube. Ho vi malŝparis viajn talentojn, vere! Vi povintus celi alten, se vi dezirus.”

“Ĉu vi vidas, Watson, se ĉio alia mankas al mi, mi havas ankoraŭ unu el la sciencaj profesioj malfermita al mi,” diris Holms ridante. “Nia amiko ne devigos nin resti ekstere en la malvarmo, mi certas.”

“Envenu, sinjoro, envenu,—vi kaj viaj amikoj,” li respondis. “Mi tre bedaŭras, S-ro Thaddeus, sed miaj ordonoj estis tre striktaj. Mi devis certi pri viaj amikoj antaŭ ol mi enlasis ilin.”

Interne, gruzo pado serpentis tra dezerta tero al grandega maso de domo, kvadrata kaj ordinara, vualita en ombroj, krom unu angulo, kie luna radio trafis kaj rebrilis de subtegmenta fenestro. La vasta grandeco de la konstruaĵo, morna kaj mortece silenta, malvarmigis la koron. Eĉ Thaddeus Sholto ŝajnis maltrankvila, kaj la lanterno tremis kaj klakadis en lia mano.

“Mi ne povas kompreni,” li diris. “Devas esti eraro. Mi klare diris al Bartholomew, ke ni estos ĉi tie, sed ne estas lumo en lia fenestro. Mi ne scias kion pensi pri tio.”

“Ĉu li ĉiam gardas la lokalon en ĉi tiu maniero?” demandis Holms.

## La Signo de la Kvar

“Jes. Li sekvas la kutimon de mia patro. Li estis la favorita filo, vi sciu, kaj mi foje pensas, ke mia patro diris al li pli ol li iam diris al mi. Tio estas la fenestro de Bartholomew, kie trafas la luna lumo. Tio estas tre brila, sed ne estas lumo de interne, mi pensas.”

“Nenia,” diris Holms. “Sed mi vidas la brileton de lumo en tiu malgranda fenestro apud la pordo.”

“Ha, tio estas la ĉambro de la mastrumistino. En tiu loko sidas maljuna S-no Berstone. Ŝi povos informi nin. Sed eble vi bonvolus atendi ĉi tie unu-du minutojn, ĉar, se ni ĉiuj eniros kune kaj ŝi ne scias, ke ni venos, ŝi eble ektimos. Sed silentu! Kio estas tio?”

Li levis la lanternon, kaj lia mano tremis ĝis la rondoj de lumo flagretis kaj ŝanceliĝis tute ĉirkaŭ ni. F-no Morstan kaptis mian pojon, kaj ni ĉiuj staris kun bategantaj koroj, streĉante la orelojn. El la nigra domo venis tra la silenta nokto plej trista kaj kompatinda sono,—la akra, anhela plorado de terurigita virino.

“Tio estas S-no Bernstone,” diris Sholto. “Ŝi estas la sola virino en la domo. Atendu ĉi tie. Mi revenos post momento.” Li hastis al la pordo, kaj frapis en sia tipa maniero. Ni povis vidi altan, maljunan virinon malfermi por li, kaj tremi pro ĝojo je lia vido.

“Ho, S-ro Thaddeus, mi tre feliĉas, ke vi venis. Mi tre feliĉas, ke vi venis, S-ro Thaddeus!” Ni aŭdis ŝiajn ripetitaj esprimojn de feliĉeco ĝis oni fermis la pordon kaj ŝia voĉo formortis al monotona zumado.

Nia gvidanto lasis al ni la lanternon. Holms ĉirkaŭmovis ĝin malrapide, atente observante la domon kaj la grandajn rubamasojn, kiuj etendiĝis sur la tereno. F-no Morstan kaj mi staris kune, kaj ŝia mano estis en mia. Mirinde subtila afero esta la amo. Jen ni estis, du, kiuj ne vidis unu la alian antaŭ tiu tago, inter kiuj nenia vorto aŭ esprimo de kareco iam pasis, tamen nun, en horo de malfacilaĵoj, niaj manoj instinkte serĉis unu la alian. Ĉiam, kiam mi pensas pri tio mi miras, sed en la momento ŝajnis tute nature, ke mi turnus min al ŝi, kaj, kiel ŝi ofte diris al mi poste, ankaŭ en ŝi estis instinkto turni sin al mi por komforto kaj protekto. Ni



## La Signo de la Kvar

staris do man-en-mane, kiel du infanoj, kaj estis paco en nia koro malgraŭ la multaj malbonaŭguraj aferoj, kiuj ĉirkaŭis nin.

“Kiel stranga loko!” ŝi diris ĉirkaŭrigardante.

“Aspektas kvazaŭ oni liberigis ĉiuj talpoj en Anglujo ĉi tie. Mi jam vidis ion similan sur la flanko de monteto proksime al Ballarat, kie prospektoroj laboris.”

“Kaj de la sama kaŭzo,” diris Holms. “Tiu estas la spuroj de la serĉantoj al trezoro. Vi devas memori, ke ili serĉis ĝin dum ses jaroj. Ne estas strange, ke la tero aspektas kiel gruz-minejo.”

En tiu momento, la pordo de la domo malfermegiĝis kaj Thaddeus Sholto elkuris, kun la manoj etenditaj kaj teruro en la okuloj.

“Io malbona okazis al Bartholomew!” li kriis. “Mi estas timigita! Miaj nervoj ne povas elteni.” Fakte, li duonbalbutis pro timo, kaj lia malforta, tremanta vizaĝo, gvatanta el la granda, astrakana kolumo havis la senhelpan, petantan esprimon de terurigita infano.

“Venu en la domon,” diris Holms, en sia vigla, firma maniero.

“Jes, faru tion!” plorpetis Thaddeus Sholto. “Mi vere ne sentas min kapabla doni ordonojn.”

Ni ĉiuj sekvis lin en la ĉambro de la mastrumistino, kiu staris je la maldekstra flanko de la koridoro. La maljunulino paŝadis tien kaj reen kun tima mieno kaj malkvietaj fingroj, sed la vido al F-no Morstan ŝajne efikis sur ŝi trankvilige.

“Dio benu vian dolĉan, trankvilan vizaĝon!” ŝi kriis kun histeria plorĝemo. “Estas konsolo vidi vin. Ho, kian penigan tagon mi havis!”

Nia kompanino frapetis ŝian maldikan, labortrivitan manon, kaj murmuris kelkajn vortojn de bonkora, virina konsolo, kiuj revenigis la koloron al la sensangaj vangoj de la alia.

## La Signo de la Kvar

“La mastro enŝlosis sin kaj ne respondos al mi,” ŝi klarigis. “La tutan tagon mi atendis aŭdi de li, ĉar li ofte ŝatas esti sola. Sed antaŭ horo, mi timis, ke io malbona okazis, do mi supreniris kaj gvatis tra la ŝlosiltruo. Vi devas supreniri, S-ro Thaddeus,—vi devas supreniri kaj mem vidi. Mi vidis S-ron Bartholomew Sholto en ĝojo kaj en doloro dum dek longaj jaroj, sed mi neniam vidis lin kun tia vizaĝo.”

Ŝerlok Holms prenis la lampon kaj kondukis ilin, ĉar la dentoj de Thaddeus Sholto klakadis en lia kapo. Tiel maltrankviligita estis li, ke mi devis teni lin sub la ŝultro dum ni iris laŭ la ŝtuparo, ĉar liaj genuoj tremis. Dufoje dum ni supreniris, Holms eligis sian lenson el la poŝo kaj zorge ekzamenis markojn, kiuj ŝajnis al mi nur makulojn de polvo sur la bruna mato, kiu servis kiel tapiŝo sur la ŝtuparo. Li iris malrapide, de ŝtupo al ŝtupo, tenante la lampon, rigardante atente jen dekstre, jen maldekstre. F-no Morstan postrestis kun la timigita mastrumistino.

La tria ŝtuparo finiĝis per rekta koridoro, iom longa, kun granda bildo en hinda tapiŝo dekstre kaj tri pordoj maldestre. Holms iris laŭ ĝi en la sama malrapida, metoda maniero. Ni tuj sekvis lin, kun niaj longaj, nigraj ombroj fluantaj malantaŭen laŭ la koridoro. La tria pordo estis tiu, kiun ni serĉis. Holms frapis sen ricevi respondon, kaj poste li provis turni la manilon kaj malfermi ĝin perforte. Ĝi estis ŝlosita de interne, kaj per larĝa kaj forta seruro, kiel ni povis vidi, kiam ni prilumis ĝin per la lampo. La ŝlosilo estis turnita, tamen, tiel ke la truo ne estis tute fermita. Ŝerlok Holms kliniĝis al ĝi, kaj tuj leviĝis kun akra enspiro.

“Estas io diabla en ĉi tio, Watson,” diris li, pli emociita ol mi iam vidis lin. “Kion vi komprenas el tio?”

Mi klinigis min al la truo, kaj retiriĝis en teruro. Luna lumo fluis en la ĉambron, kaj ĝi estis brila, kun difuza kaj neregula radieco. Rigardanta rekte al mi, kvazaŭ ŝvebanta en la aero, ĉar ĉio malsupre de ĝi estis en ombro, tie estis vizaĝo,—la vizaĝo mem de nia kompano, Thaddeus. Estis la sama alta, brila kapo, la sama bendo de rigidaj, ruĝaj haroj, la sama sensanga vizaĝo. La trajtoj estis fiksitaj, tamen, en larĝa, terura rideto, senmova kaj nenatura, kiu, en tiu kvieta kaj lunluma ĉambro, estis pli ŝoka, ol iu ajn grimaco aŭ tordiĝo. Tiel simila estis la vizaĝo al tiu

## La Signo de la Kvar

de nia eta amiko, ke mi turniĝis al li por certigi, ke li fakte estas kun ni. Tiam mi memoris, ke li menciis, ke li kaj lia frato estas ĝemeloj.

“Tio estas terura!” mi diris al Holms. “Kion oni faru?”

“Ni devas faligi la pordon,” li respondis, kaj, saltante kontraŭ ĝin, li aplikis sian tutan pezon al la seruro. Ĝi knaris kaj ĝemis, sed ne cedis. Kune ni ĵetis nin kontraŭ ĝin, kaj ĉifoje ĝi cedis kun subita klako, kaj ni trovis nin interne de la ĉambro de Bartholomew Sholto.

Ĝi ŝajne estis ekipita kiel kemia laboratorio. Estis duobla vico de vitroŝtopitaj boteloj en la muro kontraŭ la pordo, kaj sur la tablo estis malorda kolekto de bruliloj de Bunsen, provtuboj, kaj retortoj. En la anguloj estis botelegoj de acido en vimenkorboj. Unu el tiuj ŝajne likis aŭ estis rompita, ĉar malhelkolora likvo fluetis el ĝi, kaj la aero estis peza kun kurioze pika, gudrosimilaodoro. Ŝtupareto staris je unu flanko de la ĉambro, meze de rubo el lato kaj gipso, kaj super tio estis aperturo en la plafono sufiĉe granda por la trapaso de viro. Antaŭ ĝi estis longa volvaĵo de ŝnuro senzorge ĵetita.

Apud la tablo, en ligna fotelo, la mastro de la domo sidis malorde, kun la kapo sur la maldekstra ŝultro, kaj tiu kadavra, nekomprenebla rideto sur la vizaĝo. Li estis rigida kaj malvarma, kaj li klare estis morta de multaj horoj. Ŝajnis al mi, ke ne nur liaj trajtoj, sed ankaŭ ĉiuj liaj membroj estis torditaj kaj turnitaj en treege fantazia maniero. Apud lia mano sur la tablo, kuŝis kurioza instrumento,—bruna, fajngrajna bastono, kun ŝtona kapo simila al martelo, krude fiksita per kruda ŝnureto. Apud tio estis ŝirita folio de notpapero kun kelkaj vortoj surskribaĉitaj. Holms rigardis ĝin kaj donis ĝin al mi.

“Ĉu vi vidas?” li diris, kun signifa levo de la brovoj.

En la lumo de la lanterno, mi legis kun tremo de teruro, “La signo de la kvar.”

“En la nomo de Dio, kion signifas ĉio ĉi?” mi respondis.

## La Signo de la Kvar

“Ĝi signifas murdon,” diris li, kliniĝante super la mortinto. “Ha, mi atendis tion. Rigardu!” Li almontris ion, kio aspektis kiel longa, nigra dorno pikanta la haŭton ĝuste super la orelo.

“Tio aspektas kiel dorno,” diris mi.

“Tio estas dorno. Vi povas elpluki ĝin. Sed zorgu, ĉar ĝi estas venenigita.”

Mi elprenis ĝin per la fingro kaj la polekso. Ĝi forvenis de la haŭto tiel facile, ke apenaŭ postrestis marko. Unu eteta sango montris kie estis la piko.

“Ĉi tio estas nesolvebla mistero al mi,” diris mi. “Ĝi plimalklariĝas anstataŭ pliklariĝi.”

“Male,” li respondis, “ĝi pliklariĝas en ĉiu momento. Mi nur bezonas kelkajn ĉenerojn por tute klarigi la kazon.”

Ni preskaŭ forgesis la ĉeeston de nia kompano post kiam ni envenis en la ĉambron. Li ankoraŭ staris ĉe la pordo, la bildo mem de terurito, vringante la manojn kaj ĝemante. Subite, tamen, li eligis akran, plendan krion.

“La trezoro estas for!” li diris. “Ili rabis de li la trezoron! Jen la truo, tra kiu ni mallevis ĝin. Mi helpis lin fari tion. Mi estis la lasta persono, kiu vidis lin! Mi lasis lin ĉi tie hieraŭ nokte, kaj mi aŭdis lin ŝlosi la pordon dum mi iris malsupren.”

“Je kioma horo?”

“Je la deka. Kaj nun li estas morta, kaj oni vokos la policon, kaj oni suspektos, ke mi helpis fari tion. Ho jes, pri tio mi certas. Sed ĉu vi ne pensas tion, sinjoroj? Certe vi ne pensas, ke mi faris tion? Ĉu estas probable, ke mi venigus vin ĉi tien, se mi faris tion? Ho, ve! Ho, ve! Mi scias, ke mi freneziĝos!” Li komencis svingi la brakojn kaj stamfi per la piedoj en speco de konvulsia frenezeco.

## **La Signo de la Kvar**

“Vi ne havas motivon por timi, S-ro Sholto,” diris Holms bonkore metante manon sur lian ŝultron. “Mi konsilas al vi veturi al la stacio por raporti la aferon al la polico. Proponu helpi ilin ĉiel, kiel eble. Ni atendos ĉi tie ĝis vi revenos.”

La eta viro obeis en duonstupora maniero, kaj ni aŭdis lin stumbli malsupren laŭ la ŝtuparo en la mallumo.

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro VI

#### Ŝerlok Holms Faras Demonstron

“Nun, Watson,” diris Holms, kunfrotante la manojn, “ni havas duonhoron por libera agado. Ni uzu ĝin bone. Kiel mi diris, la kazo estas preskaŭ kompleta; sed ni devas ne erari pro tro granda certeco. Kvankam la kazo ŝajnas simpla nun, ĝi eble kaŝas iaj komplikaĵojn.”

“Simpla!” mi ekkriis.

“Certe,” diris li, en maniero simila al klinika profesoro prezentanta al sia klaso. “Sidu en tiu angulo, por ke viaj piedsignoj ne plikomplikigu la aferon. Ek al la laboro! Unue, kiel tiuj uloj venis, kaj kiel ili iris? La pordo ne estis malfermita ekde hieraŭ nokte. Ĉu per la fenestro?” Li transportis la lampon al ĝi, elmurmurante siajn observaĵojn, prefere al si mem ol al mi. “La fenestro estas fiksita de interne. La framo estas solida. Ne estas ĉarniroj je la flanko. Ni malfermu ĝin. Ne estas proksima pluvtubo. Tegmento estas tro malproksima. Tamen, viro suprenvenis al la fenestro. Pluvis iomete hieraŭ nokte. Jen la spuro de piedo sur la sojlo. Kaj jen ronda, kota marko, kaj jen ĝi denove sur la planko, kaj jen denove apud la tablo. Vidu, Watson! Tio estas vere bela demonstro.”

Mi rigardis la rondan, bone difinitan, kotan diskon. “Tio ne estas piedsigno,” diris mi.

“Ĝi estas io multe pli valora al ni. Ĝi estas la premsigno de ligna stumpo. Vi vidas ĉi tie sur la sojlo la markon de boto, peza boto kun larĝa, metala kalkanumo, kaj apud tio la marko de ligna kruro.”

“Tio estas la lignakrurulo.”

“Ĝuste. Sed estis iu alia,—tre kompetenta kaj efika komplico. Ĉu vi povus suprengrimpi tiun muron, doktoro?”

Mi rigardis tra la malfermita fenestro. La luno ankoraŭ brile prilumis tiun angulon de la domo. Ni estis almenaŭ sesdek futojn super la tero,

## La Signo de la Kvar

kaj, kiom ajn mi rigardis, mi ne povis vidi punkton de apogo, aŭ eĉ fendon en la brikaro.

“Tio estas absolute neebla,” mi respondis.

“Sen helpo, tiel estas. Sed supozu, ke oni havus amikon ĉi-supre, kiu mallevus al ni tiun fortan ŝnuron, kiun mi vidas en la angulo, kaj ligus ĝin al tiu granda hoko en la muro. Tiel, mi pensas, se oni estus facilmova viro, oni povus supren grimpi eĉ kun ligna kruro. Oni forirus, kompreneble, en la sama maniero, kaj la komplico retirus la ŝnuron, malligus ĝin de la hoko, fermus la fenestron, fiksus ĝin de interne, kaj foreskapus kiel li envenis. Kiel sekundaran detalon ni povas noti,” li daŭrigis pasigante la fingrojn sur la ŝnuro, “ke nia unukrura amiko, kvankam li estas sufiĉe bona grimpanto, ne estas profesia maristo. Liaj manoj tute ne estis kalaj. Mia lenso videbligas pli ol unu markon de sango, precipe ĉe la fino de la ŝnuro. De tio mi konstatas, ke li glitis malsupren tiel rapide, ke li forfrotis haŭton de la manoj.”



Facilmova viro povus supren grimpi eĉ kun ligna kruro.

## La Signo de la Kvar

“Ĉio ĉi estas tre bona,” diris mi, “sed la afero fariĝas des pli nekomprenebla. Kion vi diras pri tiu mistera komplico? Kiel li envenis en la ĉambro?”

“Jes, la komplico!” ripetis Holms penseme. “Estas interesaj punktoj koncerne tiun komplicon. Li levas la kazon el la ordinareco. Mi havas la impreson, ke tiu komplico malfermas novajn kampojn en la kroniko de krimo en ĉi tiu lando,—kvankam estas paralelaj kazoj el Hindujo, kaj, se mi bone memoras, el Senegambio.”

“Kiel li venis do?” mi ripetis. “La pordo estas ŝlosita, la fenestro estas neatingebla. Ĉu tra la kamentubo?”

“La krado estas multe tro malgranda,” li respondis. “Mi jam konsideris tiun eblecon.”

“Kiel do?” mi persistis.

“Vi ne aplikas mian precepton,” li diris kapneante. “Kiel ofte mi diris al vi, ke, kiam oni eliminis la neeblaĵojn, tio, kio restas, *kvankam malprobabla*, devas esti la vero? Ni scias, ke li ne venis tra la pordo, la fenestro, aŭ la kamentubo. Ni scias ankaŭ, ke li ne estis kaŝita en la ĉambro, ĉar ne estas ebla kaŝejo. De kie li venis do?”

“Li venis tra la truo en la plafono,” mi kriis.

“Kompreneble. Devas esti, ke li faris tion. Se vi bonvolos teni la lampon por mi, ni nun etendos niajn esplorojn al la supra ĉambro,—la sekreta ĉambro, kie ili trovis la trezoron.

Li grimpis sur la ŝtupareto, kaj, tenante ĉevronon de ĉiu mano, li svinglevis sin en la subtegmenton. Tiam, kuŝante vizaĝaltere, li etendis manon por la lampo, kaj tenis ĝin dum mi sekvis lin.

La ĉambro, en kiu ni troviĝis, mezuris proksimume dek futojn en unu direkto kaj ses en la alia. La planko konsistis el ĉevronoj, kun maldikaj latoj kaj gipso inter tiuj, tiel ke oni devis piediri de ĉevrono al ĉevrono. La tegmento kuris al pinto, kaj ŝajne estis interna ŝelo de la vera



## La Signo de la Kvar

tegmento de la domo. Tute ne estis mebloj, kaj la akumuliĝinta polvo de jaroj kuŝis dika sur la planko.

“Jen, ĉu vi vidas?” diris Ŝerlok Holms metante la manon kontraŭ la deklivan muron. “Tio estas klappordo, kiu kondukas eksteren sur la tegmenton. Mi povas depuŝi ĝin, kaj jen estas la tegmento mem, malkrute dekliva. Ĉi tiel do, envenis Numero Unu. Ni vidu, ĉu ni povos trovi iajn aliajn indicojn pri lia individueco.”

Li mallevis la lampon al la planko, kaj, kiam li faris tion, mi vidis je la dua fojo en tiu nokto, esprimo de konsterniĝo kaj surprizo en lia vizaĝo. Koncerne min, dum mi sekvis lian rigardon, mia haŭto estis malvarma sub miaj vestoj. La planko estis dike kovrita de la postsignoj de nuda piedo,—klara, bone difinita, perfektaforma, sed apenaŭ duono de la grandeco de tiuj de normala homo.



La planko estis dike kovrita de la postsignoj de nuda piedo.

## La Signo de la Kvar

“Holms,” mi diris flustre, “infano faris tiun teruraĵon.”

Li tuj retrovis sian sinregadon. “Mi estis konsternita dum momento,” li diris, “sed la afero estas tute natura. Mia memoro mankis al mi momente, se ne, mi povintus antaŭdiri tion. Estas nenio alia konstatebla ĉi tie. Ni iru malsupren.”

“Kio estas via teorio do pri tiuj piedsignoj?” mi demandis avide, kiam ni esti denove en la malsupra ĉambro.

“Mia kara Watson, mem provu iom da analizado,” diris li, kun nuanco de senpacienceco. “Vi konas miajn metodojn. Apliku ilin, kaj estos instrue kompari la rezultojn.”

“Mi povas koncepti nenion, kio klarigos la faktojn,” mi respondis.

“Baldaŭ ĉio estos sufiĉe klara,” li diris senzorge. “Mi pensas, ke estas nenio alia grava ĉi tie, sed mi serĉos.” Li eligis sian lupeon kaj mezurbendon, kaj hastis ĉirkaŭ la ĉambro sur la genuoj, mezurante, komparante, ekzamenante, kun sia longa nazo nur kelkajn kolorojn de la tabuloj, kun la malgrandaj okuloj briletantaj kaj profundaj kiel de birdo. Tiel rapida, silenta, kaj kaŝema estis liaj moviĝoj, kiel tiuj de spurhundo trovanta odoron, ke mi ne povis ne pensi pri kiel terura krimulo li estus, se li estus turninta sian energion kaj sagacecon kontraŭ la leĝo, anstataŭ uzi ilin en ĝia defendado. Dum li serĉis, li murmuris al si mem, kaj fine li kokerikis ĝoje.

“Ni certe havas bonan ŝancon,” diris li. “Ni devas havi malmulte da problemoj nun. Numero Unu misfortune tretis en la kreoŝto. Vidu la konturon de la rando de lia piedeto ĉi tie apud tiu odoraĉa malordaĵo. La botelego estas fendita, kaj la aĵo ellikis.”

“Kaj kio do?” mi demandis.

“Nu, ni havas lin, jen ĉio,” diris li. “Mi konas hundon, kiu sekvus tiun odoron ĝis la mondfino. Se hundaro povas spuri haringon trans provinco, kiel longe povas speciale trejnita hundo sekvi tiel pikan odoron kiel ĉi tiun? Tio similas al sumo trovita per la regulo de tri. La respondo devas doni al ni la—Sed halo! Jen la oficialaj reprezentantoj de la leĝo.”

## La Signo de la Kvar

Fortaj paŝoj kaj la kriado de laŭtaj voĉoj estis aŭdeblaj de malsupre, kaj la pordo de la vestiblo fermiĝis kun laŭta bruo.

“Antaŭ ol ili venos,” diris Holms, “metu la manon ĉi tie sur la brako de ĉi tiu kompatindulo, kaj ĉi tie sur la kruro. Kion vi sentas? “La muskolo estas malmola kiel tabulo,” mi respondis.

“Ĝuste. Ili estas en stato de ekstrema kontraĥiĝo, kiu multe superas la normalan mortan rigidiĝon. Konsiderante ankaŭ la tordiĝon de la vizaĝo, tiun hipokratan ridon, aŭ ‘*risus sardonicus*,’ kiel ĝin nomis la antikvaj aŭtoritatoj, kian konkludon vi faras?”

“Morto pro ia potenca vegeta alkaloido,” mi respondis,—“ia sustanco simila al striknino, kiu kaŭzus tetanon.”

“Tio estis la ideo, kiu tuj venis al mi, kiam mi vidis la streĉitajn muskolojn de la vizaĝo. Post kiam ni venis en la ĉambron, mi tuj serĉis la rimedon, per kiu la veneno eniris en la sistemon. Kiel vi vidis, mi trovis dornon, kiu estis enpremita aŭ enpafita sen granda forto en la kranohaŭton. Vi observis, ke la loko trafita estis tiu, kiu estis turnita al la truo en la plafono, se la viro sidis rekte en la seĝo. Nun ekzameni la dornon.”

Mi prenis ĝin zorge kaj tenis ĝin en la lumo de la lanterno. Ĝi estis longa, akra, kaj nigra, kun aspekto de emajlo proksime al la pinto, kvazaŭ ia gumecca substanco estis tie sekigita. La malakra fino estis tondita kaj rondigita per tranĉilo.

“Ĉu tio estas angla dorno?” li demandis.

“Ne, certe ne.”

“Kun ĉiuj ĉi datumoj, vi devus povi fari kelkajn pravajn deduktojn. Sed jen venas la oficialaj fortoj; do la helpaj fortoj povas retreti.”

Dum li parolis, la paŝoj, kiuj proksimiĝis, nun sonis laŭte en la koridoro, kaj tre fortika, korpulenta viro en griza kompleto peze paŝegis en la ĉambron. Li estis ruĝvizaĝa, solida kaj pletora, kun paro de tre malgrandaj okuloj, kiuj rigardis vigle el inter ŝvelmolaj palpebroj. Lin

## La Signo de la Kvar

tuj sekvis inspektisto en uniformo kaj ankoraŭ palpitacianta Thaddeus Sholto.

“Jen bona afero!” li kriis, per obtuza, raŭketa voĉo. “Jen tre bona afero! Sed kiuj estas tiuj ĉi? Nu, la domo ŝajnas tiel plena kiel kuniklejo!”

“Mi kredas, ke vi devas memori min, S-ro Athelney Jones,” diris Holms kviete.

“Nu, kompreneble jes!” li anhelis. “Tio estas S-ro Ŝerlok Holms, la teoriisto. Ĉu mi memoras vin? Mi neniam forgesos kiel vi prelegis al ni pri kaŭzoj kaj efikoj en la kazo de la juveloj de Bishopgate. Estas vere, ke vi metis nin sur la ĝustan vojon; sed vi konfesos nun, ke tio estis prefere pro bona ŝanco ol pro bona konsilo.”

“Tio estis laboro de simpla rezonado.”

“Ho, ta ta ta! Neniam hontu konfesi. Sed kio estas ĉi tie? Malbona afero! Malbona afero! Jen precizaj faktoj,—ne estas loko por teorioj. Kiel bonŝance, ke mi estis en Norwood pro alia kazo! Mi estis en la stacio, kiam la mesaĝo alvenis. De kio vi pensas, ke la viro mortis?”

“Ho, tio ne estas kazo por mia teoriado,” diris Holms seke.

“Ne, ne. Tamen, oni ne povas nei, ke vi foje trafas la najlokapon. Ĉielo! Pordo ŝlosita, mi komprenas. Juveloj valorantaj duonmilionon for. Kiel estis la fenestro?”

“Fiksita; sed estas piedsignoj sur la sojlo.”

“Bone, bone, se ĝi estis fiksita, la piedsignoj ne povas koncerni la aferon. Tio estas normala prudento. La viro eble mortis pro atako de malsano. Sed, aliflanke, la juveloj mankas. Ha! Mi havas teorion. Tiaj ekbriloj venas al mi foje. Eliru, serĝento, kaj vi, S-ro Sholto. Via amiko povas resti. Kion vi pensas pri ĉi tio, Holms? Sholto estis kun sia frato hieraŭ nokte laŭ lia propra konfeso. La frato mortis de atako, kaj Sholto foriris kun la trezoro. Kiel tio ŝajnas al vi?”

## La Signo de la Kvar

“Post kio, la mortinto tre komplezeme leviĝis kaj ŝlosis la pordon de interne.”

“Hmm! Estas problemo tie. Ni apliku normalan prudenton. Thaddeus Sholto estis kun sia frato; estis kverelo; tiom ni scias. Neniu vidis la fraton, post kiam Thaddeus foriris. Li ne dormis en sia lito. Thaddeus estas evidente en tre maltrankvila mensa stato. Lia aspekto estas—nu, ne bela. Vi vidas, ke mi teksas mian reton ĉirkaŭ Thaddeus. La reto komencas fermiĝi sur lin.

“Vi ne ankoraŭ posedas ĉiujn faktojn,” diris Holms. “Ĉi tiu lignero estis en la kranahaŭto de la viro. Vi povas vidi la markon. Mi havas bonajn motivojn por kredi, ke ĝi estas venena. Ĉi tiu karteto, surskribita kiel vi vidas, estis sur la tablo; kaj apud tio kuŝis ĉi tiu iom kurioza instrumento kun ŝtona kapo. Kiel tiuj sidas en via teorio?”

“Ili konfirmas ĝin en ĉiu rilato,” diris la grasa detektivo pompe. “La domo estas plena de hindaj kuriozaĵoj. Thaddeus suprenportis tiun, kaj se la lignero estas venena, Thaddeus povis murde uzi ĝin tiel bone, kiel alia homo. La karteto estas ia ĉarlatanaĵo,—erarigilo plej probable. La sola demando estas kiel li foriris? Ha, kompreneble, jen truo en la plafono.” Kun granda vigleco, se oni konsideras lian mason, li saltis supre laŭ la ŝtupoj kaj trapremiĝis en la subtegmenton. Tuj poste ni aŭdis lian ĝojegan voĉon deklari, ke li trovis la klappordon.

“Li povas trovi ion,” rimarkis Holms levante la ŝultrojn. “Li foje havas ekbrilon de rezono. *Il n’y a pas des sots si incommodes que ceux qui ont de l’esprit!*”<sup>2</sup>

“Ĉu vi vidas?” diris Athelney Jones dum li reaperis malsupren laŭ la ŝtupoj. “Faktoj estas pli bonaj ol nuraj teorioj, malgraŭ ĉio. Mia opinio pri la kazo estas konfirmita. Estas klappordo komunikiĝanta kun la tegmento, kaj ĝi estas parte malfermita.”

“Estis mi, kiu malfermis ĝin.”

---

France: Ne estas stultuloj tiel ĝenantaj, kiel tiuj kun iom da sprito.<sup>2</sup>

## La Signo de la Kvar

“Ho, ja! Vi vidis ĝin do?” li ŝajnis iom desapontita je la novaĵo. “Nu, kiu ajn malkovris ĝin, tiel la sinjoro foriris. Inspektisto!”

“Jes, sinjoro,” de la pasejo.

“Petu S-ron Sholto enpaŝi,—S-ro Sholto, mi devas informi vin, ke io ajn, kion vi diros estos uzita kontraŭ vi. Mi arestas vin en la nomo de la reĝino, kiel partopreninton en la mortigo de via frato.”

“Jen! Ĉu mi ne diris tion al vi?” kriis la kompatinda, eta viro, etendante la manojn kaj rigardante de unu al la alia el ni.

“Ne maltrankviliĝu pri tio, S-ro Sholto,” diris Holms. “Mi pensas, ke mi povas promesi al vi, ke mi liberigos vin de tiu akuzo.”

“Ne promesu tro multe, S-ro Teoriisto,—ne promesu tro multe!” diris la detektivo. “Vi eble trovos tion pli malfacila ol vi kredas.”

“Mi ne nur liberigos lin de la akuzo, S-ro Jones, sed mi donacos al vi la nomon kaj priskribon de unu el la du homoj, kiuj estis en ĉi tiu ĉambro hieraŭ nokte. Mi havas ĉian kialon por kredi, ke lia nomo estas Johathan Small. Li estas malbone edukita, malgranda, agema, sen la dekstra kruro, kaj portanta lignan stumpon, kiu estas fortrivita je la interna flanko. Lia maldekstra boto havas krudan, kvadratan antaŭon, kaj feran bendon ĉirkaŭ la kalkanumo. Li estas mezaĝulo, sunbrulito, kaj iam estis konviktito. Ĉi tiuj malmultaj indikoj eble helpos vin, kune kun la fakto, ke sufiĉe multe da haŭto mankas de la polmo de lia mano. La alia viro—”

“Ha! ĉu alia viro—?” demandis Athelney Jones per rikana voĉo; sed mi povis vidi, ke li estas impresita de la precizeco de la alies konduto.

“Li estas iom kurioza persono,” diris Ŝerlok Holms turniĝante. “Mi esperas post ne longe prezenti ilin ambaŭ al vi.—mi devas paroli kun vi, Watson.”

Li elkondukis min al la fino de la ŝtuparo. “Ĉi tiu neatendita okazaĵo,” li diris, “kaŭzis nin perdi el la vido la originan celon de nia vojaĝo.”

## La Signo de la Kvar

“Mi ĵus pensis pri tio,” mi respondis. “Ne estas bone, ke F-no Morstan restus en ĉi tiu afliktita domo.”

“Ne. Vi devas eskorti ŝin hejmen. Ŝi loĝas kun S-no Cecil Forrester, en Lower Camberwell: do ne estas tre malproksime. Mi atendos vin ĉi tie, se vi reveturos. Aŭ eble vi estas tro laca?”

“Tute ne. Mi ne pensas, ke mi povus ripozi ĝis mi scios pli pri tiu fantazia afero. Mi jam vidis iom de la malbona flanko de la vivo, sed mi ĵuras al vi, ke ĉi tiu rapida sinsekvo de strangaj surprizoj komplete nervozigis min. Tamen, mi volus akompani vin ĝis la solvo de la kazo, jam alveninte ĝis ĉi tie.”

“Via ĉeesto multe servos min,” li respondis. “Ni laboros super la kazo sendepende, kaj ni lasos, ke tiu Jones fanfaronu pri iu ajn sensensaĵo, kiun li elektos konstrui. Post kiam vi lasos F-non Morstan hejme, bonvolu iri al numero 3, Vojeto Pinchin, proksime al la riverbordo en Lambeth. En la tria domo dekstre vivas birdoremburisto; li nomiĝas Sherman. Vi vidos mustelon tenantan junan kuniklon en la fenestro. Veku maljunan Sherman, salutu lin miaparte, kaj diru al li, ke mi tuj bezonas Toby. Vi revenigos Toby en la fiakro kun vi.”

“Hundo, mi supozas.”

“Jes,—stranga, miksrasa hundo, kun treege mirinda flarkapablo. Mi preferus la helpon de Toby, super tiu de la tuta detektivaro de Londono.”

“Mi venigos lin do,” diris mi. “Nun estas la unua. Mi devas reveni antaŭ la tria, se mi povos akiri freŝan ĉevalon.”

“Kaj mi,” diris Holms, “vidos kion mi povos ekscii de S-no Bernstone, kaj de la hinda servisto, kiu dormas en la apuda subtegmento, laŭ tio, kion S-ro Thaddeus diris al mi. Poste mi studos la metodojn de la granda Jones kaj aŭskultos liajn ne tro delikatajn sarkasmojn. ‘*Wir sind gewohnt das die Menschen verhöhnen was sie nicht verstehen.*’<sup>3</sup> Goete ĉiam trafas.”

---

Germane: Ni kutimiĝis al tio, ke la homoj mokas tion, kion ili ne komprenas.<sup>3</sup>

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro VII

#### La Epizodo de la Barelo

La policianoj jam alvenis en fiakro, kaj en tio mi eskortis F-on Morstan returne hejmen. En la anĝela maniero de virinoj, ŝi suferis la malbonajn momentojn kun serena vizaĝo, kiam estis iu pli malforta ol ŝi por subteni, kaj mi trovis ŝin vigla kaj trankvila apud la timigita mastrumistino. En la fiakro, tamen, ŝi unue svenemiĝis, kaj poste ekploris pasie,—tiel severe ŝin afliktis la aventuroj de la nokto. Ŝi diris al mi poste, ke ŝi pensis, ke mi estas malvarma kaj malintima en la vojaĝo. Ŝi malmulte suspektis pri la barakto interne de mia brusto, aŭ la sinregado, kiu detenis min. Mi volis proponi al ŝi miajn simpatiojn kaj mian amon, ĝuste kiel mi proponis al ŝi mian manon en la ĝardeno. Mi sentis, ke jaroj de ordinara vivo ne povus permesi al mi konatiĝi kun ŝia dolĉa, kuraĝa karaktero, kiel faris tiu unu tago de strangaj spertoj. Sed estis du pensoj, kiuj sigelis la vortojn de korinklino sur miaj lipoj. Ŝi estis malforta kaj senhelpa, ĉagrenita en menso kaj nervoj. Paroli al ŝi pri amo en tia momento estus fiprofiti de ŝi. Eĉ pli malbone, ŝi estis riĉa. Se la esploroj de Holms sukcesis, ŝi estus heredintino. Ĉu estus juste, ĉu estus honore, ke duonpaga kuracisto fiprofitu de intimeco, kiu ekestis nur pro hazardo? Ĉu ŝi ne eble kredus, ke mi estas nur vulgara ĉasisto al riĉaĵoj? Mi ne povis toleri la riskon, ke tia penso trafus ŝian menson eĉ dum momento. Tiu trezoro de Agra intervenis kiel nepasebla barilo inter ni.

Estis preskaŭ la dua, kiam ni venis al la domo de S-no Cecil Forrester. La servistoj jam enlitiĝis antaŭ horoj, sed S-no Forrester tiel interesiĝis pri la stranga mesaĝo, kiun F-no Morstan ricevis, ke ŝi maldormis atendente, ke ŝi revenos. Ŝi mem malfermis la pordon, mezaĝa, gracia virino, kaj ĝojigis min vidi kiel tenere ŝi ĉirkaŭbrakis la talion de la alia virino kaj kiel patrineca estis la voĉo, per kiu ŝi salutis ŝin. Ŝi klare ne estis nur pagata dungitino, sed honorata amikino. Ŝi prezentis min, kaj S-no Forrester sincere petis, ke mi envenu kaj diru al ŝi pri niaj aventuroj. Mi klarigis, tamen, la gravecon de mia tasko, kaj promesis nepre reveni kaj raporti pri ia ajn eventuala progreso, kiun ni havos kun la kazo. Dum ni forveturis, mi ŝtelrigardis malantaŭen, kaj ŝajnas al mi, ke mi ankoraŭ vidas tiun etan paron sur la ŝtupo, la du graciajn, interbrakumantajn



## La Signo de la Kvar

figurojn, la duonmalfermitan pordon, la lampon de la vestiblo brilantan tra la vitralo, la barometron, kaj la brilajn ŝtupstangojn. Estis kvietige kapti eĉ tiun pasantan ekvidon de trankvila, angla hejmo meze de la stranga kaj tenebra afero, kiu absorbis nin.

Kaj ju pli mi pensis pri kio okazis, des pli stranga kaj tenebra ĝi fariĝis. Mi reviziis la tutan eksterordinaran sinsekvon de okazaĵoj dum mi klakis laŭ la silentaj gase prilumataj stratoj. Estis la origina problemo: almenaŭ tio estis sufiĉe klara nun. La morto de Kapitano Morstan, la sendado de la perloj, la reklamo, la letero,—ni klarigis tiujn. Ili nur kondukis nin, tamen, al pli profunda kaj multe pli tragika mistero. La hinda trezoro, la kurioza plano trovita en la bagaĝo de Morstan, la stranga scenejo je la morto de Majoro Sholto, la retrovo de la trezoro tuj sekvita de la murdo de la trovinto, la tre strangaj kromdetaloj de la krimo, la piedsignoj, la rimarkinda armilo, la vortoj sur la karteto, respondantaj al tiuj sur la mapo de Morstan,—jen estis vera labirinto, en kiu homo ne posedanta la eksterordinarajn kapablojn de mia kunloĝanto malesperus trovi eĉ unu solan indicon.

Pinchin Lane estis vico de kadukaj duetaĝaj, brikaj domoj en la zono plej malalta de Lambeth. Mi devis frapi dum iom da tempo ĉe numero 3 antaŭ ol mi ricevis respondon. Fine, tamen, estis brileto de kandelo malantaŭ la rulkurteno, kaj vizaĝo elrigardis de supra fenestro.

“Iru for, ebria vagabondo,” diris la vizaĝo. “Se vi faros pli da bruo, mi malfermos la hundejojn kaj ellaso kvardek tri hundojn kontraŭ vi.”

“Se vi ellasos nur unu, tio estas mia motivo por alveno,” diris mi.

“Iru for!” kriis la voĉo. “Mi ĵuras, ke mi havas vipuron en ĉi tiu sako, kaj mi faligos ĝin sur vian kapon, se vi ne foriros.”

“Sed mi volas hundon,” mi kriis.

“Mi ne disputos,” kriis S-ro Sherman. “Nu, paŝu malantaŭen, ĉar kiam mi diros ‘tri’ jen venos la vipuro.”

“S-ro Ŝerlok Holms—” mi komencis diri, sed la vortoj havis tre magian efikon, ĉar la fenestro tuj brufermiĝis, kaj interne de minuto la pordo

## La Signo de la Kvar

estis malbarita kaj malfermita. S-ro Sherman estis alta, malgrasa maljunulo, kun kliniĝintaj ŝultroj, tendoneca kolo, kaj bluigitaj olkulvitroj.

“Amiko de Ŝerlok Holms estas ĉiam bonvena,” diris li. “Envenu, sinjoro. Ne proksimiĝu al la melo, ĉar ĝi mordas. Ha, hontindulo, ĉu vi penus mordeti la sinjoron?” Ĉi tio estis direktita al ermeno, kiu ŝovis la malican kapon kaj ruĝajn okulojn inter la stangetoj de sia kaĝo. “Ne timu tion, sinjoro: ĝi estas nur angvizo. Ĝi ne havas pikdentojn kaj mi lasas ĝin libera, ĉar ĝi malplimultigas la skarabojn. Bonvolu pardoni mian kolereton de antaŭe; la infanoj ne lasas min en trankvilo, kaj multaj venas laŭ ĉi tiu vojeto por frapi ĉe mia pordo. Kion deziras S-ro Ŝerlok Holms, sinjoro?”

“Li volas hundon vian.”

“Ha! Tio estos Toby.”

“Jes, Toby estis la nomo.”

“Toby loĝas en Numero 7 dekstre de ĉi tie.” Li moviĝis malrapide antaŭen tra la stranga, besta familio, kiun li kolektis ĉirkaŭ si. En la malforta, flagranta lumo, mi povis vidi, ke estas scivolemaj kaj briletantaj okuloj gvatantaj nin de ĉiu breĉeto kaj angulo. Eĉ la ĉevronoj super niaj kapoj tenis vicojn de selenaj birdoj, kiuj mallaboreme ŝanĝis la korppezon de unu kruro al la alia, kiam niaj voĉoj vekis ilin.

Mi trovis, ke Toby estas malbela, longhara falant-orelulo, duone spanielo kaj duone ĉashundo, kolore bruna kaj blanka, kun mallerta, anaspaŝa irmaniero. Ĝi akceptis, post iom da hezitado, sukerpecon, kiun la naturisto donis al mi, kaj, sigelante tiel aliancon, ĝi sekvis min al la fiakro, kaj akompanis min senĝene. La horloĝo de la palaco ĵus sonoris la trian, kiam mi troviĝis denove ĉe Loĝejo Pondicherry. La eksboksisto, McMurdo, estis arestita kiel helpanto, kaj li kaj S-ro Sholto estis portitaj al la stacio. Du policianoj gardis la mallarĝan barilpordon, kaj ili lasis min pasi post mia mencio de la nomo de la detektivo.

## La Signo de la Kvar

Holms staris sur la pordŝtupo kun la manoj en la poŝoj, fumanta sian pipon.

“Ha, jen vi havas lin!” diris li. “Saluton, hundo! Atheney Jones foriris. Okazis enorma elmonro de energio, post kiam vi foriris. Li arestis ne nur nian amikon, Thaddeus, sed ankaŭ la pordiston, la mastrumistinon, kaj la hindan serviston. Ni havas la tutan domon por ni solaj, krom unu serĝento supre. Lasu la hundon ĉi tie, kaj venu supren.”

Ni ligis Toby al la tablo de la vestiblo kaj reiris supren laŭ la ŝtuparo. La ĉambro estis kiel ni lasis ĝin, krom ke littuko nun kovris la centran figuron. Lacaspekta policserĝento apogiĝis en la angulo.

“Pruntu al mi vian celpunktan lanternon, serĝento,” diris mia kompano. “Nun ligu tiun pecon de ŝnuro ĉirkaŭ mia kolo por pendigi ĝin antaŭ mi. Dankon. Nu mi devas demeti la botojn kaj la ŝtrumpetojn,—portu ilin malsupren, Watson. Mi faros iom da grimrado. Kaj trempu mian poŝtukon en la krezoton. Tio sufiĉos. Nun suprenvenu en la subtegmenton kun mi dum momento.”

Ni grimpis tra la truon. Holms direktis sian lumon denove al la piedsignoj en la polvo.

“Mi volas, ke vi aparte rimarku tiujn piedsignoj,” li diris. “Ĉu vi observas ion notindan pri ili?”

“Ili apartenas al infano aŭ malgranda virino.”

“Krom ilia grandeco, tamen. Ĉu estas io alia?”

“Ili ŝajnas similaj al aliaj piedsignoj.”

“Tute ne. Rigardu ĉi tie! Tio estas la signo de la dekstra piedo en la polvo. Nun mi faras novan per mia piedo apud ĝi. Kio estas la ĉefa diferenco?”

“Viaj piedfingroj estas kunpremitaj. En la alia signo ĉiu piedfingro estas klare dividita de la aliaj.”

## La Signo de la Kvar

“Ĝuste tio. Memoru tion. Nun bonvolu paŝi al tiu klapfenestro kaj flaru la randon de la lignaĵo. Mi staros ĉi tie kun la poŝtuko en la mano.”

Mi faris, kiel li diris, kaj mi tuj flaris fortan, gudrecan odoron.

“Tien li metis la piedon, kiam li eliris. Se *vi* povas spuri lin, mi pensas, ke Toby ne havos problemon. Nun iru malsupren, malligu la hundon, kaj preparu vin por vidi ŝnurdanciston.”

Kiam mi atingis la ĝardenon, Ŝerlok Holms estis sur la tegmento, kaj mi povis vidi lin kiel enorman lampiron grimpantan tre malrapide laŭ la firsto. Mi perdis lin el la vido, kiam li pasis malantaŭ grupo de kamentuboj, sed li baldaŭ reaperis, kaj poste malaperis al la alia flanko de la tegmento. Kiam mi rondiris tien, mi trovis lin sidanta ĉe unu el la angul-aleroj.

“Ĉu estas vi, Watson?” li kriis.

“Jes.”

“Ĉi tie estas la loko. Kio estas tiu nigra objekto tie malsupre?”

“Akvobarelo.”

“Ĉu la kovrilo estas almetita?”

“Jes.”

“Ĉu ne estas eskalo?”

“Ne.”

“Damne! Ĉi tie estas kolrompa loko. Devas esti eble iri malsupren, kie li povis grimpi supren. Mi sentas, ke la pluvtubo estas sufiĉe solida. Jen mi venas, ĉiuokaze.”

Estis skrapado de piedoj, kaj la lanterno komencis veni konstante malsupren laŭ la flanko de la muro. Tiam, kun eta salto, li venis al la barelo, kaj de tie al la tero.

## La Signo de la Kvar

“Estis facile sekvi lin,” li diris surmetante siajn ŝrumpetojn kaj botojn. Tegoloj malfiksiĝis laŭ la tuta vojo, kaj en sia hastado li faligis ĉi tion. Ĝi konfirmas mian diagnozon, laŭ la dirmaniero de vi kuracistoj.”

La objekto, kiun li montris al mi, estis malgranda poŝo aŭ saketo teksita el koloraj herboj kaj kun kelkaj ornamaĉaj bidoj surfadenigitaj ĉirkaŭ ĝi. Interne estis ses dornoj el malhela ligno, akraj je unu fino kaj rondigitaj je la alia, kiel tiu, kiu trafis Bartholomew Sholto.

“Ili estas diablaj aferoj,” diris li. “Atentu, ke vi ne pikos vin. Mi estas tre kontenta, ke mi havas ilin, ĉar plej probable ili estas lia tuta provizo. Estas malpli da timo, ke vi aŭ mi baldaŭ trovos ion tian en la haŭto. Mi multe preferus alfronti kuglon de la britaj armitaj fortoj, persone. Ĉu vi estas preta por promeno de ses mejloj, Watson?”

“Certe,” mi respondis.

“Ĉu via kruro toleros tion?”

“Ho, jes.”

“Jen por vi, huĉjo! Bonega Toby. Flaru ĝin, Toby, flaru ĝin!” Li metis la kreozotan poŝtukon sub la nazon de la hundo, dum la besto staris kun siaj lanugaj kruroj disigitaj, kaj tre komika kapkliniĝo, kiel de spertulo flaranta la aromon de bonrikolta vino. Holms ĵetis la poŝtukon malproksimen, ligis fortan ŝnuron al la kolumo de la miksrasa hunda, kaj kondukis lin al la akvobarelo. La besto tuj komencis sinsekvon de akutaj, tremantaj bojoj, kaj, kun la nazo al la tero, kaj la vosto en la aero, sekvante la spuron tiel rapide, ke li streĉis la ligilon, kaj devigis nin kuri plenrapide.

La oriento jam laŭgrade blankiĝis, kaj ni povis vidi sufiĉe malproksimen en la malvarma griza lumo. La kvadrata, masiva domo, kun la nigraj, malplenaj fenestroj kaj altaj, senornamaj muroj, alte staris, malĝoja kaj mizera, malantaŭ ni. Nia vojo kuris trans la ĝardeno, serpente inter la tranĉeoj kaj truoj, kiuj vundis ĝin. La tuta loko, kun la diversaj teramasoj kaj miskreskintaj arbustoj, aspektis afliktita kaj misaŭgura, konforme al la nigra tragedio, kiu ŝvebis super ĝi.

## La Signo de la Kvar

Atinginte la liman muron, Toby kuris laŭlonge en ĝia ombro, ĝemante avide, kaj fine haltis ĉe angulo ŝirmita de juna fago. Kie la du muroj kuniĝis, diversaj brikoj estis malfiksitaj, kaj la postlasitaj fendoj estis trivitaj kaj rondigitaj je la malsupra rando, kvazaŭ iu ofte uzis ilin kiel eskalon. Holms grimpis supren, kaj, preninte la hundon de mi, li faligis ĝin je la alia flanko.

“Jen la signo de la mano de la lignakrurulo,” li rimarkis, dum mi suprengrimis apud lin. “Vi vidas la etan makulon de sango sur la gipso. Kiel bonŝance, ke ne forte pluvis post hieraŭ! La odoro kuŝos sur la vojo malgraŭ la pasado de dudek ok horoj.”

Mi konfesas, ke mi havis dubojn, kiam mi pensis pri la multa trafiko, kiu pasis laŭ vojo Londono en la intertempo. Miaj timoj baldaŭ malaperis, tamen. Toby neniam hezitis aŭ deviis, sed anuŝpaŝis antaŭen en sia kurioza, ruliĝanta maniero. Klare, la pika odoro de la krezoto elstaris super ĉiuj aliaj konkurantaj odoroj.



Toby neniam hezitis aŭ deviis

## La Signo de la Kvar

“Ne imagu,” diris Holms, “ke mi dependas por mia sukceso en ĉi tiu kazo de la simpla hazardo, ke unu el tiuj uloj metis la piedon en la kemiaĵon. Mi havas informojn nun, kiuj ebligas, ke mi spuru ilin en multaj diversaj manieroj. Ĉi tiu, tamen, estas la plej oportuna, kaj, ĉar la fortuna metis ĝin en niajn manojn, mi kulpas, se mi neglektus ĝin. Tamen, tio malebligis, ke la kazo fariĝus la bela intelekta problemo, kiu ĝi unue promesis esti. Eble estus iom da merito gajnebla el ĝi, se ne estis tiu tro palpebla indico.”

“Akoraŭ estas multe da merito,” diris mi. “Mi certigas vin, Holms, ke mi miras pri la rimedoj, per kiuj vi atingas viajn rezultojn, en ĉi tiu kazo eĉ pli ol en la kazo de Jefferson Hope. La afero ŝajnas al mi pli profunda kaj pli neklarigebla. Ekzemple, kiel vi priskribis tiel memfide la lignakrurulon?”

“Bah, mia kara amiko! Tio estis la simpleco mem. Mi ne volas esti teatra. Ĉio estas malkaŝe videbla. Du oficiroj komandantaj prizonon ekscias gravan sekreton pri kaŝita trezoro. Anglo nomita Jonathan Small desegnas mapon por ili. Vi memoras, ke ni vidis la nomon sur la mapo, kiun Kapitano Morstan posedis. Li subskribis ĝin por si mem, kaj por siaj kunuloj,—la signo de la kvar, kiel li iom drame nomis ĝin. Kun la helpo de tiu mapo, la oficiroj, aŭ unu el ili, akiras la trezoron kaj venigas ĝin al Anglujo, lasante, ni supozos, ian kondiĉon, sub kiu li ricevis ĝin, neplenumita. Nu, kial Jonathan Small ne mem akiris la trezoron? La respondo estas evidenta. La mapo datiĝas de tempo, kiam Morstan estis en proksima kontakto kun konviktoj. Jonathan Small ne akiris la trezoron, ĉar li kaj liaj kunuloj estis mem konviktoj kaj ne povis eskapi.”

“Sed tio estas nur konjektado,” diris mi.

“Tio esta pli. Tio estas la sola hipotezo, kiu ampleksas la faktojn. Ni vidu kiel ĝi kongruas kun postaj okazaĵoj. Majoro Sholto restas en paco dum jaroj, feliĉa kun sia trezoro. Tiam li ricevas leteron de Hindujo, kiu multe timigas lin. Kio estis tio?”

“Letero diranta, ke la viroj, kiujn li mistraktis estas liberigitaj.”

## La Signo de la Kvar

“Aŭ eskapis. Tio estas pli probabla, ĉar li sciis kio estas ilia puntempo. Tio ne estus surprizo al li. Kion li faras poste? Li ŝirmas sin kontraŭ lignakrurulo,—blanka viro, vi sciu, ĉar li misprenas blankan vendiston por li, kaj eĉ pafigas pistolon al li. Nu, estas la nomo de nur unu blankulo sur la mapo. La aliaj estas hinduoj kaj islamanoj. Ne estas alia blankulo. Tial ni povas diri kun certeco, ke la lignakrurulo estas identa al Jonathan Small. Ĉu la rezonado ŝajnas al vi erara?”

“Ne, ĝi estas klara kaj konciza.”

“Nu, bone, ni metu nin en la lokon de Jonathan Small. Ni rigardu de lia vidpunkto. Li venas al Anglujo kun la duobla ideo regajni tion, kion li konsideras sia laŭ rajto, kaj venĝi sin kontraŭ la viro, kiu mistraktis lin. Li sciigis pri kie Sholto loĝas, kaj tre eble komencis komunikadon kun iu en la domo. Estas tiu ĉefservisto, Lal Rao, kiun ni ne povis vidi. S-  
no Bernstone ne havas bonan opinion pri li. Small ne povis ekscii, tamen, kie la trezoro estas kaŝita, ĉar neniu iam sciis, krom la majoro kaj unu fidela servisto, kiu mortis. Subite, Small ekscias, ke la majoro estas en sia lito de morto. Freneze timanta, ke la sekreto de la trezoro mortos kun li, li kuregas tra la gardistoj, atingas la fenestron de la mortonto, sed ne povas enveni pro la ĉeesto de la du filoj. Freneze malamanta la mortinton, tamen, li eniras en la ĉambron tiun nokton, priserĉas liajn privatajn paperojn esperante trovi ian memorandon rilatan al la trezoro, kaj fine lasas memoraĵon de sia vizito en la mallonga skribaĵo sur la karteto. Probable li antaŭplanis, ke, se li mortigos la majoron, li lasos ian tian atestaĵon sur la kadavro, kiel signon, ke tio ne estis ordinara murdo, sed, de la vidpunkto de la kvar kunuloj, ago de justigado. Tiuspecaj kapricaj kaj bizaraj metaforoj estas sufiĉe komunaj en la kroniko de krimoj, kaj kutime donas valorajn indicojn pri la krimulo. Ĉu vi tute sekvas?”

“Tre klare.”

“Nu, kion povus fari Jonathan Small? Li povis nur sekrete gvati la penojn trovi la trezoron. Eble li forlasas Anglujon kaj revenas nur foj-foje. Tiam okazas la malkovro de la subtegmento, kaj oni tuj informas lin pri tio. Denove ni vidas la ĉeeston de ia komplico en la domanaro. Jonathan, kun la ligna kruro, tute ne povas atingi la altan ĉambron de



## La Signo de la Kvar

Bartholomew Sholto. Li venigas kun si, tamen, iom kuriozan kunulon, kiu superas tiun obstaklon, sed trempas la piedon en kreozoton, rezultante kun Toby, kaj sesmejla lamado de duonpaga oficiro kun difektita Ahila tendeno.”

“Sed estis la komplico, kaj ne Jonathan, kiu faris la krimon.”

“Tute ĝuste. Kaj tio multe ĝenis Jonathan, se oni juĝas per la maniero, en kiu li piedbatis la plankon, kiam li envenis en la ĉambron. Li ne havis rankoron kontraŭ Bartholomew Sholto, kaj preferus, ke li povus simple ligi lin kaj ŝtopi lian buŝon. Li ne volis meti sian kapon en ŝnurmaŝon. Tamen, la afero ne estis rebonigebla. La sovaĝaj instinktoj de lia kunulo jam estis liberigitaj, kaj la veneno faris sian laboron. Do Jonathan Small lasis sian atestaĵon, mallevis la trezorujon al la tero, kaj mem sekvis ĝin. Tio estis la sinsekvo de okazaĵoj, kiel mi povas deĉifri ilin. Koncerne lian personan aspekton, kompreneble li estas mezaĝa, kaj li devas esti sunbrulita post lia puntempo en forno kiel la insuloj Andaman. Lia alteco estas facile kalkulebla per la longeco de lia paŝo, kaj ni scias, ke li havas barbon. Lia multhareco estis la sola punkto, kiu impresis Thaddeus Sholto, kiam li vidis lin ĉe la fenestro. Mi ne scias, ĉu restas io alia.”

“La komplico?”

“Ha, bone, ne estas granda mistero pri tio. Sed vi sufiĉe baldaŭ scios ĉion pri tio. Kiel dolĉa estas la matena aero! Vidu kiel tiu sola nubeto ŝvebas kiel ruĝeta plumo de ia giganta flamenco. Jen la ruĝa rando de la suno puŝiĝas super la nubaro de Londono. Ĝi brilas sur multaj homoj, sed mi kuraĝus veti, ke neniuj havas irtaskon pli strangan ol nia. Kiel malgrandaj ni sentas nin kun niaj etaj ambicioj kaj strebadoj antaŭ la grandaj elementaj fortoj de la naturo. Kiel progresas via legado de Jean Paul?”

“Sufiĉe bone. Mi malkovris lin dank’ al Carlyle.”

“Tio estis kiel sekvado de roĵo al ĝia fonta lago. Li faras unu kuriozan, sed profundan rimarkon. La ĉefa pruvo pri la grandeco de la homo kuŝas en lia percepto pri sia malgrandeco. Tio montras, vi vidu, kapablon

## La Signo de la Kvar

kompari kaj estimi, kiu estas en si mem pruvo pri nobleco. Estas multe da mensnutrado en Richter. Vi ne havas pistolon, ĉu?”

“Mi havas mian bastonon.”

“Povus esti eble, ke ni bezonos ion tian, kiam ni venos al ilia kaŝejo. Mi lasos Jonathan al vi, sed, se la alia malagrabliĝos, mi mortpafos lin.” Li eltiris sian revolveron, dum li parolis, ŝargis du el la kuglujojn, kaj remetis ĝin en la dekstran poŝon de sia jaketo.

Dum tiu tempo ni sekvis la gvidadon de Toby laŭ la duonkamparaj vojoj de vilaoj, kiuj kondukas al la metropolo. Sed nun ni venis al kontinuaj stratoj, kie laboristoj kaj dokistoj jam moviĝis, kaj neglektemaj virinoj demetis ŝutrojn kaj balais pordoŝtupojn. Ĉe la kvadratsegmentaj, stratangulaj drinkejoj, komerco ĵus komenciĝis, kaj krudaspektaj viroj elvenis, frotante la barbon per la maniko post la matena drinkado. Fremdaj hundoj alpromenetis al ni kaj rigardis nin mireme dum ni pasis. Sed nia neimitebla Toby ne rigardis dekstren aŭ maldekstren, sed plutrotis kun la nazo al la tero, foje blekante avide, indikante freŝan odoron.

Ni jam pasis laŭ Streatham, Brixton, Camberwell, kaj nun ni trovis nin en Vojeto Kennington, post deturniĝo tra la flankstratoj de Oval. La viroj, kiujn ni postsekvis, ŝajne iris laŭ kurioze zigzaga vojo, probable kun la ideo eviti observadon. Ili neniam sekvis ĉefvojon, se paralela flankvojo servis ilin. Ĉe la fino de Vojeto Kennington, ili maldekstreniĝis laŭ Strato Bond kaj Strato Miles. Kie tiu lasta fariĝas Placo Knight, Toby haltis, kaj komencis kuri antaŭen-malantaŭen kun unu orelo levita kaj la alia mallevita, en la perfekta bildo de hunda nedecidipovo. Tiam li anserpaŝis en rondo, rigardante nin de tempo al tempo, kvazaŭ petanta simpation en sia embaraso.

“Kio diable estas kun la hundo?” grumblis Holms. “Ili certe ne ekluis fiakro, aŭ forflugis en balono.”

“Eble ili staris ĉi tie dumio, mi sugestis.”

## La Signo de la Kvar

“Ha! En ordo. Li ekiras denove,” diris mia kompano, kun nuanco de senŝarĝigo.

Li certe ekiris, ĉar post reĉirkaŭsnufado li subite decidis, kaj foriris kun energio kaj rezoluteco pli fortaj ol antaŭe. La odoro ŝajne estis pli forta, ĉar li ne eĉ metis la nazon al la tero, sed tiretis la ligilon kaj penis ekkuri. Mi povis vidi per la brileto en la okuloj de Holms, ke li pensas, ke ni proksimiĝas al la fino de nia vojaĝo.

Nia vojo nun kuris laŭ Nine Elms ĝis ni venis al la granda lignejo-korto de Broderick kaj Nelson, tuj preter la taverno White Eagle. Ĉi tie la hundo, freneza kun emocio, turniĝis tra la flanka barilpordo kaj en la korton, kie la segistoj jam laboris. Antaŭen la hundo kuris tra la segpolvo kaj rabotaĵoj, laŭ strateto, tra pasejo, inter du ligno-amasoj, kaj fine, kun triumfa jelpo, saltis sur grandan barelon, kiu ankoraŭ staris sur la ĉareto, per kiu oni venigis ĝin. Kun la lango eligita kaj la okuloj palpebrumantaj, Toby staris sur la barelo, rigardante de unu al la alia el ni por signo de aprobo. La daŭboj de la barelo kaj la radoj de la ĉareto estis ŝmiritaj per malhela likvo, kaj la aero estis ŝarĝita de la odoro de kreozoto.

Ŝerlok Holms kaj mi rigardis unu la alian senesprime, kaj tiam ni samtempe ekridegis neregeble.

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro VIII

#### La Neregula Detektivaro de Strato Baker

“Kion nun?” mi demandis. “Toby perdis sian seneraran karakteron.”

“Li agis laŭ sia propra kompreno,” diris Holms, levante lin de sur la barelo kaj irigante lin el la lignejo-korto. “Se oni konsideras kiom da kreozoto estas portita tra Londono en unu tago, ne estas surprize, ke niaj spuroj estus transiritaj. Ĝi estas multe uzata nun, precipe por la impregnado de ligno. Tio ne estas la kulpo de Toby.”

“Ni devas reiri al kie li perdis la spuron, mi supozas.”

“Jes. Kaj, bonŝance, ni ne devas iri longan distancon. Ŝajne la hundo estis kofuzita ĉe la angulo de Placo Knight’s, ĉar estis du malsamaj postsignoj kurantaj en kontraŭaj direktoj. Ni sekvis la malĝustan. Ni nur devas sekvi la alian.”

Tio ne estis malfacile. Kondukinte Toby al la loko, kie li eraris, li serĉis en granda rondo kaj fine forhastis en nova direkto.

“Ni devas zorgi, ke li nun ne venigu nin al la origino de la barelo de kreozoto,” mi diris.

“Mi pensis pri tio. Sed rimarku, ke li restas sur la trotuaro, kvankam la barelo pasis laŭ la vojo. Ne, ni sekvas la ĝustan odoron nun.”

Ĝi malsupren iris direkte al la riverbordo, kurante tra Placo Belmont kaj Strato Prince. Ĉe la fino de Strato Broad, ĝi kuris ĝuste al la akvolimo, kie estis malgranda, ligna varfo. Toby kondukis nin al la rando mem de tio, kaj staris plendante, rigardante la malluman fluon ĉe siaj piedoj.

“Jen fino de nia sorto,” diris Holms. “Ili pluiris en boato.” Kelkaj malgrandaj prametoj kaj remboatoj kuŝis en la akvo kaj sur la varforando. Ni kondukis Toby al ĉiu siavice, sed, kvankam li snufis avide, li faris nenian signon.

## La Signo de la Kvar

Proksime al la kruda alteriĝejo estis malgranda, brika domo, kun ligna afiŝo pendigita de la fenestro de la supra etaĝo. “Mordecai Smith” estis pentrita en grandaj literoj, kaj sub tio estis, “Boatoj luotaj pohore kaj potage.” Dua skribaĵo super la pordo informis nin, ke estas disponebla vaporŝalupo,—aserto, kiu estis konfirmita de granda amaso de koakso sur la ĝeto. Ŝerlok Holms ĉirkaŭrigardis malrapide, kaj misaŭgura esprimo aperis en lia vizaĝo.

“Tio aspektas malbona,” diris li. “Tiuuj uloj estas pli sagacaj ol mi atendis. Ŝajnas, ke ili forviŝis siajn spurojn. Mi timas, ke oni antaŭplanis ĉion.”

Dum li proksimiĝis al la pordo de la domo, ĝi malfermiĝis, kaj eta buklohara sesjara bubo elkuris, sekvate de iom korpulenta, ruĝvizaĝa virino kun granda spongo en la mano.

“Vi revenu kaj estu lavata, Jack,” ŝi kriis. “Revenu, juna diableto; ĉar, se via patro revenos kaj trovos vin tia, ni ambaŭ aŭdos pri tio.”

“Kia ĉarma knabo!” diris Holms strategie. “Kia rozvanga juna fripono! Bone, Jack, ĉu estas io, kion vi dezirus?”

La junulo konsideris dum momento. “Plaĉus al mi ŝilingo,” diris li.

“Ĉu estas nenio, kio pli plaĉus al vi?”

“Pli plaĉus al mi du ŝilingoj,” diris la mirindulo, post iom da pensado.

“Jen ili do! Kaptu!—bela infano, S-no Smith!”

“Dio benu vin, sinjoro, li estas tia, kaj ankaŭ obstina. Mi apenaŭ povas regi lin, precipe, kiam mia viro estas for dum tagoj.”

“Ĉu li estas for?” diris Holms, kun seniluziita voĉo. “Mi tre bedaŭras tion, ĉar mi volis paroli al S-ro Smith.”

“Li estas for de hieraŭ matene, sinjoro, kaj, se diri la veron, mi komencas timi pri li. Sed, se temas pri boato, sinjoro, eble mi povus servi vin same bone.”

## La Signo de la Kvar

“Mi volis lui lian vaporŝalupon.”

“Ho, Dio benu vin, sinjoro, li foriris en la vaporŝalupo. Tio konfuzas min; ĉar mi scias, ke ne estas pli da karbo en ĝi por irigi ĝin al Woolwich kaj returne. Se li estus for en la barĝo, tio ne surprizus min. Multajn fojojn li devis iri tiel malproksimen kiel Gravesend por labortasko, kaj poste, se estis multe por fari tie, li eble tranoktis. Sed kiel servas vaporŝalupo sen karbo?”

“Eble li aĉetis karbon ĉe varfo malsupre sur la rivero.”

“Li povus fari tion, sinjoro, sed tio ne estis lia kutimo. Multajn fojojn mi aŭdis lin plendi pri la prezoj, kiujn ili postulas por kelkaj sakoj. Krom tio, malplaĉas al mi tiu lignakrurulo, kun lia malbela vizaĝo kaj strangege parolado. Kiacele li tiel multe lantis ĉi tie?”

“Ĉu lignakrurulo?” diris Holms, apenaŭ surprizita.

“Jes, sinjoro, bruna, simivizaĝa ulo, kiu vizitis mian viron pli ol unu fojon. Li ellitigis lin hieraŭ nokte; kaj mia viro sciis, ke li venos, ĉar la vaporo estis preta en la ŝalupo. Mi diras al vi rekte, sinjoro, mi ne estas trankvila en la menso pri tio.”

“Sed, mia kara S-no Smith,” diris Holms levante la ŝultrojn, “vi timas sen kaŭzo. Kiel estus eble, ke vi scius, ke estis la lignakrurulo, kiu venis en la nokto? Mi ne bone komprenas, kiel vi povas esti tiel certa.”

“Lia voĉo, sinjoro. Mi konas lian voĉon, kiu estas iom ronka kaj raŭka. Li frapetis sur la fenestro,—ĉirkaŭ la tria. ‘Leviĝu, kamarado,’ diris li: ‘estas la horo de la ŝanĝo de la gardistoj.’ Mia viro vekis Jim,—tiu estas mia plejaĝa filo,—kaj ili foriris, sen ia vorto al mi. Mi povis aŭdi la lignan kruron klakantan sur la ŝtonoj.

“Kaj ĉu tiu lignakrurulo estis sola?”

“Mi ne povus diri, sinjoro. Mi ne aŭdis alian.”

“Mi bedaŭras, S-no Smith, ĉar mi volis vaporŝalupon, kaj mi aŭdis bonajn informojn pri—nu, kio estas ĝia nomo?”

## La Signo de la Kvar

“*Aurora*, sinjoro.”

“Ha! Ĝi ne estas tiu malnova, verda ŝalupo kun la flava strio, kun tre larĝa baŭo, ĉu?”

“Tute ne. Ĝi estas la plej bela kaj kapabla boato en la rivero. Ĝi estas nove farbita, nigra kun du ruĝaj strioj.”

“Dankon. Mi esperas, ke vi baldaŭ aŭdos de S-ro Smith. Mi iras malsupren laŭ la rivero; kaj, se mi vidos *Aurora*, mi diros al li, ke vi estas maltrankvila. Ĉu vi diris, ke ĝi havas nigran fumtubon?”

“Ne, sinjoro. Nigran kun blanka bendo.”

“Ha, kompreneble. Estis la flankoj, kiuj estis nigraj. Bonan matenon, S-ro Smith,—Estas boatisto ĉi tie kun pramŝipo, Watson. Ni iros per tio trans la riveron.

“Plej grave kun tiaj homoj,” diris Holms, dum ni sidis sur la benko de la boato, “estas neniam lasi ilin pensi, ke iliaj informoj havas la plej malgrandan intereson al vi. Se oni faros tion, ili tuj silentos kiel ostro. Se oni aŭskultos ilin kontraŭvole, oni probable akiros tion, kion oni volas.”

“Nia vojo nun aspektas sufiĉe klara,” diris mi.

“Kion vi farus do?”

“Mi luus ŝalupon kaj irus malsupren laŭ la rivero serĉante *Aurora*.”

“Mia kara amiko, tio estus kolosa tasko. Ĝi eble haltiĝis ĉe iu ajn el la varfoj en ĉiu flanko de la fluo inter ĉi tie kaj Geenwich. Malsupre de la ponto tie, estas vera labirinto de albordiĝejoj, laŭ multaj mejloj. Necesus multaj tagoj priserĉi ilin ĉiujn, se oni penus fari tion sola.”

“Ĉu ni uzu la policon do?”

“Ne. Mi probable envokos Athelney Jones je la lasta momento. Li ne estas malbona ulo, kaj mi ne volus fari ion, kio malutilus al li profesie. Sed veninte ĝis ĉi tiu punkto, mi ŝatus mem ellabori la aferon.”

## La Signo de la Kvar

“Ĉu ni povus reklami do, petante informojn de varfistoj?”

“Multe pli malbone! Niaj celatoj ekscius, ke ni tuj postsekvus ilin, kaj ili fuĝus el la lando. Eĉ sen tio, ili probable foriros, sed dum ili pensas, ke ili estas perfekte sekuraj, ili ne hastos. La agado de Jones estos utila al ni tiurilate, ĉar lia opinio certe estos raportita en la tagaj ĵurnaloj, kaj la forkurantoj pensos, ke ĉiuj sekvas la malĝustan spuron.”

“Kion ni faru do?” mi demandis, dum ni albordiĝis proksime al Prizonego Millbank.

“Ni iros hejmen en ĉi tiu fiakro, matenmanĝos, kaj dormos unu horon. Estas tre probable, ke ni denove iros piede hodiaŭ nokte. Haltu ĉe telegrafejo, fiakristo. Ni konservos Toby, ĉar li ankoraŭ eble estos utila al ni.

Ni haltis ĉe la poŝtejo de Strato Great Peter, kaj Holms sendis sian telegramon. “Al kiu vi kredas, ke tio estas adresita?” li demandis, dum ni reekvojaĝis.

“Mi certas, ke mi ne scias.”

“Ĉu vi memoras la divizion Strato Baker de la detektivaro, kiun mi uzis en la kazo de Jefferson Hope?”

“Bone,” diris mi ridante.

“Ĉi tiu estas la speco de kazo, en kiu ili povus estis ekstreme utilaj. Se ili malsukcesos, mi havas aliajn rimedojn; sed unue mi provos per ili. Tiu telegramo iris al mia malpura, eta leŭtenanto, Wiggins, kaj mi atendas, ke li kaj lia bando alvenos antaŭ ol ni finos matenmanĝi.”

Estis nun inter la oka kaj la naŭa, kaj mi konsciis pri forta reago en mi mem post la sinsekvaj ekscitoj de la nokto. Mi estis malforta kaj elĉerpita, konfuzita mense kaj lacega korpe. Mankis al mi la profesia entuziasmo, kiu helpis mian kompanon elteni, kaj mi ne povis rigardi la aferon, kiel nur abstraktan, intelektan problemon. Koncerne la morton de Bartholomew Sholto, mi aŭdis malmulte da bono pri li, kaj mi ne povis senti grandan antipation kontraŭ liaj murdintoj. La trezoro, tamen,



## La Signo de la Kvar

estis alia afero. Tio, aŭ parto de ĝi, apartenis al F-no Morstan. Dum estis ŝanco trovi ĝin, mi pretis dediĉi mian vivon al tiu sola celo. Estis vere, ke, se mi trovus ĝin, tio probable farus ŝin neatingebla de mi. Sed amo, kiu estus influita de tia penso, estus etanima kaj egoisma. Se Holms povis labori por trovi la krimulojn, mi havis dekoble pli fortan motivon urĝante min trovi la trezoron.

Bano ĉe Strato Baker kaj kompleta transvestiĝo freŝigis min mirinde. Kiam mi malsuprenvenis al nia ĉambro, mi trovis matenmanĝon sur la tablo kaj Holms elverŝanta la kafon.

“Jen ĝi,” diris li, ridante kaj almontrante la ĵurnalon. “La energia Jones kaj la ĉiea raportisto solvis ĉion. Sed vi jam havis sufiĉe de la kazo. Prefere unue vi havu ŝinkon kaj ovojn.”

Mi prenis la ĵurnalon de li kaj legis la mallongan artikolon titolitan “Mistera Afero en Upper Norwood.”

“Ĉirkaŭ la dekdua hieraŭ nokte,” diris *Standard*, “Oni trovis S-ron Bartholomew Sholto, de Loĝejo Pondicherry, en Upper Norwood, morta en lia ĉambro sub cirkonstancoj indikantaj kriman konduton. Laŭ kiom ni povis ekscii, ne estis spuro de perforto sur la korpo de S-ro Sholto, sed valora kolekto de hindaj gemoj, kiun la mortinta sinjoro heredis de sia patro estis forportita. La kadavro estis trovita de S-ro Ŝerlok Holms kaj D-ro Watson, kiuj venis viziti la domon kun S-ro Thaddeus Sholto, la frato de la mortinto. Pro mirinda bonŝancaĵo, S-ro Athelney Jones, la bone konata membro de la polica detektivaro, estis en la Polica Stacio de Norwood, kaj estis en la loko interne de duonhoro de la unua alarmo. Li tuj direktis siajn trejnitajn kaj spertajn kapablojn al la eltrovado de la krimuloj, kun la kontentiga rezulto, ke la frato, Thaddeus Sholto, jam estas arestita, kune kun la mastrumistino, S-no Bernstone, hinda ĉefservisto nomita Lal Rao, kaj pordisto, aŭ barilpordisto nomita McMurdo. Estas tute certe, ke la ŝtelisto aŭ ŝtelistoj bone konis la domon, ĉar la bone konata teknika scio kaj la kapabloj de detala observado de S-ro Jones ebligis, ke li pruvu decidige, ke la malbonfarintoj ne povis enveni tra la pordo aŭ la fenestro, sed devis veni trans la tegmento de la konstruaĵo, kaj tra klappordo en ĉambron ligitan al tiu, en kiu la kadavro troviĝis. Tiu fakto, kiu estis tre klare difinita,

## La Signo de la Kvar

pruvas decidige, ke la afero ne estis nur hazarda domŝtelado. La senprokrasta kaj vigla agado de la policianoj montras la grandan avantaĝon de la ĉeesto en tiaj okazoj de unu sola vigla kaj mastreca menso. Ni ne povas ne pensi, ke ĝi prezentas argumenton por tiuj, kiuj volus, ke niaj detektivoj estu malpli koncentritaj, tiel metante ilin en pli proksima kaj efektiva kontakto kun la kazoj, kiujn ili devas esplori.”

“Ĉu ĝi ne estas belega?!” diris Holms, ridetante super sia kaftaso. “Kion vi pensas pri ĝi?”

“Mi pensas, ke ni mem apenaŭ evitis areston por la krimo.”

“Mi konsentas. Mi ne kredas, ke ni estus sekuraj, se li havus alian tian atakon de energio.”

En tiu momento, estis laŭta sonoro de la sonorilo, kaj mi povis aŭdi S-non Hudson, nia luigantino, elkrii en ululo de protesto kaj konsterniĝo.

“Ĉielo, Holms,” mi diris duonleviĝante. “Mi kredas, ke oni fatke venas por ni.”

“Ne, ne estas tiel malbone. Tio estas la neoficiala forto,—la neregulaj detektivoj de Strato Baker.

Dum li parolis, ekvenis rapida frapetado de nudaj piedoj supren laŭ la ŝtuparo, klakado de akutaj voĉoj, kaj enhastis dekdu malpuraj kaj ĉifonaj, etaj senhejmaj knaboj. Estis kelkaj signoj de disciplino inter ili, malgraŭ ilia tumulta enveno, ĉar ili tuj formis linion kaj staris rigardante nin kun antipicantaj vizaĝoj. Unu el ili, pli alta kaj pli maljuna ol la aliaj, paŝis antaŭen kun mieno de senzorga supereco, kiu estis tre amuza en tiel ĉifona, eta birdotimigilo.

“Mi ricevis vian mesaĝon, sinjoro,” diris li, “kaj mi venigis ilin tuj. Tri ŝilingojn kaj ses pencojn por biletoj.”

“Jen,” diris Holms, prezentante iom da moneroj. “En la estonteco, Wiggins, ili povas prezenti sin al vi, kaj vi al mi. Mi ne povas akcepti ĉi tian invadon de la domo. Tamen, estas bone, ke vi ĉiuj aŭdos la instrukciojn. Mi volas trovi la lokon de vaporŝalupo nomita *Aurora*,

## La Signo de la Kvar

apartenanta al Mordecai Smith, nigra kun du ruĝaj strioj, kun nigra fumtubo kun blanka bendo. Ĝi estas ie sur la rivero. Mi volas, ke unu knabo restu ĉe la varfejo de Mordecai Smith kontraŭ Millbank, por vidi ĉu la boato revenos. Vi devas dividi la serĉadon inter vi, komplete priserĉante ambaŭ bordojn. Sciigu min tuj kiam vi havas novaĵojn. Ĉu ĉio estas klara?”

“Jes, ĉefo,” diris Wiggins.

“La kutima pagado, plus gineo al la knabo, kiu trovos la boaton. Jen antaŭpago por unu tago. Nun, ek!” Li donis al ili po unu ŝilingon, kaj ili forzumis malsupren laŭ la ŝtuparo, kaj mi vidis ilin post momento forfluantaj laŭ la strato.

“Se la ŝalupo estas supre de la akvo, ili trovos ĝin,” diris Holms, dum li leviĝis de la tablo kaj bruligis sian pipon. Ili povas iri ĉien, vidi ĉion, subaŭskulti ĉiujn. Mi atendas, ke antaŭ la vespero ni aŭdos, ke ili vidis ĝin. Intertempe, ni povas fari nenion krom atendi rezultojn. Ni ne povas sekvi la rompitan spuraron ĝis ni aŭ trovos *Aurora* aŭ trovos S-ron Mordecai Smith.”

“Mi supozas, ke Toby povas manĝi ĉi tiujn restaĵojn. Ĉu vi enlitiĝos, Holms?”

“Ne; mi ne estas laca. Mi havas kuriozan organismon. Mi tute ne memoras, ke mi iam sentis min laca pro laborado, sed senokupeco elĉerpas ĉion el mi. Mi fumos kaj pensos pri ĉi tiu stranga afero, kiun nia bela klientino prezentis al ni. Se iam ajn estis facila tasko, ĉi tio devas esti tia. Lignakruruloj ne estas tre komunaj, sed mi pensas, ke la alia viro devas esti absolute unika.”

“Ankoraŭfoje tiu alia viro!”

“Mi ne volas fari el li misteron,—almenaŭ ne al vi. Sed vi certe formis vian propran opinion. Nu, konsideru la datumojn. Etaj piedoj, piedfingroj neniam kunigitaj de botoj, nudaj piedoj, ŝtonkapa ligna klabo, granda facilmoveco, etaj venensagetoj. Kiom vi konkludas de tio?”

## La Signo de la Kvar

“Sovaĝulo!” mi kriis. “Eble unu el tiuj hindoj, kiuj estis la kunuloj de Jonathan Small.”

“Tute ne,” diris li. “Kiam mi unue vidis signojn de nekonataj armiloj, mi inklinis pensi tiel; sed la rimarkindeco de la piedsignoj persvadis min ŝanĝi miajn opiniojn. Kelkaj el la enloĝantoj de la Hinda Duoninsulo estas malgrandaj viroj, sed neniu postlasis tiajn markojn. La hinduo mem havas longan, maldikan piedon. La sandalportanta islamano havas piedpolekson disigitan de la aliaj piedfingroj, ĉar la laĉo normale pasas inter ili. Ankaŭ ĉi tiuj sagetoj povus esti pafitaj en nur unu maniero. Ili estas de blovpafilo. Bone do, kie ni trovos nian sovaĝulon?”

“Suda Ameriko,” mi konjektis.

Li etentdis la manon kaj malsupren prenis grandegan volumon de la breto. “Ĉi tio estas la unua volumo de geografia registro, kiun oni lastatempe eldonas. Kio estas tio? ‘Insuloj Andaman, situantaj 340 mejlojn norde de Sumatro, en la Golfo de Bengalio.’ Hm! Hm! Kio estas tio? Malseka klimato, koralrifoj, ŝarkoj, Haveno Blair, konviktprizono, Insulo Rutland, kotonplantoj—Ha, jen. ‘La indiĝenoj de Insuloj Andaman eble povas pretendi la titolon de la plej malgranda raso sur la tero, kvankam kelkaj antropologoj voĉdonus por la boŝmanoj de Afriko, la indianoj Pajut de Usono, aŭ la indianoj de Fuego. Ilia meza alteco estas iom malpli ol kvar futoj, kvankam multaj plenkreskaj adoltoj troviĝas, kiuj estas multe pli malgrandaj ol tio. Ili estas furiozaj, malbonhumoraj, kaj malamikemaj homoj, kvankam ili kapablas formi tre sindonajn amikecojn, kiam oni gajnas ilian fidon.’ Rimarku tion, Watson. Nun aŭskultu ĉi tion. ‘Ili estas nature malbelegaj, havante misformitan kapon, malgrandajn, kruelajn olkulojn, kaj torditaj trajtoj. Iliaj piedoj kaj manoj, tamen, estas rimarkinde malgrandaj. Tiel malamikemaj estas ili, ke ĉiuj penoj de la britaj ŝtatoficistoj malsukcesis starigi rilatojn kun ili. Ili ĉiam estis teruro al ŝiprompintaj ŝipanoj, batante la kapon de postvivintoj per ŝtonkapaj klaboroj, aŭ pafante ilin per venensagoj. Post tiaj masakroj ĉiam sekvis kanibala festeno.’ Agrablaj, afablaj homoj, Watson! Se tiu ulo estus lasita agi senĝene, la afero eble estus eĉ pli abomena. Post ĉio, mi supozas, ke Jonathan Small multe bedaŭras, ke li decidis uzu lin.”

## La Signo de la Kvar

“Sed kiel li akiris tiel strangan kompanon?”

“Ha, tio estas pli ol mi scias rakonti. Tamen, ĉar ni jam konstatis, ke Small venis de Insuloj Andaman, ne estas tre mirinde, ke tiu insulano akompanus lin. Sendube ni scios ĉion pri tio posttome. Aŭdu, Watson; vi aspektas lacega. Kuŝiĝu tie sur la sofo, kaj ni vidos ĉu mi povas dormigi vin.”

Li prenis sian violonon de la angulo, kaj, dum mi kuŝigis min, li komencis ludi malaltan, reveman, melodian arion,—sendube ion lian propran, ĉar li havis rimarkindan kapablon improvizi. Mi havas svagan memoron pri liaj malgrasaj brakoj, lia sincera vizaĝo, kaj la leviĝo kaj malleviĝo de lia arĉo. Tiam ŝajnis, ke mi flosas pace for sur mola maro el sono, ĝis mi trovis min en sonĝolando, kun la dolĉa vizaĝo de Mary rigardanta malsupren al mi.

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro IX

#### Rompiĝo en la Ĉeno

Estis malfrue en la posttagmezo antaŭ ol mi vekigis, fortigita kaj freŝigita. Ŝerlok Holms ankoraŭ sidis precize kiel mi laste vidis lin, krom ke li flankenmetis sian violonon kaj estis absorbita en libro. Li rigardis min, kiam mi moviĝis, kaj mi rimarkis, ke lia vizaĝo estas malgaja kaj maltrankvila.

“Vi dormis profunde,” li diris. “Mi timis, ke nia parolado vekos vin.”

“Mi aŭdis nenion,” mi respondis. “Ĉu vi havas novaĵojn do?”

“Bedaŭrinde, ne. Mi konfesas, ke mi estas surprizita kaj desapontita. Mi atendis ion difinitan ĝis nun. Wiggins ĵus venis raporti. Li diras, ke ili ne povas trovi spuron de la ŝalupo. Tio estas iritanta obstaklo, ĉar ĉiu horo estas grava.”

“Ĉu mi povas fari ion? Mi estas perfekte freŝa nun, kaj tute preta por alia nokta ekskurso.”

“Ne, ni povas fari nenion. Ni nur povas atendi. Se ni mem elirus, la mesaĝo eble venus dum nia foresto kaŭzante prokraston. Vi povas fari kion vi volos, sed mi devas resti en mia posteno.

“Tiuokaze, mi iros al Camberwell kaj vizitos S-non Cecil Forrester. Hieraŭ ŝi petis, ke mi faru tion.”

“Ĉu S-non Forrester?” demandis Holms, kun ekbrilo de rideto en la okuloj.

“Nu, kompreneble, ankaŭ F-non Morstan. Ili multe deziris aŭdi pri kio okazis.”

“Mi ne dirus al ili tro multe,” diris Holms. “La virinoj neniam estas tute fidindaj,—ne eĉ la plej bonaj.”

Mi ne paŭzis por disputi pri tiu abomena opinio. “Mi revenos post unu-du horoj,” mi rimarkis.

## La Signo de la Kvar

“Tute bone! Bonan ŝancon! Sed, se vi transiros la riveron, estus bone, ke vi redonos Toby, ĉar mi tute ne kredas, ke estas probable, ke li utilos al ni nun.”

Mi portis la mikstrasulon do, kaj lasis lin, kune kun duonsuvereno, ĉe la maljuna naturalisto en Vojeto Pinchin. En Camberwell mi trovis F-non Morstan iomete laca post la aventuroj de la nokto, sed avida aŭdi la novaĵojn. Mi diris al ili ĉion, kion ni faris, ellasante la plej timegigajn partojn de la tragedio. Tiel, kvankam mi parolis pri la morto de S-ro Sholto, mi diris nenion pri la preciza maniero kaj metodo por tio. Malgraŭ miaj multaj ellasoj, tamen, estis sufiĉe por konsterni kaj mirigi ilin.

“Tio estas kiel novelo!” kriis S-no Forrester. “Ofendita virino, trezoro de duonmiliono, nigra kanibalo, lignakrura krudulo. Ili anstataŭas la tradiciajn drakon kaj malican grafon.”

“Kaj du vagantaj kavaliroj al la savo,” aldonis F-no Morstan, kun brila ekrigardo al mi.”

“Nu, Mary, via fortuno dependas de la rezulto de tiu serĉado. Mi ne kredas, ke vi estas sufiĉe ekscitita. Imagu kiel estus esti tiel riĉa, kaj havi la mondon ĉe viaj piedoj!”

Mi sentis etan ĝojtremon en la koro, vidante, ke ŝi ne elmontras signon de ekzaltiĝo pro tiu ebleco. Male, ŝi levis la fieran kapon, kvazaŭ tio malmulte interesis ŝin.

“Mi estas maltrankvila nur pri S-ro Thaddeus Sholto,” ŝi diris. “Nenio alia gravas; sed mi kredas, ke li kondukis honorinde dum la tuta afero. Estas nia devo liberigi lin de tiu terura kaj senbaza akuzo.”

Estis vespero antaŭ ol mi foriris de Camberwell, kaj tute mallume kiam mi venis hejmen. La libro kaj pipo de mia kompano kuŝis apud lia seĝo, sed li jam malaperis. Mi rigardis ĉirkaŭe en espero vidi noton, sed estis nenia.

“Mi supozas, ke S-ro Ŝerlok Holms eliris,” mi diris al S-no Hudson, kiam ŝi envenis por elruligi la rulkurtenojn.

## La Signo de la Kvar

“Ne, sinjoro. Li iris al sia ĉambro, sinjoro. “Ĉu vi scias, sinjoro,” ŝi diris mallaŭtigante la voĉon al impona flustro, “mi timas pri lia saneco?”

“Kial vi diras tion, S-no Hudson?”

“Nu, estas tiel strange, sinjoro. Post kiam vi eliris, li piediris kaj piediris, tien kaj reen, tien kaj reen, ĝis mi laciĝis pro la sono de liaj paŝoj. Tiam mi aŭdis lin paroli al si mem kaj murmuri, kaj ĉiam, kiam sonoris la sonorilo, li elvenis al la ŝtuparfino kaj diris, ‘Kio estas tio, S-no Hudson?’ Kaj nun li iris al sia ĉambro brufermante la pordon, sed mi povas aŭdi lin piediradantan tute same. Mi esperas, ke li ne estos malsana, sinjoro. Mi riskis diri al li ion pri trankviliga kuracilo, sed li turnis sin al mi kun tia esprimo, ke mi ne scias kiel mi eskapis el la ĉambro.”

“Mi ne pensas, ke vi havas motivon por esti maltrankvila, S-no Hudson,” mi respondis. “Mi jam vidis lin en tia stato. Li pensas pri ia eta afero, kaj tio maltrankviligas lin.” Mi penis paroli senĝene al nia respektinda luantino, sed mi mem estis iom maltrankvila, kiam, dum la longa nokto, fojfoje mi ankoraŭ aŭdis la malakran sonon de lia tretado, kaj mi sciis kiel lia akra spirito malpacienas pro tiu kontraŭvola neagado.

Je la horo de matenmanĝo, li aspektis lacega kaj malgrasaĉa, kun eta tuŝo de febra koloro en ĉiu vango.

“Vi frakasas vin, mia amiko,” mi rimarkis. “Mi aŭdis vian ĉirkaŭpaŝadon en la nokto.”

“Ne, mi ne povis dormi,” li respondis. “Ĉi tiu infera problem konsumas min. Estas tro multe esti venkita de tiel bagatela obstaklo, kiam ĉio alia estas venkita. Mi konas la homojn, mi konas la ŝalupon, mi konas ĉion; tamen, mi ne povas akiri novaĵojn. Mi aktivigis aliajn agentojn kaj uzis ĉiun rimedon je mia dispono. La tuta rivero estis priserĉita ambaŭflanke, sed ne estas novaĵoj, kaj S-no Smith ne aŭdis pri sia edzo. Mi baldaŭ konkludos, ke ili sinkigis la ŝipon. Sed ekzistas kontraŭdiroj al tiu hipotezo.”

“Aŭ eble S-no Smith sendis nin laŭ falsa vojo.”



## La Signo de la Kvar

“Ne, mi kredas, ke ni povas elimini tion. Mi farigis esplorojn, kaj ŝalupo kun tia priskribo ekzistas.”

“Ĉu ĝi eble iris supren laŭ la rivero?”

“Mi konsideris ankaŭ tiun eblecon, kaj estas serĉantaro, kiu serĉos ĝis Richmond. Se ne venos novaĵoj hodiaŭ, mi mem ekiros morgaŭ, kaj serĉos la homojn anstataŭ la boaton. Sed certe ni aŭdos ion.”

Tamen, ni ne aŭdis. Nenia vorto venis al ni de Wiggins aŭ la aliaj agentoj. Estis artikoloj en la plej multo da ĵurnaloj pri la tragedio en Norwood. Ili ĉiuj ŝajnis iom malfavoraj al malbonŝanca Thaddeus Sholto. Neniuj freŝaj detaloj estis troveblaj en ili, tamen, krom ke enketo okazos la sekvantan tagon. Mi promenis al Camberwell en la vespero por raporti nian mankon de sukceso al li sinjorinoj, kaj kiam mi revenis, mi trovis Holms deprimita kaj iom malgajhumora. Li apenaŭ respondis al miaj demandoj, kaj okupiĝis la tutan vesperon per kompleksa kemia analizo, kiu necesigis multe da varmigado de retortoj kaj la distiladon de vaporoj, kaj fine rezultis en odoro, kiu preskaŭ pelis min el la ĉambro. Ĝis la unuaj horoj de la mateno, mi povis aŭdi la tintadon de provtuboj, kiu sciigis min, ke li estas ankoraŭ okupata de siaj malbonodoraj eksperimentoj.

En la frua tagiĝo mi ekvekiĝis kaj estis surprizita vidante lin staranta apud mia lito, vestita en la kruda vesto de maristo kun marjako kaj malglata, ruĝa skarpo ĉirkaŭ la kolo.

“Mi iras malsupren laŭ la rivero, Watson,” diris li. “Mi turnadis la aferon en mia menso, kaj mi povas vidi nur unu elirejon. Tio valoras la peno, ĉiuokaze.”

“Certe mi povas veni kun vi do?” diris mi.

“Ne; vi povas multe pli utili al mi, se vi restas ĉi tie kiel mia reprezentanto. Multe malplaĉas al mi foriri, ĉar estas tre verŝajne, ke mesaĝo alvenos dum la tago, kvankam Wiggins malesperis pri tio hieraŭ nokte. Mi volas, ke vi malfermu ĉiujn notojn kaj telegramojn, kaj agu

## La Signo de la Kvar

laŭ via propra bontrovo, se ia novaĵo alvenos. Ĉu mi povas fidi, ke vi faros tion?”

“Tute certe.”

“Mi timas, ke vi ne povos sendi al mi telegramon, ĉar mi ne povas scii kie mi troviĝos. Se mi havas bonan ŝancon, tamen, eble mi ne estos for dumlonge. Mi havos novaĵojn de unu aŭ alia speco, kiam mi revenos.”

Mi aŭdis nenion de li ĝis la horo de matenmanĝo. Malferminte *Standard*, tamen, mi trovis novan aludon al la afero. “Koncerne la tragedion en Upper Norwood,” ĝi rimarkis, “ni havas motivon por kredi, ke oni trovos, ke la afero estas pli komplika kaj mistera ol oni unue supozis. Freŝaj indicoj montris, ke estas tute neeble, ke S-ro Thaddeus Sholto estus implikita en la afero. Kaj li kaj la mastrumistino, S-ro Bernstone, estis liberigitaj hieraŭ vespere. Oni kredas, tamen, ke la polico havas implicon pri la veraj kulpuloj, kaj tio estas sekvata de S-ro Athelney Jones, de Scotland Yard, kun lia bonekonata energio kaj sagaceco. Aliaj eventualaj arestoj estas atendataj je iu ajn momento.”

“Tio estas kontentiga, ĝis certa punkto,” pensis mi. “Amiko Sholto estas eksterdanĝera ĉiuokaze. Mi scivolas kio estas la nova implico, kvankam, tio ŝajnas esti stereotipa respondo, kiam la polico eraregis.”

Mi ĵetis la ĵurnalon sur la tablon, sed en tiu momento, trafis mian okulon reklamo en la kolumo de personaj problemoj. Ĝi tekstis jene:

“Malaperintaj—Mordecai Smith, boatisto, kaj lia filo, Jim, foriris de la varfo de Smith ĉirkaŭ la tria pasintmarde en la vaporŝalupo *Aurora*, nigra kun du ruĝaj strioj, fumtubo nigra kun blanka bendo. La sumo de kvin pundoj estas pagota al iu ajn, kiu povas doni informojn al S-ro Smith, ĉe la varfo de Smith, aŭ ĉe 221b Strato Baker, koncerne la kieojn de tiu Mordecai Smith kaj la ŝalupo *Aurora*.”

Tio klare estis la laboro de Holms. La adreso en Strato Baker sufiĉis por pruvi tion. Ĝi ŝajnis al mi iom inĝenia, ĉar la fuĝantoj povus legi ĝin sen vidi pli ol la naturan maltrakvilecon de edzino pri sia malaperinta edzo.

## La Signo de la Kvar

La tago estis longa. Ĉiam, kiam estis frapo ĉe la pordo, aŭ akra paŝo pasis en la strato, mi imagis, ke tio estas aŭ Holms, kiu revenas, aŭ respondo al lia reklamo. Mi penis legi, sed miaj pensoj forvagis al nia stranga serĉo kaj la malkongrua kaj kanajla paro, kiun ni postsekvis. Ĉu povus esti, mi scivolis, ia radika eraro en la razonado de mia kompano? Ĉu eble lin kaptis ia grandega memtrompo? Ĉu ne estis eble, ke lia lerta kaj spekulativa menso konstruis ĉi tiun strangan teorion sur eraraj premisoj? Mi neniam sciis, ke li tiel eraris; tamen, la plej lerta razonanto povas fojfoje esti trompita. Estis plejprobable, ke li erarus pro la tro-rafinado de sia logiko,—sia prefero al subtila kaj bizara klarigo, kiam pli banala kaj ĉiutaga kuŝas tuj ĉemane. Tamen, aliflanke, mi mem vidis la implicojn, kaj mi aŭdis la motivojn, kiuj kondukis al liaj deduktoj. Kiam mi reregardis la longan ĉenon de kuriozaj cirkonstancoj, multaj bagatelaj en si mem, sed ĉiuj inklinantaj en la sama direkto, mi ne povis ne pensi, ke, eĉ se la klarigo de Holms estas erara, la vera klarigo devas esti same bizara kaj konsterna.

Je la tria posttagmeze, estis laŭta sonoro de la sonorilo, kaj aŭtoritata voĉo en la vestiblo, kaj, al mia surprizo, neniu alia ol S-ro Athelney Jones estis prezentita al mi. Multe malsama estis li, tamen, de la abrupta kaj mastreca profesoro de komuna prudento, kiu tiel memfide transprenis la kazon en Upper Norwood. Lia mieno estis deprimita, kaj lia sinteno humila kaj eĉ pardonpetema.

“Bonan tagon, sinjoro,” diris li. “S-ro Ŝerlok Holms ne estas hejme, mi komprenas.”

“Ne, kaj mi ne povas estis certa kiam li revenos. Sed eble vi volus atendi. Sidiĝu kaj provu unu el tiuj cigaroj.”

“Multan dankon; mi faros tion,” diris li, viŝante la vizaĝon per ruĝa koltukforma poŝtuko.

“Kaj ĉu viskion kaj sodakvon?”

“Nu, duonglason. Estas tre varme por ĉi tiu tempo de la jaro; kaj mi havas multajn ĉagrenojn kaj ĝeniĝojn. Ĉu vi konas mian teorion pri la kazo de Norwood?”

## La Signo de la Kvar

“Mi memoras, ke vi esprimis teorion.”

“Nu, mi estis devigita rekonsideri ĝin. Mi tiris mian reton forte ĉirkaŭ S-ro Sholto, sinjoro, sed—pum!—li falis tra truo en la mezo. Li sukcesis pruvi alibion, kiu ne povis esti kontestita. De la horo, kiam li foriris de la ĉambro de sia frato, li neniam estis el la vido de iu aŭ alia. Do neebulis, ke estis li, kiu grimpis super la tegmento kaj tra la klappordo. Ĝi estas komplika kazo, kaj mia profesia prestiĝo estas riskata. Mi vere estus dankema por iom da helpo.”

“Ni ĉiuj foje bezonas helpon,” diris mi.

“Via amiko, S-ro Ŝerlok Holms, estas bonega persono, sinjoro,” diris li, per raŭketa kaj konfidenca voĉo. “Li estas nesuperebla. Mi jam vidis tiun junulon esplori sufiĉe multe da kazoj, sed neniam estis unu, kiun li ne povis prilumi. Liaj metodoj estas neregulaj, kaj li iom haste saltas al teorioj, sed, plejparte, mi pensas, ke li povintus esti tre promesplena policano, kaj ne gravas al mi, kiu scias tion. Mi ricevis telegramon de li hodiaŭ matene, laŭ kiu mi komprenas, ke li trovis ian implicon pri la afero Sholto. Jen la mesaĝo.”

Li prenis la telegramon el la poŝo, kaj donis ĝin al mi. Ĝi venis de Poplar je la dekdua. “Tuj iru al Strato Baker,” ĝi diris. “Se mi ne jam revenis, atendu min. Mi estas proksima al la bando de la afero Sholto. Vi povas veni kun ni hodiaŭ nokte, se vi volas ĉeesti la finon.”

“Tio sonas bone. Li ŝajne retrovis la spurojn,” diris mi.

“Ha, ankaŭ li havis malfacilaĵojn do,” kriis Jones, kun klara kontenteco. “Eĉ la plej bonaj el ni foje perdiĝas. Kompreneble, oni eble vidos, ke tio estas falsa alarmo; sed estas mia devo de policisto ne preteratenti iun ajn eblecon. Sed estas iu ĉe la pordo. Eble tio estas li.”

Ni aŭdis pezan paŝon venantan supren laŭ la ŝtuparo kun multe da raslado kaj stertorado, kiel de homo severe anhela. Unu-du fojojn li haltis, kvazaŭ la grimado estis tro laciga por li, sed fine li atingis nian pordon kaj envenis. Lia aspekto korespondis al la sonoj, kiujn ni aŭdis. Li estis maljuna viro, en marista vesto, kun malnova marjako butonita

## La Signo de la Kvar

ĝis la gorgo. Lia dorso estis fleksita, liaj genuoj tremis, kaj lia spirado estis dolorige astma. Dum li apogiĝis sur dika, kverka klabo, liaj ŝultroj puŝiĝis pro la peno enspiri aeron en la pulmojn. Li havis buntan skarpon ĉirkaŭ la mentono, kaj mi povis vidi malmule de lia vizaĝo, krom paro de akraj malhelaj okuloj, super kiuj pendis abundaj, blankaj brovoj, kaj longaj, grizaj vangoharoj. Sume, li faris al mi la impreson de respektinda boatestro, kiu maljuniĝis kaj malriĉiĝis.

“Kion vi deziras, mia bona homo,” mi diris.

Li rigardis min en la malrapida, metoda maniero de maljunaĝo.

“Ĉu S-ro Ŝerlok Holms estas ĉi tie?” diris li.

“Ne; mi reprezentas lin. Vi povas diri al mi ian ajn mesaĝon, kiun vi havas por li.”

“Mi devis diri tion al li mem,” diris li.

“Sed mi diras al vi, ke mi reprezentas lin. Ĉu tio temis pri la boato de Mordecai Smith?”

“Jes. Mi scias bone kie ĝi estas. Kaj mi scias kie estas la viroj, kiujn li serĉas. Kaj mi scias kie la trezoro estas. Mi scias ĉion.”

“Diru tion al mi do, kaj mi diros ĝin al li.”

“Mi devis diri tion al li,” li ripetis, kun la petola obstineco de tre maljuna viro.

“Nu, vi devas atendi lin.”

“Ne, ne; mi ne perdos tutan tagon por plaĉi al iu ajn. Se S-ro Holms ne estas ĉi tie, do S-ro Holms devas mem eltrovi ĉion. Ne plaĉas al mi la aspektoj de vi du, kaj mi ne diros eĉ unu vorton.”

Li trenpaŝis al la pordo, sed Athelney Jones ekstaris antaŭ li.

## La Signo de la Kvar



Athelney Jones ekstaris antaŭ li.

“Atendu momenton, amiko,” diris li. “Vi havas gravan informon, kaj vi ne devas foriri. Ni restigos vin, ĉu tio plaĉas al vi aŭ ne, ĝis nia amiko revenos.”

La maljunulo ekkuretis direkte al la pordo, sed, kiam Athelney Jones metis sian larĝan dorson kontraŭ ĝin, li ekkomprenis la senutilecon de rezistado.

“Bela maniero trakti personon!” li kriis, batante la plankon per sia bastono. “Mi venis ĉi tien por vidi sinjoron, kaj vi du, kiujn mi ne vidis iam ajn en la vivo, kaptas min kaj traktas min en tiu maniero!”

“Vi perdos nenion per tio,” mi diris. “Ni kompensas vin pro la manko de tempo. Sidu ĉi tie sur la sofo, kaj vi ne devos atendi longe.”

## La Signo de la Kvar

Li venis sufiĉe malgaje, kaj sidiĝis kun la vizaĝo apogata de la manoj. Jones kaj mi rekomencis nian fumadon kaj paroladon. Subite, tamen, la voĉo de Holms interrompis nin.

“Ŝajne decus, ke vi proponu kaj al mi cigaron,” diris li.

Ni ambaŭ eksaltis en niaj seĝoj. Jen estis Holms sidante proksime al ni kun mieno de kvieta amuziĝo.

“Holms!” mi kriis. “Vi estas ĉi tie! Sed kie estas la maljunulo?”

“Jen la maljunulo,” diris li, eltenante amason de blankaj haroj. “Jen li.—peruko, lipharoj, brovoj, kaj ĉio. Mi pensis, ke mia alivestaĵo estas sufiĉe bona, sed mi ne vere atendis, ke ĝi eltenos sub tiu provo.”

“Ha, fripono!” kriis Jones, vere ravita. “Vi estus bona kaj rara aktoro. Vi havis la ĝustan tuson de maljunulejano, kaj tiuj viaj malfortaj kruroj valoras dek pundojn semajne. Mi kredis, ke mi rekonis la brileton de via okulo tamen. Vi ne evitis nin tiel facile, vi vidu.”

“Mi laboris la tutan tagon en tiu kostumo,” diris li bruligante cigaron. “Vi komprenos, multe en la krimklaso komecas koni min,—precipe post kiam ĉi tiu nia amiko komencis eldoni kelkajn el miaj kazoj; do mi povas marŝi laŭ la militvojo nur en simpla alivestaĵo kiel ĉi tiu. Ĉu vi ricevis mian telegramon?”

“Jes; tio venigis min ĉi tien.

“Kiel prosperas via kazo?”

“Ĉio venis al nenio. Mi devis liberigi du el miaj malliberuloj, kaj ne estas pruvoj kontraŭ la du aliaj.”

“Ne gravas. Ni havos du aliajn por anstataŭi ilin. Sed vi devas meti vin sub miaj ordonoj. Vi povas reteni la tutan oficialan meriton, sed vi devas agi tiel, kiel mi indikas. Ĉu vi konsentas?”

“Tute, se vi helpos min ĉasi tiujn virojn.”

## La Signo de la Kvar

“Nu, unue mi volos rapidan policboaton—vaporŝalupon—ĉe Westminster Stairs je la sepa.”

“Tio estas facile aranĝebla. Ĉiam estas unu tia en tiu loko; sed mi povas iri trans la vojo kaj telefoni por certigi pri tio.”

“Mi ankaŭ volas du fortikajn policanojn, okaze de rezisto.”

“Estos du-tri en la boato. Kion alian?”

“Kiam ni kaptos la virojn, ni akiros la trezoron. Mi pensas, ke estus plezuro al mia amiko porti la keston al la juna fraŭlino, al kiu duono de ĝi laŭrajte apartenas. Ĝi estu la unua, kiu malfermos ĝin,—ĉu ne, Watson?”

“Tio estus granda plezuro al mi.”

“Tio estus iom neregula procedo,” diris Jones, kapneante. “Tamen, la tuta afero estas neregula, kaj mi supozas, ke mi devas fermi la okulojn ĉe tio. La trezoro poste devas esti transdonita al la aŭtoritatoj ĝis post la oficiala enketo.”

“Certe. Tio estas facile aranĝebla. Unu plian punkton. Mi dezirus aŭdi kelkajn detalojn pri la afero el la lipoj de Jonathan Small mem. Vi scias, ke plaĉas al mi ellabori la detalojn de miaj kazoj. Ĉu vi kontraŭstarus, ke mi faru neoficialan intervjuon kun li, aŭ en mia apartamento aŭ alikoke, kondiĉe ke li estas zorge gardata?”

“Nu, vi estas la mastro de la situacio. Mi ankoraŭ ne havas pruvon, ke ekzistas tiu Jonathn Small. Tamen, se vi kaptos lin, mi ne scias kiel mi povus rifuzi al vi intervjuon kun li.

“Ĉu vi konsentas do?”

“Perfekte. Ĉu estas io alia?”

“Nur ke mi insistas, ke vi vespermanĝu kun ni. Tio estos preta post duonhoru. Mi havas ostrojn kaj arbaran kokon, kun kelkaj bonaj, blankaj vinoj. Watson, vi ankoraŭ ne rekonis miajn meritojn de dommastro.”



## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro X

#### La Fino de la Insulano

Nia vespermanĝo estis gaja. Holms estis bona konversacianto, kiam li tiel inklinis, kaj tiun nokton li tiel inklinis. Li ŝajnis en stato de nervoza entuziasmo. Mi neniam vidis lin tiel sprita. Li parolis pri rapida sinsekvo de temoj,—miraklo-dramoj, mezepokaj ceramikaĵoj, violonoj Stradivarius, la budhismo de Cejlono, kaj militŝipoj de la estonteco. Li traktis ĉiun kvazaŭ li faris specialan studon pri tio. Lia brilanta humuro markis kontraston kun lia nigra deprimiĝo de la antaŭaj tagoj. Athelney Jones montriĝis tre amikema en siaj horoj de ripozo, kaj atakis la vespermanĝon kun mieno de *bon vivant*. Koncerne min, mi sentis min ekzaltita pro la penso, ke ni proksimiĝas al la fino de nia tasko, kaj mi estis iom infektita de la gajeco de Holms. Dum la manĝado, neniu el ni aludis al la afero, kiu kunigis nin.

Kiam la tablotuko estis forigita, Holms rigardis sian horloĝon, kaj plenigis tri glasojn per portovino. “Unu tosto,” diris li, “al la sukceso de nia eta ekspedicio. Kaj nun venas la momento por eliri. Ĉu vi havas vian pistolon, Watson?”

“Mi havas mian malnovan revolveron de la armeo en mia skribtablo.”

“Vi prefere portu ĝin do. Estas bone esti preparita. Mi vidas, ke la fiakro estas ĉe la pordo. Mi mendis ĝin por la sesa kaj duono.”

Estis iom post la sepa, antaŭ ol ni atingis la varfon de Westminster, kaj trovis la ŝalupon atendanta nin. Holms ekzamenis ĝin kritike.

“Ĉu estas io, kio markas ĝin kiel boato de la polico?”

“Jes,—tiu verda lampo je la flanko.”

“Forprenu ĝin do.”

Oni faris la malgrandan ŝanĝon, ni paŝis en la boaton, kaj malligis la ŝnurojn. Jones, Holms, kaj mi sidis en la pobo. Estis unu viro por regi

## La Signo de la Kvar

la rudron, unu por prizorgi la motorojn, kaj du fortikaj policinspektistoj antaŭe.

“Kien do?” demandis Jones.

“Al la Turo. Diru al ili, ke ili haltu kontraŭ la konstruejo de Jacobson.”

Nia ŝipo ŝajne estis tre rapida. Ni sagis preter la longaj viclinioj de ŝarĝitaj barĝoj, kvazaŭ ili estus senmovaj. Holms ridetis kontente, dum ni devancis vaporŝipon.

“Ni devas povi kapti ion ajn sur la rivero,” li diris.

“Nu, ne vere. Sed ne estas multaj ŝalupoj pli rapidaj ol ni.”

“Ni devos ĉasi *Aurora*, kaj ŝi estas fama pro rapideco. Mi klarigos al vi la staton de aferoj, Watson. Ĉu vi memoras, kiel ĉagrenita mi estis pro frustrado de tiel multe da malgrandaj aferoj?”

“Jes.”

“Nu, mi tute ripozigis mian menson per absorbiĝo en kemia analizado. Unu el niaj plej grandaj ŝtatestoj diris, ke ŝanĝo de laboro estas la plej bona ripozo. Tiel estas. Kiam mi sukcesis solvi la hidrokarbonon, pri kiu mi laboris, mi revenis al la problemo de la fratoj Sholto, kaj elpensis la tutan aferon denove. Miaj knaboj iris supren laŭ la rivero, kaj malsupren laŭ la rivero sen rezulto. La ŝalupo ne estis ĉe iu ajn albordejo aŭ varfo, kaj ĝi ne revenis. Tamen, apenaŭ estis eble, ke ili sinkis ĝin por kovri siajn spurojn,—kvankam tio ĉiam restis kiel hipotezo, se ĉio alia malsukcesus. Mi sciis, ke tiu viro, Small, havas certan gradon de simpla ruzemo, sed mi ne pensis, ke li estas kapabla por delikata lerteco. Tio estas kutime produkto de supera edukado. Mi poste pensis, ke, se Small estis tiom da tempo en Londono, kaj ni havas indikojn, ke li seninterrompe gvatis ĉe Loĝejo Pondicherry, li ne povus subite foriri; li bezonus iom da tempo por aranĝi siajn aferojn. Tio estis plej probabla ĉiuokaze.”

“Tio ŝajnas al mi iom malforta,” diris mi. “Estas pli probable, ke li aranĝis siajn aferojn antaŭ ol li entreprenis sian ekspedicion.”

## La Signo de la Kvar

“Ne, mi ne konsentas. Tiu kaŝejo estus tro valora al li en okazo de bezono por rezigni ĝin, antaŭ ol li povos esti certa, ke ĝi ne plu utilis al li. Sed alia ideo trafis min. Jonathan Small probable pensis, ke la stranga aspekto de lia kompano, malgraŭ ĉiuj penoj kaŝvesti lin, eble kaŭzos klaĉadon, kiun oni eventuale ligos kun la tragedio de Norwood. Li estis sufiĉe lerta por vidi tion. Ili ekiris de sia kaŝejo sub kovrilo de mallumo, kaj li volus reveni antaŭ la plena taglumo. Nu, estis post la tria, laŭ S-no Smith, kiam ili prenis la boaton. Post unu-du horoj, estus tre lume kaj estus homoj ekstere. Tial, mi diris al mi, ili ne iris tre malproksimen. Ili bone pagis al Smith, por ke li silentu, rezervis lian ŝalupon por la fina eskapo, kaj hastis al sia kaŝejo kun la trezorkesto. Post kelkaj noktoj, kiam ili jam havis sufiĉe da tempo por vidi kion raportis la ĵurnaloj, kaj ĉu io estas suspektata, ili intencis iri sub kovrilo de mallumo al ia ŝipo ĉe Gravesend aŭ Downs, kie ili sendube antaŭaranĝis vojaĝadon al Usono aŭ al la kolonioj.”

“Sed kion pri la ŝalupo? Ili ne povis porti tion al ilia kaŝejo.”

“Ĝuste. Mi diris al mi, ke la ŝalupo ne devas esti malproksime, malgraŭ ĝia nevidebleco. Mi tiam metis min en la loko de Small, kaj konsideris la problemon, kiel homo kun lia kapableco. Li probable konsiderus, ke resendi la ŝalupon aŭ teni ĝin ĉe varfo faciligus postsekvadon, se la polico eventuale ektronus liajn spurojn. Kiel do, li povis kaŝi la ŝalupon kaj ankaŭ havi ĝin ĉemane, kiam li bezonis ĝin. Mi demandis min, kion mi farus, se mi estus en lia situacio. Mi povis elpensi nur unu manieron fari ĝin. Mi eble albordigus la ŝalupon ĉe iu konstruisto aŭ riparisto de ŝipoj, kun instrukcioj fari ian bagatelan ŝanĝon en ĝi. Li tiam forportus ĝin al sia ŝedo aŭ konstruejo, kaj tiel ĝi estus efektive kaŝita, kaj ankaŭ atingebla post antaŭaverto de kelkaj horoj.”

“Tio ŝajnas sufiĉe simpla.”

“Ĝuste tiaj tre simplaj detaloj estas ekstreme facile preteratentebraj. Tamen, mi decidis agi pro la ideo. Mi tuj iris en la vesto de sendanĝera maristo kaj enketis en ĉiuj konstruejoj malsupre laŭ la rivero. Mi trovis nenion en la unuaj dekkvin, sed en la dekseca—tiu de Jacobson—mi sciiĝis, ke *Aurora* estis transdonita al ili antaŭ du tagoj de lignakrurulo, kun kelkaj bagatelaj instrukcioj pro ĝia rudro. ‘Ne estas ia ajn problemo

## La Signo de la Kvar

kun ĝia rudro,' diris la submastro. 'Jen ĝi kuŝas, kun la ruĝaj strioj.' Kaj divenu kiu alvenis en tiu momento? Neniu malpli ol Mordecai Smith, la malaperinta proprietanto. Li estis en iom malbona stato, pro drinkado. Kompreneble, mi ne rekonis lin, sed li elkriegis sian nomon kaj la nomon de sia ŝalupo. 'Mi volas ĝin hodiaŭ nokte je la oka,' diris li,—'la oka akurate, memoru, ĉar estos du sinjoroj, kiuj ne toleros atendadon.' Ili ŝajne bone pagis lin, ĉar li havis multe da mono, kaj ĵetis ŝilingojn al la viroj. Mi sekvis lin je ioma distanco, sed li eniris en drinkejon. Do mi reiris al la konstruejo, kaj, hazarde renkontinte unu el miaj knaboj en la vojo, mi postenigis lin kiel gardiston ĉe la ŝalupo. Li staros ĉe la akvolimo kaj signos al ni per sia poŝtuko, kiam ili ekiros. Ni atendos sur la rivero, kaj estos stranga afero, se ni ne kaptos kaj la virojn, kaj la trezoron."

"Vi planis ĉion tre bone, ĉu ili estas la viroj, kiujn ni serĉas aŭ ne," diris Jones; "sed, se la afero estus en miaj manoj, mi metus policanojn en la konstruejon de Jacobson, kaj arestus ilin, kiam ili venos."

"Kio ne estus okazinta. Tiu Small estas sufiĉe sagaca. Li sendube antaŭsendus skolton, kaj se io suspekttemigus lin, li atendus sekura dum alia semajon."

"Sed vi povus daŭre sekvi Mordecai Smith, kaj tiel venus al ilia kaŝejo," diris mi.

"Tiuokaze mi malŝparus mian tagon. Mi pensas, ke estas nur unu ebleco inter cent, ke Smith scias kie ili loĝas. Dum li havas likvoron kaj bonan pagon, kial li farus demandojn? Ili sendas al li mesaĝojn dirantajn kion li faru. Ne, mi konsideris ĉiun eblan kurson, kaj ĉi tiu estas la plej bona."

Dum tiu konversacio okazis, ni subpasis la longan serion de pontoj, kiuj etendiĝas trans Tamizo. Dum ni pasis la urbon, la lastaj radioj de la suno originis la krucon sur la supro de Saint Paul. Estis krepusko antaŭ ol ni atingis la Turon.

"Tio estas la konstruejo de Jacobson," diris Holms, almontrante arbareton de mastoj kaj rigoj sur la riverbordo de Surrey. "Moviĝu malrapide supren-malsupren malantaŭ kovrilo de tiu linio de barĝoj." Li

## La Signo de la Kvar

prenis paron de nokt-okulvitroj el la poŝo kaj rigardis dumio me al la bordo. “Mi vidas mian gardiston ĉe sia posteno,” li rimarkis, “sed mi ne vidas la poŝtukon.”

“Eble ni iru mallongan distancon malsupren kaj restu atendente ilin,” diris Jones senpacience. Ni ĉiuj estis senpaciencaj je tiu punkto, eĉ la policianoj kaj la hejtistoj, kiuj havis nur svagan ideon pri kio okazos.

“En niaj cirkonstancoj, ni ne povas akcepti ion senplue,” Holms respondis. “Certe, estas dek ŝancoj kontraŭ unu, ke ili iros malsupren, sed ni ne povas esti certaj. De ĉi tiu punkto, ni povas vidi la enirejon de la konstruejo, kaj ili apenaŭ povas vidi nin. Estos klara nokto, kaj multe da lumo. Ni devas resti ĉi tie. Vidu kiel la homoj svarmas tie for en la gaslumo.”

“Ili venas de laborado en la konstruejo.”

“Ili estas aĉ-aspektaj friponoj, sed mi supozas, ke en ĉiu estas kaŝita fajrero de senmorteco interne. Oni ne pensus tion, kiam oni rigardas ilin. Ne estas apriora probableco en tio. La homo estas stranga enigmo!”

“Tu nomas ilin animo kaŝita en besto,” mi sugestis.

“Winweed Reade bone traktas la temon,” diris Holms. “Li rimarkas, ke, kvankam la individua homo estas nesolvebla enigmo, amase li fariĝas matematika certaĵo. Oni povas, ekzemple, neniam antaŭscii kion faros unu homo, sed oni povas diri precize kion faros la homoj averaĝe. Individuoj varias, sed la procentaĵoj restas konstantaj. Tiel diras la statistikisto. Ĉu mi vidas poŝtukon? Certe io blanka flirtas tie for.”

“Jes, tio estas via knabo,” mi kriis. “Mi povas vidi lin klare.”

“Kaj jen *Aurora*,” elkriis Holms, “kaj ĝi kuras kiel la diablo! Plenrapide antaŭen, motoristo. Ĉasu tiun ŝalupon kun la flava lumo. Je Dio, mi ne pardonos min, se ĝi eskapos nin!”

Ĝi jam glitis nevidate tra la enirejo de la konstruejo kaj pasis malantaŭ du-tri malgrandaj ŝipoj, tiel ke ĝi sufiĉe rapidis antaŭ ol ni vidis ĝin. Nun

## La Signo de la Kvar

ĝi kuregis malsupren laŭ la fluo, proksime al la bordo, irante rapidege. Jones rigardis ĝin serioze kaj kapneis.

“Ĝi estas tre rapida,” li diris. “Mi dubas, ke ni kaptos ĝin.”

“Ni *devas* kapti ĝin!” kriis Holms, inter la dentoj. “Plenigu tion ĝis la supro, hejtistoj! Kiel eble plej rapidigu ĝin! Eĉ se ni bruligas la boaton, ni devas kapti ĝin!”

Ni nun postsekvis ilin je bona rapideco. La fornoj muĝis, kaj la potencaj motoroj siblis kaj tintegis, kiel granda metala koro. Ĝia akra, kruta pruo tratanĉis la riverakvon kaj sendis du ruliĝantajn ondojn dekstre kaj maldekstre de ni. Je ĉiu pulso de la motoroj la boato saltis kaj tremis kiel vivanta estaĵo. Unu granda, flava lanterno en nia pruo ĵetis longan, flagrantan funelon de lumo antaŭ nin. Ĝuste antaŭ ni, malhela makulo sur la akvo montris kie *Aurora* kuŝis, kaj la kirlo de blanka ŝaŭmo malantaŭ ĝi indikis la rapidecon, je kiu ĝi iris. Ni fulmis preter bargoj, vaporŝipoj, komercboatoj, serpentante, jen malantaŭ unu, jen ĉirkaŭ alia. Voĉoj salutis nin el la mallumo, sed *Aurora* ankoraŭ antaŭentondris, kaj ni daŭre sekvis tuj poste.

“Pli da karbo, uloj, pli da karbo!” kriis Holms, rigardante malsupren en la motorejon, dum la fortega brilo de malsupre trafis lian avidan, aglan vizaĝon. “Kiel eble plej grandan voporprenon!”

“Mi kredas, ke ni iomete proksimiĝas,” diris Jones, kun la okuloj sur *Aurora*.

“Mi certas,” diris mi. “Ni atingos ĝin post tre malmultaj minutoj.”

Je tiu momento, tamen, laŭ la malica kaprico de fortune, trenŝipo trenante tri bargojn fuŝvenis inter ni. Nur per turnegado de la rudro ni povis eviti kolizion, kaj antaŭ ol ni povis ĉirkaŭiri kaj retrovi nian vojon, *Aurora* gajnis ducent jardojn. Ĝi estis, tamen, bone videbla, kaj la malklara, necerta krepusko, komencis fariĝi klara, stellumplena nokto. Ĉiuj kapabloj de niaj vaporkaldronoj estis ŝarĝitaj, kaj la fragila ŝipŝelo vibris kaj knaris sub la feroca energio, kiu pelis nin antaŭen. Ni rapidegis tra Pool, pasis la dokojn de Indonezio, iris laŭ la longa kanalo de

## La Signo de la Kvar

Depford, kaj returne post kiam ni rondiris ĉirkaŭ la Insulo de Hundoj. La malklara imago antaŭ ni sufiĉe klariĝis por videbligi la elegantan formon de *Aurora*. Jones direktis niajn serĉlampon al ĝi, tiel ke ni povis klare vidi la figurojn sur la ferdeko. Unu viro sidis en la pobo kun io nigra inter la genuoj, super kio li kliniĝis. Apud li kuŝis nigra maso, kiu aspektis kiel novlanda hundo. La knabo tenis la stirilon, kaj en la fajra lumo de la forno, mi povis vidi maljunan Smith, nuda supre de la zono, kaj ŝovelanta karbon, kvazaŭ temis pri savado de la vivo. Ili eble dubis en la komenco, ĉu ni vere sekvas ilin, sed nun, dum ni sekvis ilian tutan serpentadon, ne plu povus esti dubo pri tio. Ĉe Greenwich ni estis proksimume tricent paŝojn malantaŭ ili; ĉe Blackwall ne pli ol ducent kvindek. Mi ĉasis multajn estaĵojn dum mia diversfortuna kariero, sed neniam antaŭe ĉasado produktis en mi tian furiozan eksciton kiel tiu freneza, fluganta homĉaso laŭ Tamezo. Konstante ni proksimiĝis al ili, jardo post jardo. En la silento de la nokto, ni povis aŭdi la spiregojn kaj frapojn de iliaj maŝinoj. La viro en la pobo ankoraŭ kliniĝis sur la ferdeko, kaj liaj brakoj moviĝis, kvazaŭ li estis okupata, dum fojfoje li supren rigardis kaj mezuris per la okulo la distancon inter ni. Ni venis pli kaj pli proksimen. Jones kriis al ili, ke ili haltu. Ni ne estis pli ol kvar boatlongojn malantaŭ ili, kaj ambaŭ boatoj flugis treege rapide. Ni estis en senobstakla parto de la rivero, kun Barking Level je unu flanko, kaj la melankoliaj Marĉoj Pumstead je la alia. Je nia saluto, la viro en la pobo ekstaris kaj skuis la du pugnojn al ni, sakrante per akuta, raŭka voĉo. Li estis fortika, forta viro, kaj, dum li staris kun disigitaj kruroj, mi povis vidi, ke de la femuro malsupren, estis nur ligna stumpo sur la dekstra flanko. Je la sono de liaj knaraj, koleraĵ krioj estis moviĝo en la kunpremita maso sur la ferdeko. Ĝi rektigis sin en la formon de eta nigra viro—la plej malgrandan, kiun mi iam ajn vidis—kun granda, misforma kapo kaj implika kaj senorda hararo. Holms jam eltiris sian revolveron, kaj mi eltiregis mian je la vido de ĉi tiu sovaĝa, tordita estulo. Li estis volvita en ia malhela mantelo aŭ litkovrilo, kiu lasis nur la vizaĝon malkovrita. Sed tiu vizaĝo estus sufiĉe por malebligi dormadon. Neniam mi vidis trajtojn tiel profunde markitajn de besteco kaj krueleco. Liaj malgrandaj okuloj brilis kaj ardis kun malbonaŭgura lumo, liaj maldikaj lipoj sulkiĝis elmontrante liajn dentojn, kiuj rikanis kaj klakadis al ni kun duonbesta furiozeco.

## La Signo de la Kvar

“Pafu, se li levas la manon,” diris Holms kviete. Ni estis interne de boatlongo de li je tiu momento, kaj ni preskaŭ povis tuŝi nian celaton. Mi povis vidi tiujn du, dum ili staris, la blankulon kun la kruroj disigitaj, kriegantan blasfemojn, kaj la diablan nanon kun lia terura vizaĝo, liaj fortaj, flavaj dentoj grincantaj al ni en la lumo de nia lanterno.

Estis bone, ke ni povis vidi lin tiel klare. Eĉ dum ni rigardis, li plukis de sub sia kovrilo mallongan, rondan pecon de ligno, kiel lerneja liniilo, kaj fiksitis ĝin al siaj lipoj. Niaj pistolpafoj elsonoris kune. Li turnegiĝis, etendis la brakojn, kaj, kun speco de strangola tuso, li flankenfalis en la fluon. Mi kaptis unu ekvidon de liaj venenaj, minacaj okuloj inter la blankaj akvokirloj. En tiu sama momento, la lignakrurulo ĵetis sin sur la rudron turnante ĝin, tiel ke la boato direktiĝis rekte al la suda bordo, dum ni fulmrapidis preter ĝia pobo, maltrafante ĝin per nur kelkaj futoj. Ni tuj returniĝis por sekvi ĝin, sed ĝi preskaŭ jam atingis la bordon. Tio estis sovaĝa kaj dezerta loko, kie la luno briletis sur larĝa marĉejo, kun flakoj de stagnanta akvo kaj bedoj de putrantaj vegetaĵoj. La ŝalupo kun obtuza bruo kuris sur la kotan bordon, kun la pruo en la aero kaj la pobo ebena kun la akvo. La fuĝanto tuj elsaltis, sed lia stumpo tuj sinkis laŭ ĝia tuta longo en la malsekan teron. Vane li baraktis kaj tordiĝis. Li ne kapablis fari eĉ unu paŝon antaŭen aŭ malantaŭen. Li kriis en senpotenca kolerego, kaj piedbatis en la koton per la alia kruro, sed liaj baraktoj nur enborigis lian lignan kruron pli profunden en la gluecan bordon. Kiam ni venigis nian ŝalupon apud lian, li estis tiel firme fiksita, ke ni devis ĵeti ŝnuron super liajn ŝultrojn por eltiri lin, kaj treni lin, kiel ian malican fiŝon, super la flankon de nia boato. La patro kaj filo Smith sidis malgaje en sia ŝalupo, sed ili venis sufiĉe humile sur nian, kiam oni ordonis. *Aurora* mem estis debordigita kaj ligita al nia pobo. Solida, fera kesto de hinda metio staris sur la ferdeko. Tio, sendube, estis la sama, kiu entenis la misaŭgruan trezoron de la familio Sholto. Ne estis ŝlosilo, sed ĝi pezis konsiderinde, do ni zorge transportis ĝin en nian propran malgrandan kajuton. Dum ni revaporiris malrapide supren laŭ la rivero, ni direktis nian serĉlampon en ĉiu direkto, sed la insulano tute ne vidiĝis. Ie, en la malluma ŝlimo ĉe la fondo de Tamezo, kuŝas la ostoj de tiu stranga vizitinto al nia lando.



## La Signo de la Kvar



Lia stumpo tuj sinkis laŭ ĝia tuta longo en la malsekan teron.

“Vidu ĉi tie,” diris Holms, almontrante la lignan lukopordon. “Ni apenaŭ estis sufiĉe rapidaj kun niaj pistoloj.” Tie, tute certe, tuj malantaŭ kie ni staris, estis fiksita unu el tiuj murdaj sagetoj, kiujn ni tiel bone konis. Ĝi ŝajne flugis inter ni, ĝuste kiam ni pafis. Holms ridetis pri ĝi kaj levis la ŝultrojn en sia facilanima maniero, sed mi konfesas, ke naŭzigis min pensi pri la terura morto, kiu pasis tiel proksime al ni tiun nokton.

## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro XI

#### La Granda Trezoro de Agra

Nia kaptito sidis en la kajuto kontraŭ la fera kesto, por kies akiro, li faris tiel multe kaj atendis tiel longe. Li estis sunbrunigita, kun malzorgemaj okuloj, reto de faltoj kaj sulkoj trans la tuta mahagona vizaĝo, kiu indikis malfacilan, plenaeran vivadon. Lia barba mentono estis aparte elstara, markante lin kiel viron malfacile turneblan de sia celo. Li estis eble kvindekjara, pli malpli, ĉar inter liaj nigraj, bukraj haroj dense kreskis grizaj. Lia vizaĝo ne estis malagrabla, kiam li estis en ripozo, sed liaj dikaj brovoj kaj elstaranta mentono donis al li, kiel mi lastatempe vidis, teruran esprimon, kiam li koleris. Li sidis nun kun la katenitaj manoj sur la genuoj, kaj la kapo sur la brusto, dum li rigardis per briletantaj okuloj la skatolon, kiu estis la kaŭzo de liaj fifaroj. Ŝajnis al mi, ke estas pli da malĝojo ol kolero en lia rigida kaj regata vizaĝo. Unu fojon li rigardis supren al mi kun brileto de io simila al humuro en la okuloj.

“Bone, Jonathan Small,” diris Holms, bruligante cigaron. “Mi bedaŭras, ke ĉio finiĝis ĉi tiel.”

“Ankaŭ mi bedaŭras, sinjoro,” li diris sincere. “Mi ne kredas, ke mi pendumiĝos pro la afero. Mi ĵuras per la Biblio, ke mi ne levis la manon kontraŭ S-ro Sholto. Estis tiu eta diablo, Tonga, kiu pafigis unu el siaj damnindaj sagetoj en lin. Mi ne partoprenis en tio, sinjoro. Tio doloris min, kvazaŭ tiu estus parenco mia. Mi batis la etan diablon per la malstreĉa fino de la ŝnuro pro tio. Sed tio estis farita, kaj mi ne povis malfaritigi ĝin.”

## La Signo de la Kvar



Tonga pafigis unu el siaj damnindaj sagetoj en lin.

“Havu cigaron,” diris Holms; “Kaj vi devas ektrinki el mia flakono, ĉar vi estas tre malseka. Kiel vi esperus, ke homo tiel malgranda kaj malforta, kiel estis tiu nigra ulo, superregus kaj tenus S-ron Sholto dum vi grimpis per la ŝnuro?”

“Vi ŝajne scias tiel multe pri tio, kvazau vi estis tie, sinjoro. La vero estas, ke mi esperis, ke neniu estos en la ĉambro. Mi konis la kutimojn de la domo sufiĉe bone, kaj tio estis la horo, kiam S-ro Sholto malsupreniras por verspermanĝo. Mi ne kaŝos sekretojn pri la afero. La plej bona defendo por mi estas la simpla vero. Nu, se temus pri la maljuna majoro, mi pendumiĝus pro lia mortigo sen bedaŭro. Ponardi lin ne gravus al mi pli ol fumi cigaron. Sed estas damnde ĉagrenige, ke mi eble iros al prizono pro tiu juna Sholto, kun kiu mi tute ne kverelis.”

“Vi estas tenata de S-ro Athelney Jones, de Scotland Yard. Li venigos vin al mia ĉambraro, kaj mi petos de vi veran rakonton pri la afero. Vi

## La Signo de la Kvar

devas plene konfesi, ĉar, se vi faros tion, mi esperas, ke mi povos helpi vin. Mi kredas, ke mi povos pruvi, ke la veneno agas tiel rapide, ke la viro estis morta antaŭ ol vi envenis en la ĉambron.”

“Ĝuste tiel li estis, sinjoro. Neniam en mia tuta vivo, trafis min pli granda surprizo, ol kiam mi vidis lin ridetaĉanta kun la kapo sur la ŝultro, dum mi grimpis tra la fenestro. Tio vere ŝokis min, sinjoro. Mi estus duone mortiginta Tonga, sed li forkuregis. Tiel li postlasis sian klabon, kaj ankaŭ kelkajn siajn sagetojn, kiel li diris al mi poste. Mi supozas, ke ili helpis vin spuri nin; kvankam, kiel vi tenis paŝon kun ni, estas pli ol mi povas kompreni. Mi ne sentas malicon kontraŭ vi pro tio. Sed certe ŝajnas strange,” li aldonis kun amara rideto, “ke mi, kiu havas justan pretendon al preskaŭ duonmiliono riĉaĵo pasigis la unuan duonon de sia vivo konstruante moleon en Insuloj Andaman, nun probable pasigos la alian duonon fosante kloakon ĉe Dartmoor. Estis katastrofa tago por mi, kiam mi unue vidis la komerciston Aĥmet kaj la trezoro de Agra venis en mian vivon. Tio neniam venigis ion krom malbenon sur ĉiu homo kiu posedis ĝin. Al Aĥmet ĝi venigis murdon, al Majoro Sholto ĝi venigis timon kaj kulpon, al mi ĝi signifis dumviva sklaveco.”

Je tiu momento Athelney Jones trudis la larĝan vizaĝon kaj fortikajn ŝultrojn en la etan kajuton. “Tio ŝajnas familia festo,” li rimarkis. “Mi kredas, ke mi trinkos el tiu fasko, Holms. Nu, mi kredas, ke ni povas gratuli unu la alian. Bedaŭrinde, ke ni ne kaptis la alian viva; sed ne estis alternativo. Vere, Holms, vi devas konfesi, ke via plano apenaŭ sukcesis—ni preskaŭ ne kaptis ĝin.”

“Ĉio estas bona, kio bone finiĝas,” diris Holms. “Sed, mi tute ne sciis, ke *Aurora* estas tiel rapida.”

“Smith diras, ke ĝi estas unu el la plej rapidaj ŝalupoj sur la rivero, kaj se li havus alian viron por helpi kun la motoroj, ni tute ne estus kaptintaj ilin. Li ĵuras, ke li sciis nenion pri la afero de Norwood.”

“Tio estas vera,” kriis la malliberulo,—“mi ne diris eĉ unu vorton al li. Mi elektis lian ŝalupon, ĉar mi aŭdis, ke ĝi estas rapidega. Ni diris al li nenion, sed ni pagis lin bone, kaj li estis ricevonta grandan sumon, se ni atingis nian ŝipon, *Esmeralda*, ĉe Gravesend, kiu celis Brazilon.

## La Signo de la Kvar

“Nu, se li faris nenian malbonon, ni zorgos, ke nenia malbono venos al li. Kvankam ni hastas kapti niajn celatojn, ni ne hastas kondamni ilin.” Estis amuze la maniero, en kiu tiu pompa Jones jam komencis malmolesti pri la kaptado. Per la eta rideto kiu pasis sur la vizaĝo de Ŝerlok Holms, mi povis vidi, ke la vortoj ne pasis nerimarkite de li.

“Ni baldaŭ venos al Ponto Vauxhall,” diris Jones, “kaj ni alterigos vin, D-ro Watson, kun la trezorkesto. Mi apenaŭ devas diri al vi, ke mi ŝarĝas min per grava respondeco, kiam mi faras tion. Tio estas tre neregula; sed, komperneble, konsento estas konsento. Mi havas la devon, tamen, sendi inspektoron kun vi, pro la valoro de la enhavo. Vi veturigos tien, ĉu ne?”

“Jes, mi veturigos.”

“Estas bedaŭrinde, ke ne estas ŝlosilo, por ke ni povu antaŭe registru la enhavon. Vi devos rompe malfermi ĝin. Kie estas la ŝlosilo, sinjoro mia?”

“Riverfonde,” diris Small abrupte.

“Hm! Ne necesis kaŭzi al ni tiun senutilan malfacilaĵon. Ni jam havis sufiĉe da laboro pro vi. Tamen, doktoro, mi ne devas averti vin, ke vi zorgu. Reportu la skatolon kun vi al la ĉambraro en Strato Baker. Vi trovos nin tie, haltintaj sur la vojo al la stacio.”

Oni alterigis min ĉe Vauxhall, kun mia peza fera kesto, kaj kun fortika, afabla inspektoro kiel akompananto. Kvaronhora veturo venigis nin al la domo de S-no Cecil Forrester. La servisto ŝajnis surprizita pri vizitanto en tiu horo. S-no Cecil Forrester eliris kaj probable revenos tre malfrue. F-no Morstan, tamen, estis en la salono: do al la salono mi iris portante la keston, lasante la komplezeman inspektoron en la fiakro.

Ŝi sidis apud la malfermita fenestro, vestita en ia blanka, diafana ŝtofo, kun tuŝeto de skarlato sur la kolo kaj la talio. La milda lumo de ombrita lampo falis sur ŝia figuro kliniĝanta en vimena seĝo, pasis sur ŝia dolĉa, serioza vizaĝo, kaj nuancis per malhelaj, metalaj briletoj la riĉajn buklojn de ŝiaj abundaj haroj. Unu blanka brako falis je la flanko de la

## La Signo de la Kvar

seĝo, kaj ŝia tuta sinteno parolis pri profunda melankolio. Je la sono de mia paŝo ŝi ekstaris, tamen, kaj brila ruĝiĝo de surprizo kaj plezuro kolorigis ŝiajn palajn vangojn.

“Mi aŭdis, ke fiakro alvenas,” ŝi diris. “Mi pensis, ke eble S-no Forrester revenas tre frue, sed mi tute ne imagis, ke tio eble estas vi. Kian novaĵon vi portis al mi?”

“Mi portis ion pli bonan ol novaĵo,” diris mi metante la keston sur la tablon kaj parolante gaje kaj brue, kvankam mia koro estis peza. “Mi portis al vi ion, kio estas pli valora ol ĉiuj novaĵoj en la mondo. Mi portis al vi riĉaĵojn.”

Ŝi rigardis la feran keston. “Ĉu tio estas la trezoro do?” ŝi demandis, sufiĉe senpasie.

“Jes, jen la granda trezoro Agra. Duono de ĝi estas via kaj duono apartenas al Thaddeus Sholto. Ĉiu el vi havos ĉirkaŭ kelkcent mil pundojn. Pensu pri tio! Jara rento de dek mil pundoj. Estos malmulte da junulinoj pli riĉaj en Anglujo. Ĉu tio ne estas gloro?”

Mi kredas, ke mi iom troigis en la aktorado pri mia feliĉeco, kaj ke ŝi perceptis malsincerecon en mia gratulado, ĉar mi vidis, ke ŝi levetas la brovojn kaj rigardas min scivoleme.

“Se mi havas tion,” diris ŝi, “tio estas dank’ al vi.”

“Ne, ne,” mi respondis, “ne al mi, sed al mia amiko Ŝerlok Holms. Eĉ se mi aplikus mian tutan volon, mi neniam kapablus sekvi la spurojn, kiuj tiel elprovis eĉ lian analizan genion. Fakte, ni preskaŭ perdis ĝin je la lasta momento.”

“Bonvolu sidiĝi kaj rakonti al mi ĉion, D-ro Watson,” diris ŝi.

Mi rakontis mallonge tion, kio okazis post kiam mi laste vidis ŝin,—la nova serĉmetodo de Holms, la malkovro de *Aurora*, la apero de Athelney Jones, nia vespera ekspedicio, kaj la freneza ĉaso laŭ Tamezo. Ŝi aŭskultis kun disigitaj lipoj kaj brilantaj okuloj mian reciton de niaj

## La Signo de la Kvar

aventuroj. Kiam mi parolis pri la sageto, kiu apenaŭ maltrafis nin, ŝi tiel paliĝis, ke mi timis, ke ŝi svenos.

“Tio estas nenio,” ŝi diris, dum mi hastis elverŝi por ŝi akvon. “Mi denove bonfartas. Estis ŝoko aŭdi, ke mi metis miajn amikojn en tiel teruran danĝeron.”

“Tio tute finiĝis,” mi respondis. “Tio estis nenio. Mi ne plu rakontos al vi malgajajn detalojn. Ni turnu nin al io pli feliĉa. Jen la trezoro. Kio povus esti pli gajiga ol tio? Mi ricevis permeson kunporti ĝin, ĉar mi pensis, ke eble interesus vin esti la unua, kiu vidos ĝin.”

“Tio multe interesus al mi,” ŝi diris. Ne estis granda entuziasmo en ŝia voĉo, tamen. La ideo venis al ŝi, sendube, ke eble ŝajnus maldankeme esti indiferenta pri la premio gajnita je tiel granda kosto.

“Kiel bela kesto!” ŝi diris, kliniĝante super ĝi. “Tio estas hinda laboro, mi supozas.”

“Jes; metallaboro de Benares.”

“Kaj tiel peza!” ŝi kriis, kiam ŝi penis levi ĝin. “La kesto mem devas esti valora. Kie estas la ŝlosilo?”

“Small ĵetis ĝin en Tamizon,” mi respondis. “Mi devas prunte preni la fajrostangon de S-no Forrester.” Estis sur ĝia antaŭo dika kaj larĝa klinko, farita en la figuron de sidanta Budho. Sub tio mi ŝovis la finon de la fajrostango kaj tordis ĝin eksteren kiel levilon. La klinko malfermiĝis kun laŭta klako. Per tremantaj fingroj mi malantaŭen ĵetis la kovrilon. Ni ambaŭ staris rigardante en konsterniĝo. La kesto estis malplena!

Ne estis mirinde, ke ĝi estis peza. La feraj flankoj kaj fondo estis dika je du trionoj de colo. Ĝi estis masiva, bone farita, kaj solida, kiel kesto konstruita por porti valoregaĵojn. Sed tute ne estis ero de metalo aŭ juveloj en ĝi. Ĝi estis absolute kaj komplete malplena.

“La trezoro estas perdita,” diris F-no Morstan trankvile.

## La Signo de la Kvar

Dum mi aŭskultis la vortojn kaj konstatis tion, kion ili signifis, granda ombro ŝajne pasis de mia animo. Mi ne sciis kiel tiu Trezoro Agra ŝarĝis min, ĝis nun, kiam ĝi fine estis forigita. Tio estis egoisma, sendube, mallojala, maljusta, sed mi povis konstati nenion, krom ke tiu ora barilo ne plu staras inter ni. “Dank’ al Dio!” mi elkriis el la korfundo.

Ŝi rigardis min kun subita, scivola rideto. “Kial vi diras tion?” ŝi demandis.

“Ĉar vi estas denove atingebla,” diris mi, prenante ŝian manon. Ŝi ne retiris ĝin. “Ĉar mi amas vin, Mary, tiel vere, kiel viro iam amis virinon. Ĉar ĉi tiu trezoro, ĉi tiuj riĉaĵoj sigelis miajn lipojn. Nun, kiam ili forestas, mi povas diri al vi kiel multe mi amas vin. Tial mi diris, ‘Dank’ al Dio.”

“Do ankaŭ mi diras, ‘Dank’ al Dio,” ŝi flustris dum mi tiris ŝin al mia flanko. Kiu ajn perdis trezoron tiun nokton, mi ricevis mian.



## La Signo de la Kvar

### Ĉapitro XII

La Stranga Rakonto de Jonathan Small

Tre pacienca homo, estis tiu inspektoro en la fiakro, ĉar estis lacige longa tempo antaŭ ol mi revenis al li. Lia vizaĝo malfeliĉiĝis, kiam mi montris al li la malplenan keston.

“Adiaŭ al la rekompenco!” li diris malgaje. “Kie ne estas mono, ne estas pago. Se la trezoro estus tie, la laboro de ĉi tiu nokto valorus po dek pundojn al Sam Brown kaj mi.”

“S-ro Thaddeus Sholto estas riĉa homo,” mi diris. “Li zorgos, ke vi estu rekompencita, kun aŭ sen trezoro.”

La inspektoro kapneis senespere, tamen. “Tio ne estas bona laboro,” li ripetis; “kaj tion pensos ankaŭ S-ro Athelney Jones.”

Lia antaŭdiro montriĝis ĝusta, ĉar la detektivo aspektis tute pala, kiam mi alvenis al Strato Baker kaj montris al li la malplenan keston. Ili ĵus alvenis, Holms, la malliberulo, kaj li, ĉar ili ŝanĝis la planojn kaj raportis al stacio de polico survoje. Mia kompano ripozis en sia kuŝseĝo kun la kutima apatia esprimo, dum Small sidis flegme kontraŭe al li kun la ligna kruro fleksita super la sana. Dum mi elmontris la malplenan skatolon, li klinis sin malantaŭen en la seĝo kaj ridis laŭte.

“Tion faris vi, Small,” diris Athelney Jones kolere.

“Jes, mi formetis ĝin, kien vi neniam tuŝos ĝin,” li kriis, ĝojege. “Tio estas mia trezoro; kaj se mi ne povas havi la riĉaĵojn, mi tre bone zorgos, ke neniuj havos ĝin. Mi diras al vi, ke neniuj vivanta persono havas rajton al ĝi, krom la tri viroj en la prizono de Andaman kaj mi mem. Mi nun scias, ke mi ne povos profiti de ĝi, kaj mi scias, ke ankaŭ ili ne povos. Mi ĉiam agis tiel multe por ili, kiel por mi mem. Ni ĉiam estis lojalaj al la signo de la kvar. Nu, mi scias, ke ili volus, ke mi faru ĝuste kiel mi faris, ĵetante la trezoron en Tamizon prefere ol lasi ĝin al parencoj de Sholto aŭ de Morstan. Ni ne faris kion ni faris al Aĥmet por riĉigi ilin. Vi trovos la trezoron, kie estas la ŝlosilo, kaj kie estas eta Tonga. Kiam

## La Signo de la Kvar

mi vidis, ke via ŝalupo sendube kaptos nin, mi formetis la ŝtelajon en sekuran lokon. Ne estas rupioj por vi en ĉi tiu vojaĝo.”

“Vi penas trompi nin, Small,” diris Athelney Jones severe. “Se vi deziris ĵeti la trezoron en Tamizon, estus pli facile enĵeti la keston kun ĉio.”

“Pli facile enĵeti kaj pli facile por vi retrovi ĝin,” li respondis, ruzeme strabe. “La homo sufiĉe lerta por finĉasi min, estas sufiĉe lerta por levi feran keston de la riverfondo. Nun, kiam la juveloj estas disŝutitaj laŭ kvin mejloj aŭ pli, la tasko eble estos pli malfacila. Mia koro krevis, kiam mi faris tion, tamen. Mi estis duonfreneza, kiam vi prokismiĝis al ni. Sed ne utilas lamenti tion. Mi pasigis bonajn kaj malbonajn momentojn en mia vivo, sed mi lernis bedaŭri nenion.”

“Ĉi tio estas tre serioza afero, Small,” diris la detektivo. “Se vi estus helpinta la justecon anstataŭ tiel malhelpinta ĝin, vi havus pli da eblecoj por favoro en via procedo.”

“Justeco!” mokis la ekskonviktito. “Bela justeco! Kies rabaĵo estas tio, se ne nia? Kie estas la justeco, se mi regas ĝin al tiuj, kiuj nenion faris por gajni ĝin? Rigardu kion mi faris! Dudek longajn jarojn en tiu febroplena marĉo, ĉiun tagon laboranta sub la mangrovaj arboj, la tutan nokton ĉenita en malpurega dometaĉo, pikita de moskitoj, tormentita de tremfebros, tiranita de ĉiu damninda negra policano, kiu estis kontentega pro la oportuno kvitiĝi kun blankulo. Tiel mi gajnis la trezoron de Agra. Kaj vi parolas al mi pri justeco, kvankam mi ne povas elteni la senton, ke mi pagis la prezon, nur por ke alia ĝuu ĝin! Mi preferus pendumiĝi dudek fojojn, aŭ havi unu el tiuj sagetoj de Tonga en mia felo, ol vivi en prizono ĉelo kaj senti, ke alia viro ripozas en palaco pro la mono, kiu devus esti mia.” Small jam faligis sian maskon de stoikismo, kaj tiu diskurso elverŝis en freneza ventego de vortoj, dum liaj okuloj flamegis, kaj la mankatenoj kuntintadis pro pasia movado de liaj manoj. Mi povis kompreni, kiam mi vidis la furiozecon kaj pasion de la viro, ke ne estis senbaza aŭ nenatura teruro, kiu kaptis Majoron Sholto, kiam li unue sciiĝis, ke la ofendita konviktito serĉas lin.

## La Signo de la Kvar

“Vi forgesas, ke ni scias nenion pri ĉio tio,” diris Holms kviete. “Ni ne ankoraŭ aŭdis vian rakonton, kaj ni ne povas diri ĝis kia grado la justeco favoris vin en la komenco.”

“Nu, sinjoro, vi jam parolis al mi juste, kvankam mi povas vidi, ke mi havas ĉi tiujn katenojn sur la pojn dank’ al vi. Tamen, mi ne tenas rankoron pro tio. Vi ludis honeste, kun la kartoj sur la tablo. Se vi deziras aŭdi mian rakonton, mi tute ne volas reteni ĝin. Tio, kion mi diras estas la pura vero, ĉiu vorto. Dankon. Bonvolu meti la glason apud mi ĉi tien, kaj mi metos miajn lipojn al ĝi, kiam mi estos seka.

“Mi estas de Worcestershir, naskita proksime al Pershore. Mi supozas, ke estas multe da homoj kun la nomo Small vivantaj tie nun. Mi ofte pensis pri vizitado tie, sed la vero estas, ke mi neniam portis honoron al mia familio, kaj mi dubas, ke ili bonvenigus min. Ili ĉiuj estis sobraj homoj, kapelanoj, etbienuloj, bone konataj kaj respektataj en la kamparo, dum mi estis vagademulo. Fine tamen, kiam mi estis okdekjara, mi faris al ili pli da ĉagreno, ĉar mi havis problemon pro knabino, kaj la sola elirvojo estis akcepti la salajron de la reĝino kaj rekrutiĝi en la Tria Regimento, kiu estis tuj irona al Hindujo.

“Mi ne estis destinita al multe da soldatado, tamen. Mi apenaŭ lernis la paŝon de ansero, kaj uzi mian musketon, kiam mi stulte decidis naĝi en Gango. Je mia bona fortuna, la serĝento de mia roto, John Holder, estis en la akvo samtempe, kaj li estis unu el la plej bonaj naĝantoj en la armeo. Kiam mi estis en la rivermezo, krokodilo atakis min, kaj formordis mian dekstran kruron, tiel nete kiel povus fari kirurgo, ĝuste supre de la genuo. Pro la ŝoko kaj la perdo de sango, mi svenis, kaj mi estus droninta, sed Holder kaptis min kaj naĝis unubrake al la bordo. Mi estis kvin monatojn en la hospitalo pro tio, kaj kiam mi fine povis ellami kun tiu ligna kruro ligita al mia stumpo, mi trovis min elarmeigita kiel invalido, kaj ne kapabla por iu ajn laboro.

“Mi estis, kiel vi povas imagi, monmankulo en tiu tempo, ĉar mi estis senutila kriplulo, kvankam mi ankoraŭ ne atingis mian dudekan jaron. Tamen, mia misfortuno baldaŭ montriĝis beno en alivesto. Viro nomita Abel White, kiu venis tien kiel kultivisto de indigoplantoj, serĉis laborestron por superrigardi liajn laboristojn kaj certigi, ke ili laboru.

## La Signo de la Kvar

Okazis, ke li estis amiko de nia kolonelo, kiu interesiĝis pri mi post mia akcidento. Por mallongigi longan rakonton, la kolonelo forte rekomendis min por la ofico. Ĉar la laboro estis farota plejparte sur ĉevalo, mia kruro ne estis granda obstaklo, ĉar restis al mi sufiĉe da genuo por bone stringi la selon. Mi devis rajdi tra la bienego, observi la homojn dum ili laboris, kaj raporti pri nelaborantoj. La pago estis justa, mia loĝejo estis komforta; sume mi estis kontenta pasigante la reston de mia vivo en plantado de indigarboj. S-ro Abel estis bonkorulo, kaj li ofte vizitis mian dometon kaj fumis pipon kun mi, ĉar blankuloj eksterlande traktas unu la alian kun pli da respekto, ol en nia lando.

“Nu, la fortune neniam favoris min longe. Subite, tute sen averto, eksplodis la granda ribelo. Antaŭ unu monato Hindujo ŝajnis tiel trankvila kaj paca, kiel Surrey aŭ Kent; la sekvantan monaton estis ducent mil nigraj diabloj liberigitaj, kaj la lando estis pura infero. Komperneble vi scias pri tio, sinjoroj,—multe pli ol scias mi, probable, ĉar mi neniam tre ŝatis legadon. Mi nur scias tion, kion mi vidis per miaj propraj okuloj. Nia bienego estis en loko nomita Muttra, proksime al la limo de la nordokcidentaj provincoj. Nokto post nokto la tuta ĉielo brilis pro la brulantaj bangaloj, kaj tago post tago malgrandaj grupoj de eŭropanoj pasis tra nia bienego kun edzinoj kaj infanoj, sur la vojo al Agra, kie estis la plej proksimaj soldatoj. S-ro Abel White estis obstinemulo. Li opiniis, ke la afero estis troigita, kaj ke ĝi forpasos tiel subite, kiel ĝi komenciĝis. Tie li sidis sur sia verando, drinkante glasojn da viskio kaj sodo kaj fumante tubcigarojn, dum la lando brulegis tute ĉirkaŭe. Nature, ni restis lojalaj al li, mi kaj Dawson, kiu, kun sia edzino, tenis la kontojn por li kaj administradis. Nu, unu belan tagon venis la katastrofo. Mi rajdis malrapide hejmen en la vespero, kiam mia okulo fiksiĝis sur io kuntirita ĉe la fondo de kruta kavaĵo. Mi malsupren rajdis por vidi kio ĝi estas, kaj mia koro ekfrostis, kiam mi trovis, ke tio estas la edzino de Dawson, tranĉita en striojn kaj duonvorita de ŝakaloj kaj sovaĝaj hundoj. Iom pli for en la vojo, Dawson mem kuŝis kun la vizaĝo al tero, tute morta, kun malplena revolvero en la mano kaj kvar Sipajoj kuŝantaj unu trans la alia antaŭ li. Mi tiris la rimenojn de mia ĉevalo, demandante min kien mi turniĝu, sed je tiu momento mi vidis dikan fumon spiralantan de la bangalo de Abel White kaj flamojn komencantajn penetri la tegmenton. Mi sciis tiam, ke mi ne plu povis

## La Signo de la Kvar

utili al mia dunginto, kaj, se mi intervenos en la afero, nur rezultos, ke mi perdos mian vivon.

De kie mi staris, mi povis vidi centojn da nigraj demonoj, ankoraŭ portantaj siajn ruĝaj jakojn, dancantaj kaj ululantaj ĉirkaŭ la brulanta domo. Kelkaj almontris min, kaj kelkaj kugloj zumis preter mia kapo. Do mi ekrajdegis trans la rizejoj, kaj trovis min malfrue en la nokto, sekura interne de la muroj de Agra.

“Kiel montriĝis, tamen, ankaŭ tie ne estis granda sekureco. La tuta lando estis ekcilita kiel svarmo de abeloj. Kie ajn la angloj povis formiĝi en malgrandajn bandojn, ili tenis la teron nur interne de la pafdistanco de siaj pafiloj. Ĉie alie ili estis sendefendaj fuĝantoj. Estis batalo de milionoj kontraŭ centoj; kaj la plej kruela parto de la afero estis, ke tiuj homoj, kontraŭ kiuj ni batalis, estis niaj propraj elektitaj soldatoj, kiujn ni instruis kaj trejnigis. Kaj ili uzis niajn proprajn armilojn kaj niajn proprajn klarionvokojn. En Agra estis la Tria Regimento de Bengalaj Fusilistoj, kelkaj sikoj, du kompanioj de kavalerio, kaj baterio de artilerio. Grupo de volontuloj el komizoj kaj komercistoj estis formita, kaj mi aliĝis, eĉ kun la ligna kruro. Ni eliris por alfronti la ribelantojn en Ŝahunge en frua julio, kaj ni repuŝis ilin dumio, sed nia pulvo elĉerpiĝis, kaj ni devis retreti al la urbo.

“Nenio alia ol la plej malbonaj novaĵoj venis al ni de ĉiu flanko. Tio ne estas surprize, ĉar, se oni rigardas mapon, oni vidos, ke ni estis en la koro de la maltrankviloj. Lucknow estas pli ol cent mejlojn oriente, kaj Cawpore preskaŭ same distance sude. De ĉiu punkto de la kompasoj ni aŭdis nur pri torturado, murdo kaj kolerego.

“La urbo, Agra, estas granda loko, kie svarmas fanatikuloj kaj krulegaj adorantoj de diabloj. Nia manpleno da homoj perdiĝis inter la mallarĝaj, serpentantaj stratoj. Nia ĉefo transloĝiĝis al trans la rivero do, kaj ekokupis postenon en la malnova fuorto ĉe Agra. Mi ne scias ĉu iu el vi, sinjoroj, iam aŭdis pri tiu malnova fuorto. Tio estas vere stranga loko,—la plej stranga, kiun mi iam vidis; kaj mi estis en pluraj kuriozaj lokoj. Unue, ĝi estas enorma. Mi pensus, ke la enfermejo amplekas multajn hektarojn. Estas moderna parto, kiu loĝigis nian tutan garnizonon, virinojn, infanojn, provizojn, kaj ĉion plu, lasante multe da

## La Signo de la Kvar

kromloko. Sed la moderna parto estas tre malgranda, kompare kun la malnova, kien neniu iras, kaj kiun oni lasas al la skorpioj kaj la centpieduloj. En ĝi troviĝas multaj grandaj, forlasitaj haloj, serpentantaj pasejoj, kaj longaj koridoroj interplektantaj, tiel ke estas tre facile perdi la vojon. Tial oni malofte eniris tien, kvankam fojfoje grupo kun torĉoj iris por esplorado.

“La rivero pasas laŭ la antaŭo de la malnova fuorto, kaj tiel protektas ĝin, sed je la flankoj kaj la malantaŭo estas multe da pordoj, kaj tiuj devis estis garditaj, kompreneble, kaj en la malnova parto kaj en la parto tenata de niaj soldatoj. Ni ne havis multajn homojn, apenaŭ sufiĉe por posteniĝi ĉe la anguloj de la konstruaĵo kaj la kanonoj. Estis neeble por ni do, posteni fortan gardistaron ĉe ĉiu el la sennombraj enirejoj. Anstataŭe ni organizis centran gardistejon en la mezo de la fuorto, kaj lasis ĉiun enirejon al la respondeco de unu blankulo kaj du-tri indiĝenoj. Mi estis elektita por regi dum certaj horoj de la nokto malgrandan, izolan pordon sur la sudokcidenta flanko de la konstruaĵo. Du sikaj soldatoj estis sub mia regado, kaj oni diris al mi, ke mi pafigu mian musketon, se estus problemo, kaj helpo tuj venos de la centra gardistejo. Sed la gardistejo estis almenaŭ ducent paŝojn for, kaj la interspaco estis dividita en labirinton de pasejoj kaj koridoroj, do mi havis seriozajn dubojn ĉu ili povus alveni sufiĉe rapide en kazo de vera atako.

“Nu, mi sentis min sufiĉe fiera, ĉar oni donis al mi tiun malgrandan oficon, kvankam mi estis nur nova rekrutito kaj lamulo. Du noktojn mi staris garde kun miaj Panĝaboj. Ili estis altaj, kruelegaspektaj uloj, nomitaj Mahomet Singh kaj Abdullah Khan, ambaŭ veteranaj batalantoj, kiuj portis armilojn kontraŭ ni ĉe Chilian Wallah. Ili parolis la anglan sufiĉe bone, sed ili malmulte volis paroli kun mi. Ili preferis stari kune la tutan nokton kaj babilaĉi en sia stranga sika lingvaĉo. Mi kutimis stari ekster la pordo rigardante malsupren al la larĝa, serpentanta rivero kaj la briletantaj lumoj de la granda urbo. La batado de tamburoj, kaj la batetado de tomtomoj, kaj la krioj kaj ululoj de la ribeluloj, sufiĉis por rememorigi al ni dum la tuta nokto pri niaj danĝeraj najbaroj trans la fluo. Ĉiun duan horon la oficiro de la nokto venis al ĉiu posteno por certigi, ke ĉio estas en ordo.

## La Signo de la Kvar

“La tria nokto de mia gardado estis malluma kaj tenebra, kun konstanta, malforta pluvo. La laboro stari en la pordejo horo post horo en tia vetero estis malgajiga. Mi penis denove kaj denove estigi konversacion kun la sikoj, sed sen sukceso. Je la dua matene, la rundiranto pasis kaj rompita momente la monotonecon de la nokto. Vidante, ke ne estas eble estigi konversacion kun miaj kunuloj, mi elprenis mian pipon, kaj kuŝigis mian musketon por ekbruligi la alumeton. Subite la du sikoj atakis min. Unu ekprenis mian musketon kaj direktis ĝin al mia kapo, dum la alia tenis tranĉilegon al mia gorĝo kaj ĵuris interdente, ke li ŝovos ĝin en min, se mi faros eĉ unu paŝon.

“Mia unua penso estis, ke tiuj uloj agas por la ribeluloj, kaj ke tio estis la komenco de atako. Se la pordoj falus en la manojn de la Sipajoj, la loko falus, kaj la virinoj kaj infanoj samsortus kiel tiuj en Cawnpore. Eble vi pensos, sinjoroj, ke mi nur ŝajnigas meriton por mi mem, sed mi donas al vi mian vorton, ke, kiam mi pensis pri tio, kvankam mi sentis la tranĉilon sur mia gorĝo, mi malfermis la buŝon por elligi krion, eĉ se tiu estus mia fina, por alarmi la ĉefan gardistejon. La viro, kiu tenis min ŝajnis koni miajn pensojn; ĉar, ĝuste dum mi enspiris por krei, li flustris, ‘Ne faru bruon. La fuorto estas sufiĉe sekura. Ne estas ribelaj hundoj je ĉi tiu flanko de la rivero.’ Lia voĉo donis impreson, ke li diras la veron, kaj mi sciis, ke, se mi elkrios, mi mortos. Mi povis legi tion en la brunaj okuloj de la alia. Mi atendis do, silente, por vidi kion ili volas de mi.

“Aŭskultu al mi, Sahibo,’ diris la pli alta kaj pli kruela el la du, tiu, kiun oni nomis Abdullah Khan. ‘Vi devas nun aŭ partiiĝi kun ni, aŭ ni silentigos vin por eterne. La risko, kiun ni prenas estas tro granda por ke ni hezitu. Aŭ vi ĵuros per la kruco de la kristanoj, ke vi estas de nia partio en koro kaj animo, aŭ via kadavro ĉi tiun nokton estos ĵetita en fosaĵon kaj ni transiros al niaj fratoj en la ribela armeo. Ne ekzistas meza vojo. Kiun vi elektas? Ĉu la morton aŭ la vivon? Ni povas doni al vi nur tri minutojn por decidi, ĉar la tempo pasas, kaj ĉio devas esti farita antaŭ la reveno de la rundiranto.’

“ ‘Kiel mi povas decidi?’ diris mi. ‘Vi ne diris al mi, kion vi volas de mi. Sed mi diras al vi nun, ke, se temas pri la sekureco de la fuorto, mi tute ne volas scii pri la afero, kaj vi prefere ŝovu la tranĉilon al ĝia celo.’

## La Signo de la Kvar

“Tute ne temas pri io kontraŭ la fuorto,” diris li. “Ni proponas nur, ke vi faru tion, por kio viaj samlandanoj venas al ĉi tiu lando. Ni proponas al vi, ke vi estu riĉa. Se vi fariĝos unu el ni hodiaŭ nokte, ni ĵuros al vi per la nuda tranĉilo, kaj uzante la trioblan ĵuron, kiun neniu siko iam rompis, ke vi havos vian justan parton de la rabaĵo. Kvarono de la trezoro estos via. Ni ne povas fari pli justan proponon.”

“Sed kia estas la trezoro do?” mi demandis. “Mi estas kiel eble plej preta esti riĉa, se vi nur montros al mi, kiel tio efektiviĝus.”

“Vi ĵuras do,” per la ostoj de via patro, per la honoro de via patrino, per la kruco de via religio, ke vi ne levos manon aŭ diros vorton kontraŭ ni, ĉu nun, ĉu poste?”

“Mi ĵuros tion,” kondiĉe ke la fuorto ne estas endanĝerigita.”

“Tiuokaze miaj kamaradoj kaj mi ĵuros, ke vi ricevos kvaronon de la trezoro, kiu estos dividita egale inter ni kvar.”

“Sed ni estas tri,” diris mi.

“Ne; Dost Akbar devas havi sian porcion. Ni povas diri al vi la rakonton, dum ni atendas ilin. Vi staru ĉe la pordo, Mahomet Singh, kaj diru al ni, kiam ili venos. La afero staras jene, Sahibo, kaj mi diras tion al vi, ĉar mi scias, ke eŭropano sentas sin devigita de siaj ĵuroj, kaj ke ni devas fidi vin. Se vi estus mensogema hinduo, kvankam tiu ĵuris per ĉiuj dioj en iliaj falsaj temploj, via sango estus sur la tranĉilo, kaj via korpo en la akvo. Sed la siko konas la anglon, kaj la anglo konas la sikon. Aŭskultu do tion, kion mi diros al vi.

“Estas raĝo en la nordaj porvincoj, kiu estas tre riĉa, kvankam lia tero estas malgranda. Multe venis al li de lia patro, kaj eĉ pli li mem akiris, ĉar li estas de malbona karaktero kaj hamstras sian oron anstataŭ elspezi ĝin. Kiam ekokazis la ribelo, li volis estis amiko kaj al la leono kaj al la tigro,—la Sipajoj kaj la registaro de la Kompanio. Baldaŭ, tamen, ŝajnis al li, ke la fino de la blankuloj proksimiĝas, ĉar tra la tuta lando li aŭdis nur pri ilia morto kaj renversiĝo. Tamen, ĉar li estis zorgemulo, li planis tiel, ke, kio ajn okazos, almenaŭ duono de lia trezoro restos al li. Sian



## La Signo de la Kvar

oron kaj arĝenton li tenis en la ŝloskeloj de sia palaco, sed la plej altvalorajn gemojn kaj la plej perfektajn perlojn li metis en feran keston. Tion li sendis per fidinda servisto, kiu, sub alivesto de komercisto, portis ĝin al la fuorto ĉe Agra, por ke ĝi restu tie, ĝis estos paco en la lando. Tiel, se la ribeluloj venkus, li havus sian monon, sed, se la Kompanio venkus, restus al li liaj juveloj. Post kiam li tiel dividis sian hamstraĵon, li aliĝis al la afero de la Sipajoj, ĉar ili estis fortaj ĉirkaŭ liaj terlimoj. Rimarku, Sahibo, ke, kiam li faris tion, lia propraĵo fariĝas laŭleĝa rabaĵo por tiuj, kiuj restis lojalaj.

“ ‘Tiu ŝajnigata komercisto, kiu vojaĝas sub la nomo, Aĥmet, estas nun en la urbo Agra, kaj deziras eniri en la fuorton. Mia vartfrato, Dost Akbar, akompanas lin kiel kompano de vojaĝo, kaj konas lian sekreton. Dost Akbar promesis, ke li kondukos lin hodiaŭ nokte al flanka enirejo de la fuorto, kaj elektis ĉi tiun por tiu celo. Li baldaŭ venos ĉi tien, kaj li trovos, ke Mahomet Singh kaj mi atendas lin. La loko estas izola, kaj neniuj scios pri lia alveno. La mondo ne plu konos la komerciston Aĥmet, sed la granda trezoro de la raĝo estos dividita inter ni. Kion vi diras pri tio, sahibo?’

“En Worcestershire la vivo de homo ŝajnas granda kaj sankta afero; sed estas malsame, kiam estas fajro kaj sango ĉie ĉirkaŭe, kaj oni renkontas morton je ĉiu momento. Ĉu Aĥmet, la komercisto, vivos aŭ mortos, estis tute indiferente al mi, sed kiam li parolis pri la trezoro, mia koro eksaltis, kaj mi pensis pri kion mi povus fari en la hejmlando per tio, kaj kiel mia familio alĝapus, kiam ili vidis sian senutilan idon reventanta kun la poŝoj plenaj de ormoneroj. Mi jam decidis do. Tamen, Abdullah Khan pensis, ke mi hezitas, kaj li komencis insisti.

“ ‘Konsideru, Sahibo,’ diris li, ‘ke, se tiu viro estas kaptita de la komandanto, li estos pendumita aŭ pafita, kaj la juvelojn prenos la registaro, tiel ke neniuj gajnos eĉ unu rupion. Nu, se ni kaptos lin, kial ni ne faru ankaŭ la ceteron? La juveloj estos same bone kun ni, kiel en la kofroj de la Kompanio. Estos sufiĉe por fari nin riĉaj kaj potencaj homoj. Neniuj povas scii pri la afero, ĉar ĉi tie ni estas izolitaj de aliaj homoj. Kia loko povus esti pli bona por la celo? Diru denove do, Sahibo, ĉu vi estas kun ni, aŭ ĉu ni devas rigardi vin kiel malamikon.’

## La Signo de la Kvar

“Mia koro kaj mia animo estas kun vi,” diris mi.

“ ‘Estas bone,’ li respondis, redontane al mi mian musketon. ‘Vi vidas, ke ni fidas vin, ĉar via vorto, kiel nia, estas nerompenda. Nun ni devas nur atendi mian fraton kaj la komerciston.’

“ ‘Ĉu via frato scias do pri tio, kion vi faros?’ mi demandis.

“ ‘La plano estas lia. Li elpensis ĝin. Ni iros al la pordo kaj gardos kune kun Mahomet Singh.’

“La pluvo daŭre falis konstante, ĉar estis nur la komenco de la malseka sezono. Brunaj, densaj nuboj drivis trans la ĉielo, kaj estis malfacile vidi pli malproksimen ol la limo de ĵetita ŝtono. Profunda ĉirkaŭfosaĵo kuŝis antaŭ nia pordo, sed la akvo en diversaj lokoj estis vaporiginta, kaj ĝi estis facile transirebla. Estis strange al mi stari tie kun tiuj du kruelaj Panĝaboj atendantaj viron venantan al sia morto.

“Subite mi vidis ekbrileton de ŝirmita lanterno sur la alia flanko de la fosaĵo. Ĝi malaperis inter la teramasoj, kaj aperis denove venanta malrapide direkte al ni.

“ ‘Jen ili!’ mi eldiris.

“ ‘Vi haltigos ilin, Sahibo, kiel kutime,’ flustris Abdullah. ‘Ne donu al li moviton por timi. Ensendu nin kun li, kaj ni faros la ceteron, dum vi staras garde ĉi tie. Tenu la lanternon tuj-malkovrebla, por ke ni povu certi, ke li estas la atendato.’

“La flagretanta lumo venis antaŭen, jen haltante, jen venante, ĝis mi povis vidi du malhelajn figurojn sur la alia flanko de la fosaĵo. Mi lasis ilin grimpi malsupren laŭ la dekliva bordo, plaŭdi tra la koto, kaj suprengrimpi duonvoje al la pordo, antaŭ ol mi haltigis ilin.

“ ‘Kiu venas?’ diris mi per mallaŭta voĉo.

“ ‘Ni estas amikoj,’ venis la respondo. Mi malkovris mian lanternon kaj ĵetis lumon sur ilin. La unua estis grandega siko, kun nigra barbo, kiu falis preskaŭ al lia larĝa zono. Ekster cirko, mi neniam vidis homon tiel

## La Signo de la Kvar

altan. La alia estis malgranda, grasa rondulo, kun granda, flava turbano, kaj pako en la mano, volvita en ŝalo. Li ŝajne timegis, ĉar liaj manoj tremis kvazaŭ pro febro, kaj lia kapo turnriĝis dekstren-maldekstren kun du malgrandaj briletantaj okuloj, kiel muso, kiam ĝi riskas veni el truo. La penso pri mortigado de li tremigis min, sed mi pensis pri la trezoro, kaj mia koro tiel malmoliĝis kiel siliko. Kiam li vidis mian blankan vizaĝo, li eligis etan pepon de ĝojo kaj venis kurante direkte al mi.

“ ‘Protektu min, Sahibo,’ li diris anhele,—protektu min, la malfeliĉa komercisto Aĥmet. Mi vojaĝis trans Raĝputana, por peti ŝirmon en la fuorto ĉe Agra. Mi estis prirabita kaj batita kaj mistraktita, ĉar mi estis amiko de la Kompanio. Ĉi tiu estas benita nokto, ĉar mi denove estas en sekureco,—mi kaj miaj humilaj posedaĵoj.’

“ ‘Kion vi havas en la pako?’ mi demandis.

“ ‘Feran keston,’ li respondis, ‘kiu entenas unu-du familiaj aferoj kun nenia voloro al aliaj, sed kies perdon mi bedaŭrus. Sed mi ne estas almuzulo, kaj mi kompencos vin, juna Sahibo, vin kaj ankaŭ vian estron, se vi donos al mi la ŝirmon, kiun mi petas.’

“Mi ne povis fidi mian kapablon regi min, se mi plu parolus kun tiu viro. Ju pli mi rigardis lian grasan, timoplenan vizaĝon, des pli malfacile estis pensi, ke ni murdos lin senkomplete. Prefere oni tuj finu la aferon.

“ ‘Konduku lin al la ĉefa gardisto,’ diris mi. La du sikoj lokis sin ambaŭflanke de li, kaj la giganto venis malantaŭ li, dum ili enmarŝis tra la malluma pordo. Neniam estis homo tiel volvita en morto. Mi restis ĉe la pordo kun la lanterno.

“Mi povis aŭdi la regulan tretadon de iliaj paŝoj sonantaj tra la izolaj koridoroj. Subite tio ĉesis, kaj mi aŭdis voĉojn, kaj barakton, kun la sono de batoj. Post momento mi aŭdis kun teruro, hastantajn paŝojn venantajn en mia direkto, kun la laŭta spirado de kuranta viro. Mi turnis la lanternon laŭ la longa, rekta koridoro, kaj jen estis la grasa viro, kuranta kiel la vento, kun ŝmirita sango trans la vizaĝo, kaj tuj malantaŭ li saltanta kiel tigro, la granda, nigrabarba siko, kun tranĉilo ekbrilanta en la mano. Mi neniam vidis homon kuri tiel rapide kiel tiu eta komercisto.

## La Signo de la Kvar

Li pli malproksimiĝis de la siko, kaj mi povis vidi, ke, se li pasos min kaj atingas la eksteron, li ankoraŭ povos savi sin. Mi kompatis lin, sed denove la penso pri la trezoro faris min malmola kaj amara. Mi ĵetis mian pafilon inter liajn krurojn dum li preterkuregis, kaj li ruliĝis du fojon, kiel pafita kuniklo. Antaŭ ol li povis ŝanceliĝe restari, la siko falis sur lin, kaj plejprofundenigis sian ponjardon du fojojn en lian flankon. La viro nek eligis ĝemon, nek movis muskolon, sed li kuŝis, kiel li falis. Mi pensas, ke eble li rompis la kolon dum la falo. Vi vidas, sinjoroj, ke mi plenumas mian promeson. Mi diras al vi ĉiun detalon de la afero, ĝuste kiel ĝi okazis, ĉu tio favoras min aŭ ne.”



**La siko falis sur lin, kaj plejprofundenigis sian ponjardon du fojojn en lian flankon.**

Li ĉesis kaj eltenis la katenitajn manojn por la viskiakvo, kiun Holms jam faris por li. Mi konfesas, ke tiu viro nun inspiris en mi ekstreman abomenon, ne nur pro tiu senkompata agado, en kiu li partoprenis, sed

## La Signo de la Kvar

ankaŭ pro la iom frivola kaj senzorga maniero, en kiu li rakontis ĝin. Malgraŭ kia ajn puno li ricevos, mi sentis, ke li ricevos nenian simpatian de mi. Ŝerlok Holms kaj Jones sidis kun la manoj sur la genuoj, profunde interesitaj pri la rakonto, sed kun la sama abomeno legebla sur la vizaĝo. Li eble observis tion, ĉar estis nuanco de defio en lia voĉo kaj mieno, kiam li rekomencis.

“Ĉio tio estis tre malbona, sendube,” diris li. “Mi scivolas kiom da uloj en mia situacio rifuzus porcion de tiu rabaĵo, sciante, ke sia rekompenco pro tio estos tranĉita gorĝo. Krome, temis pri mia vivo aŭ lia, kiam li jam estis en la fuorto. Se li eskapis, la tuta afero venus al lumo, kaj oni juĝus min en militrribunalo kaj mortpafus min plejprobable. La homoj ne estis tre pardonemaj en tia tempo.”

“Daŭrigu vian rakonton,” diris Holms, malpacience.

“Nu, ni enportis lin, Abdullah, Akbar, kaj mi. Kaj tre peza li estis malgraŭ sia malalteco. Ni lasis Mahomet Singh al gardado de la pordo. Ni portis lin al loko, kiun la sikoj jam preparis. Ĝi estis sufiĉe malproksime, kie serpentanta pasejo kondukas al granda, malplena halo, kie la brikaj muroj dispeciĝis. La tera planko jam kaviĝis en unu loko, formante naturan tombon, do ni lasis Aĥmet, la komerciston tie, post kiam ni kovris lin per falintaj brikoj. Fininte tion, ni revenis al la trezoro.

“Ĝi kuŝis tie, kie li faligis ĝi, kiam li estis unue atakita. La kesto estis tiu sama, kiu nun kuŝas sur via tablo. Ŝlosilo estis pendigita per silka ŝnuro al tiu skulptita tenilo sur la kovrilo. Ni malfermis ĝin, kaj la lumo de la lanterno briletis sur kolekto de gemoj, pri kiaj mi legis kaj pensis, kiam mi estis etulo en Pershore. Ili estis blindigaj al la okuloj. Kiam ni jam sufiĉe kontemplan ilin, ni elprenis ilin kaj listigis ilin. Estis cent kvardek tri unuakvalitaj diamantoj, inkluzive unu, kiun oni nomas ‘La Granda Mogolo,’ kaj oni diras, ke ĝi estas la due pli granda ŝtono ekzistanta. Poste estis naŭdek kvin tre fajnaj smeraldoj, kaj cent sepdek rubioj, el kiuj kelkaj, tamen, estis malgrandaj. Estis kvardek karbunkoloj, ducent safiroj, sesdek unu agatoj, kaj granda kvanto da beriloj, oniksoj, kat-okuloj, turkizoj, kaj aliaj ŝtonoj, kies ĝustajn nomojn mi ne konis en tiu tempo, kvankam mi plibone konatiĝis kun ili poste. Krom tio, estis preskaŭ tricent tre altkvalitaj perloj, el kiuj dek du estis

## La Signo de la Kvar

muntitaj en ora kroneto. Parenteze, tiuj lastaj estis elprenitaj el la kesto, kaj ne estis en ĝi kiam mi rehavis ĝin.

“Post kiam ni kalkulis la trezoron, ni remetis ĝin en la kofron kaj portis ĝin al la pordo por montri ĝin al Mahomet Singh. Tiam ni solene renovigis nian voton apogi unu la alian kaj gardi nian sekreton. Ni konsentis kaŝi nian ŝtelaĵon en sekura loko, ĝis estos denove paco en la lando, kaj ke tiam ni dividus ĝin egale inter ni. Ne estus utile tuj dividi ĝin, ĉar, se oni trovus tiel valorajn gemojn ĉe ni, tio kaŭzus suspekton, kaj ne estis izolaj lokoj en la fuorto, nek loko por teni ilin. Ni portis la skatolon do, en la saman halon, kie ni enterigis la kadavron, kaj tie, sub certaj brikoj en la plej bone konservita muro, ni faris kavaĵon kaj enmetis nian trezoron. Ni zorge rimarkis la lokon, kaj la sekvantan tagon mi faris kvar mapojn, unu por ĉiu el ni, kaj metis la signon de la kvar al la malsupro, ĉar ni ĵuris, ke ĉiu el ni ĉiam agos por ĉiuj, por ke neniu havu vantaĝon super la aliaj. Pri tiu ĵuro, mi povas meti la manon sur la koro kaj ĵuri, ke mi neniam rompis ĝin.

“Nu, ne necesas rakonti al vi sinjoroj kiel finiĝis la hinda ribelado. Post kiam Wilson kaptis Delion kaj Kavaliro Colin liberigis Lucknow, la spino de la afero estis rompita. Alvenis novaj trupoj, kaj Nana Sahib malaperis trans la landlimo. Rapida kolono komandata de Kolonelo Greathed venis al Agra kaj fuĝigis la Sipajojn. Ŝajnis, ke paco venas al la lando, kaj ni kvar komencis esperi, ke la horo venas, kiam ni povos sekure foriri kun nia rabaĵo. En momento, tamen, niaj esperoj frakasiĝis, kiam ni estis arestitaj kiel la murdintojn de Aĥmet.

“Okazis jene: Kiam la Raĝo metis siajn juvelojn en la manojn de Aĥmet, li faris tion, ĉar li sciis, ke li estas fidindulo. Homoj en la oriento estas suspektemaj, tamen; do la Raĝo sendis duan, eĉ pli fidindan servistion por spioni la unuan. Tiu dua sendito havis ordonojn ĉiam teni Aĥmet en la vido, kaj li sekvis lin kiel ombro. Li postsekvis lin tiun nokton kaj vidis lin pasi tra la pordon. Nature, li pensis, ke li rifuĝis en la fuorto, kaj mem petis permeson enveni la sekvantan tagon. Sed li tute ne povis trovi Aĥmet. Tio ŝajnis al li tiel stranga, ke li parolis pri tio al la serĝento de gvidistoj, kiu sciigis la komandanton. Oni tuj faris zorgan priserĉon, kaj la kadavro estis malkovrita. Sekve, ĝuste en la momento, kiam ni

## La Signo de la Kvar

pensis, ke estas tute sekure, ni estis kaptitaj, ĉiuj kvar, kaj alvenigitaj al proceso pro akuzo de murdo,—tri el ni, ĉar ni gardis la pordon tiun nokton, kaj la kvara, ĉar oni sciis, ke li akompanis la murditon. Ne estis mencio pri la juveloj dum la proceso, ĉar la Raĝo estis detronigita kaj elpelita el Hindujo; do neniu aparte interesiĝis pri ili. La murdo estis klare perceptita, tamen, kaj estis certe, ke ni ĉiuj partoprenis en ĝi. La tri sikoj estis kondamnitaj al punservuto ĝis morto, kaj mi estis kondamnita al morto, kvankam mia puno estis poste plimildigita al la sama kiel ilia.

“Nia situacio estis sufiĉe kurioza tiam. Jen estis ni kvar, katenitaj de la kruro, kaj kun malgrandega probableco de eventuala liberiĝo, dum ĉiu el ni tenis sekreton, kiu povus meti ĉiun el ni en palacon, se ni nur povus utiligi ĝin. Estis sufiĉe por kolerfrenezigi nin, kiam ni devis toleri la piedbatojn kaj pugnobatojn de ĉiu et-oficiro, aŭ ni devis manĝi rizon kaj trinki akvon, kiam tiuj mirindaj riĉaĵoj estas pretaj ekstere, nur atendantaj alprenon. Tio povus frenezigi min; sed mi ĉiam estis sufiĉe obstina ulo, do mi nur eltenis kaj atendis pacience.

“Fine ŝajnis al mi, ke venis la horo. Mi estis transportita de Agra al Madras, kaj de tie al Insulo Blair en Insuloj Andaman. Estis tre malmulte da blankaj konviktitoj en tiu prizono, kaj, ĉar mi jam bone kondukis de la komenco, mi baldaŭ fariĝis speco de privilegiulo. Oni donis al mi dometaĉon en Hope Town, kiu estas malgranda vilaĝo sur la deklivoj de Monto Harriet, kaj oni lasis min pli-malpli libera. Tio estis morna, febraflitka loko, kaj ĉie ekster niaj senarbigitejoj estis infestite de sovaĝaj, kanibalaj indiĝenoj, kiuj estis pretpretaj blovpafi venenan sageton al ni, se ili havos ŝancon. Estis fosado, kaj plantado de ignamoj, kaj deko da aliaj farendaĵoj, do ni estis sufiĉe okupataj dum la tago; sed, en la vespero, ni havis iom da libertempo. Inter aliaj aferoj, mi lernis disdoni drogojn por la kuracisto, kaj akiris iom da lia scio. La tutan tempon mi atendis oportunon eskapi; sed tiu insulo estis centojn da mejloj for de ia alia lando, kaj la tiea maro estas preskaŭ senventa: do estis terure malfacile forfuĝi.

“La kuracisto, D-ro Somerton, esti juna ludemulo, kaj la aliaj junaj oficiroj kutimis kunveni en lia ĉambraro por ludi je karto. La kuracejo,

## La Signo de la Kvar

kie mi kutimis prepari la drogojn, estis apud lia salono, kun malgranda fenestro inter ni. Ofte, kiam mi sentis min soleca, mi malŝaltis la lampon en la kuracejo, kaj tiam, tie starante, mi povis aŭdi ilian paroladon kaj observi ilian ludadon. Tre plaĉas al mi ludi je kartoj, kaj observi estis preskaŭ tiel agrable kiel ludi. En la grupo estis Majoro Sholto, Kapitano Morstan, kaj Leŭtenanto Bromley Brown, kiuj komandis la indiĝenajn soldatojn, kaj la kuracisto mem, kaj du-tri oficistoj de la prizono, spertaj ludantoj, kiuj ludis bone, ruzeme kaj malriskeme. Kune ili formis bonordan etan grupon.

“Nu, unu afero tre baldaŭ trafis min, kaj tio estis, ke la soldatoj ĉiam malgajnis kaj la civiluloj gajnis. Rimarku, mi ne diras, ke okazis io maljusta, sed tiel estis. La prizonistoj faris malmulte pli ol ludi je kartoj la tutan tempon, post kiam ili venis al Insuloj Andaman. Kaj ĉiu elkonis la ludadon de la ceteraj, dum la soldatoj ludis nur por pasigi la tempon, kaj metis la kartojn iele-trapele. Nokton post nokto la soldatoj leviĝis de la ludado plimalriĉuloj, kaj ju pli ili malriĉiĝis, des pli ili deziris ludi. Majoroj Sholto estis plej malprosperinta. En la komenco li ludis per biletoj kaj oraj moneroj, sed baldaŭ li uzis personajn ŝuldnotojn, por grandaj sumoj. Foje li gajnis kelkajn manojn, nur sufiĉe por kuraĝigi lin, kaj poste la sorto malfavoris lin pli ol antaŭe. La tutan tagon li vagadis malbonhumorege, kaj li komencis drinki multe pli ol konvenis al li.

“Unu nokton li malgajnis eĉ pli ol kutime. Mi sidis en mia dometo, kiam li kaj K-no Morstan stumblis sur la vojo al sia loĝejo. Ili estis koraj amikoj, tiuj du, kaj ili neniam estis longe malkune. La majoro parolis delire pri siaj malgajnoj.

“ ‘Jen la fino, Morstan,’ diris li, dum ili pasis mian dometon. ‘Mi devos ekŝiĝi. Mi estas ruinigito.’

“ ‘Sensencaĵon, amiko!’ diris la alia, frapetante lian ŝultron. Ankaŭ al mi estis malbona tempo, sed...’ Tio estas ĉio, kion mi povis aŭdi, sed tio sufiĉis por pensigi min.

“Post kelkaj tagoj Majoro Sholto promenis sur la marbordo. Do mi riskis paroli kun li.



## La Signo de la Kvar

“ ‘Mi volus peti vian konsilon, majoro,’ diris mi.

“ ‘Bone, Small, pri kio temas?’ li demandis, prenante sian cigaron de inter la lipoj.

“ ‘Mi volis demandi al vi, sinjoro,’ diris mi, ‘kiu estas la plej taŭga persono, al kiu oni transdonus kaŝitan trezoron. Mi scias kie kuŝas rabaĵo valoranta duonmilionon da pundoj, kaj, ĉar mi mem ne povas uzi ĝin, mi pensis, ke estus plej bone por mi transdoni ĝin al la taŭgaj aŭtoritatoj, kaj tiel ili eble malplilongigos mian puntempon.’

“ ‘Ĉu duonmiliono, Small?’ li kriis anhele, rigardante min atente por vidi ĉu mi parolas sincere.

“ ‘Jes ja, sinjoro,—en juveloj kaj perloj. Ĝi kuŝas preta por iu ajn. Kaj plejkurioze estas, ke la ĝusta posedanto estas eksterleĝulo kaj ne rajtas posedi propraĵojn. Tial ĝi apartenos al la unua trovinto.’

“ ‘Al la registaro, Small,’ li balbutis,—‘al la registaro.’ Sed li diris tion hezite, kaj mi sciis en la koro, ke mi kaptis lin.

“ ‘Vi pensas do, sinjoro, ke mi devas doni la informojn al la Ĝenerala Ŝtatestro, ĉu?’ diris mi trankvile.

“ ‘Nu, nu, vi ne devas agi haste, aŭ eble vi poste bedaŭros. Diru al mi la tutan rakonton, Small. Donu al mi la faktojn.’

“Mi diris al li la tutan rakonton, kun malgrandaj ŝanĝoj, por ke li ne povu identigi la lokojn. Kiam mi finis, li staris tute semove, en profunda pensado. Mi povis vidi per la tiko de lia lipo, ke baraktado okazas interne de li.

“ ‘Ĉi tio estas tre grava afero, Small,’ diris li fine. ‘Vi ne devas diri eĉ unu vorton pri tio al iu ajn, kaj mi baldaŭ vidos vin denove.’

“Post du noktoj, li kaj lia amiko K-no Morstan venis al mia dometo en la noktmezo kun lanterno.

## La Signo de la Kvar

“ ‘Mi volas, ke vi nur diru tiun rakonton al K-no Morstan de via propra buŝo, Small,’ diris li.

“ ‘Mi ripetis ĝin, kiel mi diris antaŭe.

“ ‘Ĝi sonas aŭtentika, ĉu ne?’ diris li. ‘Ĉu ĝi ŝajnas sufiĉe vera por meriti agadon?’

“ ‘K-no Morstan kapjesis.

“ ‘Aŭskultu, Small,’ diris la majoro. ‘Ni diskutis tion, mi kaj mia amiko, kaj ni konkludis, ke ĉi tiu via sekreto tute ne estas afero por la registaro, finfine, sed privata afero por vi, pri kio vi havas la rajton disponi laŭ via bontrovo. Nu, la demando estas, kian prezon vi postulus pro ĝi? Eble ni inklinus okupiĝi pri la afero, aŭ almenaŭ esplori ĝin, se ni povus konsenti pri kondiĉoj.’ Li penis paroli en senpasia, senzorga maniero, sed liaj okuloj briletis pro ekscitiĝo kaj avareco.

“ ‘Nu, koncerne tion, sinjoroj,’ mi respondis, penante ŝajni trankvila, sed sentante min tiel ekscitita kiel li, ‘estas nur unu interkonsento, kiun homo en mia situacio povas fari. Mi volas, ke vi helpu min liberiĝi, kaj tiel same por miaj amikoj. Tiam ni akceptos vin kiel partnerojn, kaj donos al vi kvinonan porcion por kundividi inter vi.’

“ ‘Hm!’ diris li. ‘Kvinonan porcion! Tio ne estas tre tentanta.’

“ ‘Tio rezultus en kvindek mil por ĉiu el vi,’ diris mi.

“ ‘Sed kiel ni povus liberiĝi vin? Vi scias tre bone, ke vi petas neblaĵon.’

“ ‘Tute ne,’ mi respondis. ‘Mi jam elpensis la aferon ĝis la lasta detalo. La sola obstaklo al nia eskapo estas, ke ni ne povas akiri boaton taŭgan por tia vojaĝo, nek provizojn por tiel longa tempo. Estas multe da malgrandaj jaktoj kaj joloj en Kalkato aŭ Madraso, kiuj servus por nia celo. Vi venigu unu tian. Ni aranĝos enboatiĝi nokte, kaj, se vi metos nin sur ian ajn parton de la bordo de Hindujo, vi plenumos vian parton de la interkonsento.’

## La Signo de la Kvar

“ ‘Se temus pri nur unu persono...’ diris li.

“ ‘Ĉiuj aŭ neniuj,’ mi respondis. ‘Ni ĵuris pri tio. Ni kvar devas ĉiam agi kune.’

“ ‘Ĉu vi vidas, Morstan,’ diris li, ‘Small estas sinjoro de sia vorto. Li ne forlasas siajn amikojn. Mi pensas, ke ni tre bone povas fidi pri li.’

“ ‘Tio estas aĉa afero,’ la alia respondis. ‘Tamen, kiel vi diras, tio evitigus nian eksiĝon treege bone.’

“ ‘Nu, Small,’ diris la majoro, ‘mi supozas, ke ni devas akcepti viajn kondiĉojn. Unue, nature, ni devas provi la verecon de via rakonto. Diru al mi kie la skatolo estas kaŝita, kaj mi atingos forirpermeson kaj reiros al Hindujo en la ĉiumonata provizboato por kontroli pri la afero.’

“ ‘Ne tiel haste,’ diris mi, malvarmiĝante dum li varmiĝis. ‘Mi devas havi la konsenton de miaj tri kamaradoj. Mi diras al vi, ke temas pri kvar aŭ neniuj ĉe ni.’ ”

“ ‘Sensencaĵo!’ li interrompis. ‘Kiel tri nigruloj rilatus al nia konsento?’

“ ‘Ĉu nigruloj aŭ blululoj,’ diris mi, ‘ili estas kun mi kaj ni ĉiuj estas kune.’

“Nu, la afero finiĝis en dua kunveno, en kiu Mahomet Singh, Abdullah Khan, kaj Dost Akvar ĉiuj ĉeestis. Ni diskutis la aferon denove, kaj fine ni interkonsentis. Ni konsentis, ke ni donos al ĉiu el la du oficiroj mapon de la parto de la fuorto de Agra kaj markos la lokon en la muro, kie la trezoro estis kaŝita. M-ro Sholto iros al Hindujo pro provi nian rakonton. Se li trovos la skatolon, li lasos ĝin tie, kaj sendos malgrandan jakton provizitan por vojaĝo, kiu ankriĝos proksime al la Insulo Rutland por ricevi nin. Post tio li reiros al sia deĵoro. Tiam K-no Morstan petos forirpermeson por rendevui kun ni ĉe Agra. Tie ni faros finan dividon de la trazono, kaj li prenos la parton de la majoro kune kun sian. Ĉion ni sigelis per la plej solenan ĵuron, pri kiu la menso kapablis pensi, kaj la lipoj elparoli. Mi maldormis la tutan nokton, kaj en la mateno mi havis la du mapojn tute pretaj, subskribitaj kun la signo de la kvar,—tio estas, de Abdullah, Akbar, Mahomet, kaj mi mem.

## La Signo de la Kvar

“Nu, sinjoroj, mi lacigas vin per mia longa rakonto, kaj mi scias, ke mia amiko, S-ro Jones, estas senpacienca por sekure enkarcerigi min. Mi faros ĝin kiel eble plej mallonga. La kanajlo, Sholto, foriris al Hindujo, sed li neniam revenis. K-no Morstan montris al mi lian nomon en listo de pasaĝeroj en unu el la poŝtboatoj foririnta baldaŭ poste. Oni diris, ke onklo lia mortis, kaj postlasis al li grandajn riĉaĵojn, kaj li elarmeigis. Tiel avidaĉe li friponis nin kvin. Morston baldaŭ transiris al Agra, kaj trovis, kiel ni atendis, ke la trezoro estas for. La fiaĉulo tute forŝtelis ĝin, sen plenumi eĉ unu el la kondiĉoj, laŭ kiuj ni vendis al li la sekreton. De tiu tago mi vivis nur por venĝo. Mi pensis pri tio tage kaj vartis tion nokte. Tio fariĝis superreganta, ĉionkonsumanta pasio al mi. Ne gravis al mi la leĝo—ne gravis al mi la pendumilo. Eskapi, spuri Sholto, teni miajn manojn sur lia gorĝo,—tio estis mia sola penso. Eĉ la trezoro de Agra fariĝis pli malgrava en mia menso, ol la mortigado de Sholto.

“Nu, dum mia vivo mi proponis al mi multajn celojn, kaj ĉiun mi finfaris. Sed pasis multaj lacaj jaroj, antaŭ ol venis mia ŝanco. Mi diris al vi, ke mi lernis iom pri medicino. Unun tagon, kiam D-ro Somerton kuŝis kun febro, konviktitaro trovis etan insulanon en la arbaro. Li estis mortmalsana, kaj iris al izola loko por morti. Mi zorgis pri li, kvankam li estis venena kiel juna serpento, kaj post kelkaj monatoj de mia kuracado, li bonfartis denove kaj kapablis piediri. Tiam li ekŝatis min, kaj apenaŭ reiris al sia arbaro, sed ĉiam lantis ĉirkaŭ mia kabaneto. Mi lernis de li iomete da lia lingvaĉo, kaj pro tio li des pli ŝatis min.

“Tonga—ĉar tio estis lia nomo—estis bonega boatisto, kaj posedis sian propran grandampleksan kanuon. Kiam mi trovis, ke li sentas sindonemon al mi kaj farus ion ajn por servi min, mi vidis mian ŝancon eskapi.

Mi parolis kun li pri tio. Ni decidis, ke li venigos la boaton en certa nokto al malnova varfo, kiu neniam estis gardata, kaj tie mi enboatigos. Mi diris al li, ke li portu kelkajn kalabasojn da akvo kaj multajn ignamojn, kokosojn, kaj dolĉajn terpomojn.

“Li estis konstanta kaj lojala, tiu eta Tonga. Neniu iam havis pli fidelan kunulon. En la interkonsentita nokto, li venis kun sia boato al la varfo. Sed hazarde estis unu el la prizongardistoj tie,—abomeninda afgano, kiu

## La Signo de la Kvar

neniam preterlasis ŝancon insulti kaj humiligi min. Mi delonge ĵuris, ke mi venĝos min kontraŭ li, kaj jen estis mia ŝanco. Estis kvazaŭ la destino metis lin en mian vojon, por ke mi kvitigu la konton antaŭ ol mi foriris de la insulo. Li staris sur la bordo, kun la dorso al mi, kaj sia karabeno sur la ŝultro. Mi serĉis ŝtonon por frakasi lian cerbon, sed mi povis vidi nenian. Tiam kurioza ideo venis en mian kapon kaj montris al mi kie troviĝis armilo tute preta. Mi sidiĝis en la mallumo kaj malligis mian lignan kruron. Kun tri longaj saltoj de unu kruro, mi estis sur li. Li metis la karabenon al la ŝultro, sed mi plene batis lin, kaj kavigis la tutan antaŭon de lia kranio. Vi povas vidi la fendon en la ligno nun kie mi batis lin. Ni ambaŭ falis, ĉar mi perdis mian ekvilibron, sed, kiam mi restaris, mi trovis lin ankoraŭ kuŝanta kviete. Mi hastis al la boato, kaj post horo ni estis sufiĉe malproksime sur la maro. Tonga portis ĉiujn siajn posedaĵojn, siajn armilojn kaj diojn. Inter aliaj aferoj, li havis longan bambuan lancon, kokosfolian maton, per kiu mi faris specon de velo. Dek tagojn ni vagis, fidante la fortunon, kaj la dekunuan komercboato iranta de Singaporo al Jiddah kun kargo de malajaj pilgrimoj akceptis nin. Ili estis stranga grupo, kaj Tonga kaj mi baldaŭ sukcesis ekloĝi inter ili. Ili havis unu tre bonan kvaliton: ili lasis aliajn trankvilaj kaj ne faris demandojn.



Kun tri longaj saltoj de unu kruro, mi estis sur li.

## La Signo de la Kvar

“Nu, se mi dirus al vi ĉiujn aventurojn de mia eta kunulo kaj mi dum nia vojaĝo, vi ne dankus min, ĉar mi amuzus vin ĝis ekbrilis la suno. Tien kaj tien ni drivis tra la mondo, kaj ĉiam okazis io, kio baris la vojon al Londono. La tutan tempon, tamen, mi ne perdis el la vido mian celon. Mi sonĝis pri Sholto en la nokto. Cent fojojn mi mortigis lin dum mi dormis. Fine, tamen, antaŭ du-tri jaroj, ni ek troviĝis en Anglujo. Ne estis malfacile por mi trovi kie loĝas Sholto, kaj mi komencis la laboron malkovri ĉu li likvidis la trezoron, aŭ ankoraŭ havas ĝin. Mi amikiĝis kun iu, kiu helpis min,—mi ne donas nomojn, ĉar mi ne volas kaŭzi problemojn por aliaj,—kaj mi baldaŭ sciiĝis, ke li ankoraŭ havas la juvelojn. Tiam mi penis atingi lin diversmaiere; sed li estis sufiĉe ruzema, kaj ĉiam estis du boksistoj, krom liaj du filoj kaj lia servisto, kiel gardistoj super li.

“Unu tagon, tamen, mi sciiĝis, ke li mortas. Mi tuj hastis al la ĝardeno, freneza pro la penso, ke li tiel eskapos el mia kroĉo. Rigardante tra la fenestro, mi vidis lin kuŝantan sur la lito, kun liaj filoj ambaŭflanke de li. Mi envenis kaj alfrontus tiujn tri, sed dum mi rigardis lin lia makzelo falis kaj mi sciis, ke li forpasis. Mi eniris en lian ĉambron tiun saman nokton, tamen, kaj serĉis inter liaj paperoj rekordon pri kie li kaŝis la juvelojn. Estis nenio, tamen. Do mi foriris, tiel amara kaj sovaĝa, kiel povus esti homo. Antaŭ ol mi foriris, venis al mi la ideo, ke estus kontentige scii, ke mi postlasis ian markon de nia malamo, se mi iam renkontos miajn sikajn amikojn. Do mi skribaĉis la signon de ni kvar, kiel ĝi estis sur la mapo, kaj pinglis ĝin al lia brusto. Estis netolereble, ke li enteriĝus sen ia simbolo de la viroj, kiujn li prirabis kaj friponis.

“Ni vivtenis nin en tiu tempo per elmontrado de kompatinda Tonga en foiroj kaj aliaj tiaj lokoj kiel nigra kanibalo. Li manĝis krudan karnon kaj dancis sian militdancon; do ni ĉiam havis ĉapelplenon da cendoj je la tagfino. Mi daŭre aŭdis ĉiujn novaĵojn de Loĝejo Pondicherry, kaj dum kelkaj jaroj ne estis novaĵo por aŭdi, krom ke ili serĉas la trezoron. Fine, tamen, venis tio, kion ni tiel longe atendis. La trezoro estis trovita. Ĝi estis en la domsupro, en la kemia laboratorio de S-ro Bartholomew Sholto. Mi tuj venis kaj observis la lokon, sed mi ne povis vidi kiel mi atingus ĝin kun mia ligna kruro. Mi sciiĝis, tamen, pri la klappordo en la tegmento, kaj ankaŭ pri la horo de vespermanĝo de S-ro Sholto. Ŝajnis

## La Signo de la Kvar

al mi, ke mi facile povus atingi la lokon kun la helpo de Tonga. Mi venigis lin tien kaj ligis longan ŝnuron ĉirkaŭ lia talio. Li povis grimpi kiel kato, kaj li baldaŭ eniris tra la tegmento, sed, malbonŝance, Barholomew Sholto estis ankoraŭ en la ĉambro, kaj tio kostis lin multe. Tonga pensis, ke li faris ion tre inteligentan, kiam li mortigis lin, ĉar, kiam mi suprenvenis per la ŝnuro, jen estis li paradanta, orgojla kiel pavo. Tre surprizita estis li, kiam mi komencis bati lin per la ŝnurfino kaj malbeni lin kiel sangavidan diableton. Mi prenis la trezorskatolon kaj mallevis ĝin, kaj tiam mi mem glitis malsupren, lasinte la signon de la kvar sur la tablo, por montri, ke la juveloj fine revenis al tiuj, kiuj rajtis havi ilin. Tonga poste suprentiris la ŝnuron, fermis la fenestron, kaj eliris kiel li envenis.

“Mi ne scias ĉu mi havas ion alian por diri al vi. Mi aŭdis riveriston paroli pri la rapideco de la ŝalupo *Aurora* de Smith, do mi pensis, ke ĝi estus utila ŝipo por eskapo. Mi interkonsentis kun Smith, kaj diris, ke mi donos al li grandan sumon, se li portos nin sekure al nia ŝipo. Li sciis sendube, ke io ne estas en ordo, sed li ne sciis pri niaj sekretoj. Ĉio tio estas la vero, kaj, se mi diras ĝin al vi, sinjoroj, ne estas por amuzi vin,—ĉar vi faris al mi malutilon,—sed ĉar mi kredas, ke mia plej bona defendo estas kaŝi nenion, sed lasi, ke la mondo sciu kiel malbone mi estis traktita de M-ro Sholto, kaj kiel senkulpa mi estas pri la morto de lia filo.”

“Tre rimarkinda rakonto,” diris Ŝerlok Holms. “Taŭga fino al ekstreme interesa kazo. Tute ne estas io nova al mi en la lasta parto de via rakonto, krom ke vi venigis vian propran ŝnuron. Tion mi ne sciis. Parenteze, mi esperis, ke Tonga perdis ĉiujn siajn sagetojn, sed li sukcesis pafi unu al ni en la boato.”

“Li perdis ĉiujn, sinjoro, krom tiun, kiu tiam estis en lia blovpafilo.”

“Ha, kompreneble,” diris Holms. “Mi ne pensis pri tio.”

“Ĉu estas alia punkto, pri kiu vi volus demandi?” demandis la konviktito afable.

“Mi pensas, ke ne, dankon,” mia kompano respondis.

## La Signo de la Kvar

“Nu, Holms,” diris Athelney Jones, “Estas dece ke ni indulgis vin, kaj ni ĉiuj scias, ke vi estas spertulo pri krimoj, sed devo estas devo, kaj mi jam iom pasis la limojn por kontentigi vin kaj vian amikon. Mi sentos min pli trankvila, kiam ni tenos nian rakontiston sekura per seruro kaj ŝlosilo. La fiakro ankoraŭ atendas, kaj estas du inspektistoj malsupre. Mi estas dankema al vi ambaŭ pro via helpo. Nature, oni bezonos vin en la proceso. Bonan nokton al vi.”

“Bonan nokton, sinjoroj,” diris Jonathan Small.

“Vi iru antaŭe, Small,” rimarkis Jones singarde, dum ili eliris el la ĉambro. “Mi aparte zorgos, ke vi ne klabos min per la ligna kruro, kiel vi faris al la sinjoro en Insuloj Andaman.”

“Nu, jen la fino de nia eta dramo,” mi rimarkis, post kiam ni sidis iom da tempo fumante en silento. “Mi timas, ke tio eble estos la fina espolorado, en kiu mi havos ŝancon studi viajn metodojn. F-no Morstan faris al mi la honoron akcepti min kiel sian estontan edzon.”

Li eligis mornegan ĝemon. “Mi timis tion,” diris li. “Mi vere ne povas gratuli vin.”

Mi sentis min iomete ofendita. “Ĉu vi havas motivon por esti malkontenta pri mia elekto?” mi demandis.

“Tute ne. Mi pensas, ke ŝi estas unu el la plej ĉarmaj junulinoj, kun kiu mi iam konatiĝis. Kaj ŝi eble estintus treege utila en tia laboro, kian ni jam faris. Ŝi havis veran talenton tiurilate. Memoru pri kiel ŝi konservis la planon de Agra el inter ĉiuj aliaj paperoj de sia patro. Sed la amo estas emocia afero, kaj kio ajn estas emocia estas mala al tiu malvarma rezonado, kiun mi estimas super ĉiuj aliaj aferoj. Mi neniam edziĝus mem, por ke tio ne influu mian juĝadon.”

“Mi fidas,” diris mi ridante, “ke mia rezonado eltenos sub la provo. Sed vi aspektas laca.”

“Jes, la reago alvenas al mi. Mi estos pli malrigida ol ĉifono dum tuta semajno.”



## La Signo de la Kvar

“Estas strange,” diris mi, “kiel periodoj de tio, kion mi nomus mallaboremo en alia viro, alternas kun viaj eksplodoj de energio kaj vikleco.”

“Jes,” li respondis, “ekzistas en mi la materialoj por tre bona mallaboremulo kaj ankaŭ tre vigla aganto. Mi ofte pensas pri tiuj versoj de Goethe:

Schade dass die Natur nur *einen* Mensch aus Dir schuf,  
Denn zum würdigen Mann war und zum Schelmen der Stoff.<sup>4</sup>

Parenteze, koncerne la aferon Norwood, vi vidas, ke ili havis komplikon en la domo, kiu povas esti neniu alia ol Lal Rao, la ĉefservisto. Do Jones fakte havas la ekskluzivan honoron kapti almenaŭ unu fiŝon en sia granda kaptaĵo.”

“La divido ŝajnas iom maljusta,” mi rimarkis. “Vi faris la tutan laboron en tiu afero. Mi ricevas edzinon de ĝi, Jones ricevas la meriton, kio restas por vi?”

“Por mi,” diris Ŝerlok Holms, “restas la botelo de kokaino.” Kaj li etendis sian longan, blankan manon al ĝi.

---

Bedaŭrinde, ke la naturo faris el vi nur unu homon, ĉar estis materialo en vi por kaj bonulo kaj fripono. <sup>4</sup>